

Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo

n-ro 6 (julio 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Gerrit Berveling, Hong Jia, Luiza Carol, Rita Mkrtĉjan, Yin Jiaxin, Cai Long, Pipi, Yang Fang, Mandio, Jianye Wang, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Vejdo, Kang Long, Guozhu, Mikaelo Bronŝtejn, Eto, Maria Nazaré Laroca, Lily, Yi Qiao, Stanislao M Esposito, John Huang, Lilia Nikolova Minosun, Ma Feng, Rovere Emanuele, Yanke, Bardhyl Selimi, Guo Min, Yi Shaomin

AI-ilustris John Huang, karikatur-desegnis Paula Adúriz

Enhavo

Originala prozo

Gerrit Berveling: Pri nia vojaĝo al Romo.....	3
Hong Jia: Perdita diamanta ringo.....	11
Luiza Carol: La ringoleporoj.....	13
Rita Mkrťĉjan: Fasko da mikronoveloj.....	16
Yin Jiaxin: Fano de ĉina ŝako.....	18

Tradukita prozo

Yi Shu: amrilato ekster geedzeco.....	21
Tan Ge: Ponto.....	32
Anonimulo: Ordinara civitano.....	34
Deng Yingxue: Ĉe la fenestro troviĝas pego.....	39
Xi Xi: Tia fraŭlino, kia mi.....	41
Fratoj Grimm: Avantaĝa negoco, Stranga muzikisto.....	50
Eileen Chang: Bovo.....	56
Chiung Yao: En profunda korto (6).....	60
Xue Rongruo: Veto pri kantoj.....	67

Originala poezio

Gerrit Berveling: Dekunuoj (sentitole), Kazantzakis k.a.....	69
Mikaelo Bronŝtejn: Kvin sentitolaj poemoj.....	75
Eto: Sur la vojo en nokto.....	78
Maria Nazaré Laroca: Forkurvojo k.a.....	80
Lily: Pensero en aŭtuno k.a.....	84
Yi Qiao: Bonstato, Saniĝo tra meditado.....	89
Stanislao M Esposito: Steloj kaj larmoj, La donaco de vivo.....	91
John Huang: La monda “Libro de Poezio”.....	93
Lilia Nikolova: Mi estas el Bulgario.....	95
Vejdo: Sorĉa povo kontraŭ pluvo.....	97

Tradukita poezio

Tsangyang Gyatso: Poemoj de Tsangyang Gyatso.....	101
Qu Yuan: Naŭ kantoj.....	106
Wang Zhongbin: Vibrado k.a.....	115
Rovere Emanŭele: Amo sub sunlumo k.a.....	118
Anita Hoxha: Malnova foto k.a.....	123

Tradukita teatro

Anonimulo: La viro, kiu kredas je l' amo.....	128
---	-----

Artikolo kaj eseo

Ge Baoqua: Hujucz, la veterana aŭtoro, kiun mi konas, Vojaĝo per Esperanto.....	136
---	-----



John Huang, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordamerika, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por du sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022 kaj 2023. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis multajn Esperanto-agadojn en la sekvaj jardekoj. Li faris la AI-bildojn de ĉi tiu numero de Beletra Edeno.

Foto sur la kovrilo: Ĉarma nokta pejzaĝo de urbo Chongqing, Ĉinio



Karikaturoj desegnitaj de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Gerrit Berveling (Nederlando)



aŭtoro, Gerrit Berveling

Pri nia vojaĝo al Romo

Kvankam mi naskiĝis en Vlaardingen, Nederlando, dejunaĝe iel mi min sentas Romano. Mia patrino estis romkatolika, mia patro protestanta, sed por edziĝi al ŝi, li fariĝis katolika – kiel ofte tion oni nomas “pli roma ol la papo”. En la baza lernejo mi fariĝis mes-servanto, ĉar unuavice mi volis fariĝi pastro, sed laŭ mia patro “en nia familio oni ne povas studi por pastrigo”. Do mi rezignis unuavide, sed post la sesa jaro de l’ bazlernejo, kiam oni min volis sendi al “mulo”, mi ribelis – ne!, ne!! kaj ne!!! Do duafoje mi iris al la sesa klaso, sed jarkomence pro nova laborposteno de l’ patro ni transloĝiĝis al Leiden – la unua universitaturbo de nia lando de post la 80-jara milito por sendependiĝi de la hispana imperiestro.

Post la baza studo en la romkatolika seminario, la 7-an jaron¹ mi transiris al Leiden kie mi ekstudis pri klasikaj lingvoj kaj kulturoj.

Kiam mortis la patro mi ricevis de la ŝtato monon, por helpi min dum mia plua studado. Tiun monon mi tuj uzis por trajnbileto al Romo, kie mi gastis ĉe familio Avati en la Via del Babuino meze en Romo. De tie la forumon mi plurfoje travagis, la Koloseon, la diversajn montetojn de l’ urbo – ankaŭ al Pompeii mi iris. En februaro 1969 neĝon mi spektis meze de l’ Panteono. Tiusomere mi iris al Etruskologia kurso en Perugia. Kelkajn monatojn poste mi proponis al Madzy van der Kooij, kaj post kelkmonata amindumado mi edziĝis al ŝi, kaj kune ni trajnis al Romo – *luna di miele*²; kaj de tie ankaŭ al Pompeii.

Nun, en 2024, ni intencas sesope iri al Romo. Origine per la sama sesopo ni intencis iri jam pasintjare, sed ĉar kaj Madzy kaj Etelka tiam ni bone povis iri, ni devis prokrasti unu jaron.

Do, ek nun! La sesopo estas Madzy kaj mi, kaj nia filino plijuna Etelka kun sia edzo Richard kaj iliaj filinoj Gabriëlle kaj Rachel³. Richard veturos nian grandan aŭton, en kiu estas loko por naŭ personoj. Do ni certe survoje havu iom da libera

spaco.

Laŭplanade por mi nepre estos lastfoje, ke Romon mi vizitos. Pro la monda situacio kaj la ekologia realo nepre ne estas akceptebla, laŭ nia kompreno, plu flugi nur turisme longdistance. Do tio validas certe ankaŭ pri Romo. Jam ni devis serioze cerbumi, ĉu en nia buso tien iri defendeblas – tamen ni jesis, kvankam kun iom da hezito.

La plano pri nia vojaĝo ekis ĉe mi, ĉar efektive mi tiom sentis “hejmsopiron” al Romo, ke se necese mi sola pretus petveturi tien – kio kun mia cerba infarkto certe ne estas defendebla. Sed tamen ...

La ceteraj parenteze tion nepre forte malaprobis. Do – kompromise: kune ni iru. Pro ambaŭ knabinoj ne eblas ekster la lerneja feriado. Do ni devige elektis aprilo-majon.

Dikan libron *ROMA E DINTORNI* mi kunportis – poste montriĝos, ke eĉ ne unu paĝon el ĝi en Romo mi uzis.

Mallonge antaŭ nia foriro, la 24-an de aprilo, hajlis forte sed mallonge. Posttagmeze tiutage nin vizitis mia bazlerneja amiko Han Pieete kun donace belega germanlingva Atlaso de la antikva mondo. Post lia foriro Madzy kaj mi enpakas niajn aĵojn en du kofrojn.

La postan tagon ni iras al Leiden, ĉar estas la naskiĝdato de mia sola fratino Sjaan. La ceteraj fratoj ĉeestas aŭ telefone gratulas.

Nia granda aventuro komenciĝas la 26-an de aprilo, kiam Madzy kaj Richard foriras por venigi la aŭton ĉi tien. Ni veturas al Wierden, kie vespere Etelka, Gabriëlle kaj mi spektas plurajn malnovajn filmojn de la serio Flikken Maastricht, kiu ankoraŭ plu ekzistas. Estas agrable ree vidi tiujn malnovajn bildojn kun aktoroj multe pli junaj ol nun.

La kato tute nervozas; la besto ŝajne iel ekkaptas ke estas io nekutima okazonta. La hundo estas al gastejo.

Vespere 23.40 ni forveturas.

Dum la nokto Gabriëlle dufoje devis vomi.

Matene je 6.30 fariĝas lume – bela pejzaĝo.

Ĉirkaŭ 7.30 ni manĝis en la buso. Estas tro malvarme por manĝi ekstere.

12.40 ni haltis ĉe gastejo, ege multekosta. Sed ja estas Svislando.

Uzi la necesejon donis problemojn, ĉar la mekaniko ne funkcias. Sed funkciulino nin povis helpi.

Tuj antaŭ ol manĝi el la kunportitaĵoj, ni pasis tra ege longa tunelo de ± 17 km. ĝi daŭris pli malpli 15 minutojn – la Gotthart-tunelo.

Sur la montoj, kiujn ni pasas, daŭre pluvos. Estas rave bela vidaĵo. La lastaj kilometroj kiujn ni pasas ne estas agrabla pavimo. Richard videble fariĝas laca, kaj

ne estas eblo ripozi, ĉar la vojo pluiras kaj nin do plu pelas.

Kiam finfine nian italan adreson ni atingas, Richard unue devas veturi ĉirkaŭ la konstruaĵon. Ĉirkaŭ 14.35 ni estas en niaj 3 ĉambroj. Romo proksimiĝas!

Ĉar dumlonge ni ne povis movi la artikojn, ni ĉiuj tion forte sentas – precipe Etelka, por kiu tio estas plej ĝene. Nur ege pene kaj kun multa helpo ŝi povis eliri el nia buso.

Ni iom trinkis, 14.20, en la halo ĉe aŭtomato, ĉar nenio dumtage tie ĉirkaŭe funkcias. Eĉ trinkaĵojn mendi ne eblas. Mi havis ĉokoladolakton, kiu bedaŭrinde estis ekstreme sukereca. Madzy kaj mi – kiu kredus? – iom legas. Serĉante la komputilon, Madzy retrovas en la pakaĵoj la kuiritajn ovojn, kiujn de hejme ni kunportis. Fine, ĉirkaŭ 18.30 kun Richard aŭte ni foriras al ia itala manĝejo, kie oni nur disponas pri komputilaj indikoj sur iu aparato kun QR-kodo. Tamen juna kelnero pretis helpi pere de normalaj menukartoj, tre afable. La manĝaĵoj tre bongustas kaj mi pagas la tuton. Rachel sian pizon ne manĝas komplete, do ŝia patro manĝas la restaĵon. La restoracio tre rapide pleniĝas de novaj gastoj.

Poste ni reveturis al la hotelo por tranokti. Morgaŭ frue ni devos plu-iri, ĉar pluraj timas ke ni atingos nian hotelon en Romo ne ĝustatempe.

Matene ĉirkaŭ la 6^a de efektive mi vekigis en Italujo. Hodiaŭ ĉi tie ni matenmanĝos kaj foriris, 8.11, la lastan distancon al Romo. Etelka ĉirkaŭ 9.11 funkciigis komputilprogramon kun fotoraportaĵo pri nia ĝisnuna vojaĝo al Romo. Posttagmeze, ĉirkaŭ 15.30 la tuta aspekto ŝanĝiĝas, tiel ke ni klare povas vidi, ke ni nun serioze alproksimiĝas al Romo mem.

Iom poste finfine, serioze en antaŭurbo de Romo, ni ricevas helpon de la luiganto pri parkado de nia buso kiel eble proksime al la luota domo. Nur bedaŭre, ke ni devos grimpi supren 4 etaĝojn. Do tio estis irado kaj reirado suben-supren ktp.

Ĉirkaŭ 17.00 kiam ni preskaŭ pretis pri la unua ordigado, montriĝas ke la necesejo ne bone funkcias, ĉar ĝia akvo tro longe neuzate plu forlikadas. Etelka do telefonas al la luiganto, kiu baldaŭ venas por klopodi ripari la problemon.

Vespere Madzy kaj mi lavas la servicon; Rachel duŝas sin, poste Etelka kaj Richard, kaj fine mi.

Morgaŭ ni planas kvietan tagon, iom ripozi, iom rigardi ĉirkaŭ ni, kie ni estas, kiel ĉio “sentiĝas”, odoras, aspektas ... Unue en la strato, kaj eventuale posttagmeze iri al la urbocentro.

Antaŭ ho tiom da jaroj, kiam unuafoje mi estis en Romo⁴, la familio Avati ĉiam sonigis la radion tutforte la tutan tagon. Matene mi ricevis tason da kafo nigra kaj eble unu peceton da pano. Poste mi ekiris eksteren, aŭdi la sonojn de la urbo, spekti kaj babili kun kiu ajn. Plurloke en ilia strato estis etaj kaj iom pli ampleksaj librotikoj. Tiun unuan fojon en Romo ho kiom da libroj mi aĉetis kaj legis. Matene kun la filoj ofte mi babilis, petante klarigojn pri ĉio itala kion mi aŭdis aŭ vidis kaj

ne komprenis. Kaj ili tre ŝatis doni klarigojn. Sian lingvon kaj urbon klare ili tre amis. Jam baldaŭ tre regule mi reiris al la sama manĝejo, kaj do fariĝis tie kvazaŭ parto de la meblaro. Plurfoje mi tie ankaŭ parolis kun sinjorino, kiu loĝis apude kaj verkis librojn⁵.

Je certa momento mi volis ankaŭ viziti Pompeii, tiun urbon neniigitan de la erupcio de Vezuvio. Neniel estis probleme lasi en ilia domo plurajn miajn aĵojn ĝis mia reveno. Do en Pompeii mi same agis turisme. Belega urbo.

Kiam mi ree estis en Leiden, mi plu studis ĝis fariĝis tempo reiri – petveturante denove – al Italujo, ĉar en Perugia mi aliĝis – kiel jam dirite – al kurso pri Etruskologio. Oni proponis al mi plurajn kursojn pri la Itala, sed ĉar tiun mi jam sufiĉe flue povis paroli, tion mi trovis neinde. La ĉefa profesoro pri etruskologio estis Massimo Pallottino, senkonteste tre klera kaj sperta, sed ho kiom singraviga! Pluraj profesorinoj, kiuj same donis lekciojn pri aspektoj de la etruskologio, pri artoktp, laŭ mi estis multe pli indaj, ekzemple profesorino L. Banti.

La kurson fermis matena ekzameno, buŝa; sed la antaŭan vesperon longtempe mi estis dancinta, eĉ iom enamiĝinte. Kiam do relative frumatene mi devis ekzameniĝi, tio montriĝis por mi iom tro. Do mi malsukcesis, nur iom rande. Sed jam baldaŭ mi min konsolis dirante, ke la monon por la diplomo, kiun oni tuj devis pagi, mi ja ne plu disponis.

De tie mi petveturis al Assisi, kie de alte mi tre admiris la ĉirkaŭaĵon. Poste ankaŭ Assisi mem mi vizitis, kiu faris fortan impreson. De tie sufiĉe rekte aŭtostopante mi reiris al Leiden, ree al la studo. Kiel jam rakontite poste mi proponis al Madzy, ke ni “ŝparu pri ringoj”, kion ŝi opiniis ne necesa – ringon oni ja povas tuj aĉeti. Sed mi plej ofte estis sen mono ...

La 29an de aprilo frumatene Madzy kaj Eteka faris piediradon kaj butikumis. Poste ni matenmanĝis. Ekironte al Romo mi kunportis kelkajn donacojn, kiujn por mia ĵusa datreveno mi ricevis, interalie belan libreton kun desegnopapero. Kaj mi nun volonte provos fari desegnaĵojn ĉi tie en Romo.

De papo Francesco mi aĉetis du librojn. Gabriëlle kaj Madzy dume butikumis pri vestaĵoj por Gabriëlle, atendante ke Rachel venos de nia ĉambro suben kun Eteka, por vidi ĉu iu jupo, kiun oni malkovris, estas ĝustamezura por Rachel. Sed baldaŭ montriĝis, ke ĝi tute ne bone sidas, sed alia vestaĵo estas belega.

Poste ni butikumis pri manĝaĵoj. Madzy pretiĝis la fazeolojn.

Kaj post tio ni faris nian unuan iom vastan turisman vojaĝon urbocentren. Ĉe tio ni komencis ĉe Piazza di Spagna, Via del Babuino, Piazza del Popolo, la monto Pincio, Via Margutta, Via del Corso, Piazza di Spagna, Trevi-fontein – metroe reen al la ĉambro. Tiamaniere Eteka vidis por komenci pli malpli la samon, kion ankaŭ Madzy vidis la unuan tagon en Romo. Ni havus 6 biletojn por septaga abono pri ĉiu

publika trafiko. Sufiĉe etkoste.

Vespere ni manĝis la fazeolojn. Ni iom babilis pri tio, kion ni faru poste. La turistajn ekskursojn kiujn ĝis nun ni vidis, ni trovas tro kostaj – ja sesope ni estas!

Ĉi-nokte Gabriëlle kaj mi dormis en nia ĉambro, Madzy kuireje sur la benko; tion ŝi trovas plej taŭga solvo, ĉar vespere ŝi povos legi kiel longe ŝi volas sen iun ĝeni, kaj matene ŝi ja ĉiam estas la unua de ĉiuj ni.

La 1-an de majo ĉiuj volas teni iom kvietan tagon; Madzy kaj mi iras al San Paolo fuori le Mura, kiun ni sciis ja belega. Mi interalie survoje fotis la San Klemente; unu el miaj fotoj mi intencas uzi por la eldono de l' Letero de Klemento de Romo al la Korintanoj; la tiel nomata 2^a letero de Klemento estas efektive frukristana anonima prediko; krome aldoniĝu la Martirakto pri Klemento. Pri la portretoj de la unuaj papoj en San Paolo fuori le Mura foton mi faris – por tiu eldono eventuale.

Poste – pro la daŭra pluvado – rondirantan aŭtobuson ni serĉis tra EUR. Montriĝis supozeble tre malnova buso, ĉar ĝi daŭre “saltetis”, kio ne estas agrabla sento. Sed multon neviditan ni ekvidis.

Vespere ni ree kune manĝis en nia domo. Kaj postmanĝe Gabriëlle nin ĉiujn regalis per io ĉe MacDonald's.

Ĉar sekvatage laŭ la prognozoj tuttage pluvos, ni decidis butikumi en du malsamaj lokoj apude, ŝirmataj kontraŭ la vetero. Precipe la duan bazon mi ege ŝatis: estis tie kiel eble plej multe da diversaj fruktoj, fiŝoj, konkvoj ktp – mirinde riĉa tutajoj!

Ili ĉiuj bedaŭrinde volis plui, do mi devis rezigni kaj kuniri, sed se tute sola, nepre ankoraŭ longe tie mi restadus por ĉion gvati.

Etelka, Richard kaj Rachel transiris la straton por aĉeti trinkaĵojn. Je 11.30 ni ree estis endome.

Antaŭ pluraj jaroj oni devis ripari Fontana di Trevi, se mi bone memoras, ĉar (Nederlandaj) futbalaj huliganoj ĝin ege difektis; nun ni supreniris tien – estas sufiĉe alte – por la plimulto de ni estis iom tro, sed Madzy kaj mi eĉ iris ĝis plej supre, kie la loka preĝejo montriĝis eĉ vizitebla. Poste ni ankoraŭ vizitis plurajn aliajn vidindaĵojn, kie ili aĉetis amason da etaj memoraĵoj pri nia vizito, sed fine Madzy kaj mi iris hejmen por prepari la manĝon. La ceteraj restis plu ĝis ĉirkaŭ la 19a horo ili revenis hejmen. Lastmomente ĉe entraĵniĝo oni ŝtelis la telefonon de Richard.

Kune, grupe, ni iris al MacDonald's, kie Madzy nin regalis por iom malstreĉiĝi. Poste Etelka nepre volis vidi, kie situas la policejo, kie morgaŭ ni devos esti. Scii tion laŭ ŝi estas kvietige. Dum tien ni iris, subite forte ekhajlis tiom, ke ni devis serĉi sekurecon sub arboj. Vespere Etelka kaj Richard laboris pri ŝanĝoj en la komputilo-programo.

La 3-an de majo, ĉirkaŭ la 8^a mi kun la paro iris al la polico por informi pri la ŝtelo

kaj peti skriban ateston por la asekuro. Madzy antaŭe jam faris sian matenan piediradon. Ĉirkaŭ la 10-a ni ree estis en la ĉambro; la lokaj policistoj, al kiuj Etelka en la angla ĉion ege klare eksplikis, finfine venis al la decido, ke prefere ni iru al Stazione Termini, kie estas apude granda policejo, kie oni disponas pri la bezonataj formularoj kaj scio. Krome tie oni ankaŭ parolas angle, kio ĉi tie tre lamis⁶. Ĉe la policoficejo ni restis sufiĉe longe. Oni tre ĝentile nin traktis. Finfine Richard ricevis siajn atestaĵojn kun pluraj stampoj; montriĝis tiam eĉ, ke erare oni donis al li neekzistantan duan antaŭnomon. Etelka tion rimarkis kaj oni perstampile konfirmis la neekziston de tiu ekstra antaŭnomo. Per buso ni rondiris tra Romo; kaj ĉar malfrue tage ni aĉetis tiujn biletojn, morgaŭ senpage ni ree rajtos fari saman rondiradon buse. Multege ni vidis, eĉ faris mi filmeton pri parto de nia vojaĝado. Trajne reveninte hejmen, Madzy, Gabriëlle kaj mi butikumis pri manĝaĵoj.

Vespere ili ludis iun por mi nekompreneblan ludon, kiun ili tre ŝatis.

Kiam en Zwolle mi laboris kiel instruisto pri Latina kaj Greka lingvoj kaj kulturoj⁷, foje okazis tre unika feriado de tuta grupo da diversfakaj kolegoj aŭ -inoj kun ties partneroj al Romo. Tiuferie mi iom ĉiĉeronis ie-tie, sed ĉefe ni mem malkovris la vidindaĵojn de la malnova urbo; ĉiuvesperiĝe ni ree kunvenis en unu fiksita glaciaĵejo, kie oni reciproke interŝanĝis la tiutage novajn spertojn. Foje preskaŭ la tuta grupo iris kelktage kune al Pompeii, sed unu kolego nepre volis resti nur en Romo, ĉar “tie neniam oni ĉion jam vidis kio estas vidinda”.

La 4^a de majo Gabriëlle ĉirkaŭ 9.45 telefonis dum butikumado por peti iajn konsilojn, dum Rachel kaj mi lavis la servicon.

Dumtage per tiu hop-op-buso ni ree veturis tra la urbo; dumvoje foje ni deiris, interalie por manĝi ie iun pizza-rustica al taglio, t.e. ke oni indiku pecojn diversgustajn kiujn oni varmigas por ke la gastoj ilin manĝu. Veturante plu ni ĉe unu haltejo interalie pasis la Bocca-della-verità, granda murornamaĵo kun vizaĝo, en kies buŝon oni la manon povas enmeti. Laŭ la legendo ĝi fortranĉas la manon al homo kiu mensogis. Sed estis tiom da turistoj, kiuj vice staris por povi enmeti la manon, ke nia grupo rezignis. Tiamaniere la turismado ne plu estas amuza.

La ceteraj ie manĝis glaciaĵojn, sed mi eniris du librobutikojn, kie du librojn mi aĉetis. La unua estas vere mirinde leginda: Raimon Pannikar – *Profeto del doppodomani*, redaktita de Raffaele Luise. De ĝi intertempe jam pli ol 100 paĝojn mi legis en mallonga tempo. La alia libro estas Matthias Egeler – *La Santo Graal – Storia del calice di Cristo da Artù a Indiana Jones*.

Madzy ricevis de Etelka novajn orelingojn (kreolajn). Ili estas tre belaj.

Lacaj sed kontentaj ree hejme.

Dimanĉon la 5^a de majo Madzy kaj mi solaj ekiris por ĉeesti la meson en la Frisa Preĝejo. Sed tute ne eblos iri rekte, kion ni celis, ĉar ĉie estis maleble plu paŝadi.

Multaj flankstratoj ĉie estis ŝirmataj per longaj pli ol hom-altaj supozeble lignaj barajoj. Ĉu sekvo de la klimata ŝanĝiĝo? Por atingi la Frisan Preĝejon ni devis ekstre rondiri por ne eniri en la ampleksan arkadon de la Sankta-Petro-katedralo. Poste montriĝis, ke tie tre zorge oni kontrolas ĉiujn por ŝirmi la papon kontraŭ terorista atako.

Fine la Frisan Preĝejon ni trovis – ja estas granda specialaĵo, tiu nederlandlingva preĝejo tuj ĉe San-Pietro! La diservo mem estis belega. Gvidis la meson la episkopo de Haarlem-Amsterdam (ĉar eksterlandanoj ne multe komprenas pri nia lando, oni aldonis Amsterdam al la indiko de l' episkopejo Haarlem.) Ĥoro el Amsterdam tre bone kaj bele kantis, sed ankaŭ ni la ceteraj povis abunde kunkanti. Estis tre inspira prediko ankaŭ.

Kiam ni eliris, defore ni rekonis la sonon de l' voĉo de la papo.

Poste Madzy kaj mi vizitis la siatempe fifame konatan regionon Trastevere, aliaflanke de la rivero se rigardi el la centro de Romo. Sed nuntempe estas tie tre plaĉe rondiri. En la Santa Maria en Trastevere ni sekvis etan parton de la Paska Ukraina diservo. Ni serĉis la metroon sed ĝi ne estis tie (eraro en Google Maps!). Ni do prenis aŭtobuson, de kiu oni pli povas vidi de la urbo.

Ĉirkaŭ 17.30 ni ree estis ĉe la aliaj.

La 6^a de majo, kiam ni intencis aŭtomobile foriri al Tivoli, montriĝis ke Rachel ne sentas sin bone, ke ŝi nepre ne povos akompani nin; do ni fine decidis rezigni pri tiu certe bela ekskurso. Do kvarope ni eliras por trajni al la centro, sed la metroo strikas! Do ni klopodas trovi lokon en la atendovico por la plenplenaj busoj, sed estas neeble.

Ĉirkaŭ 11.00 ree en la domo, atendante pri Etelka kaj Gabriëlle, kiuj en vendejo serĉas vestaĵojn.

Posttagmeze Madzy butikumas kaj same Richard kaj Etelka, sed ne kune; do Madzy revenas multe pli frue. Gabriëlle bedaŭrinde sin ne sentas bone, ŝi kuŝas lite. Vespere Madzy kaj mi purigas la servicon, poste ni ree iras al MacDonald's. Tie mi trinkas tre bongustan bieron. Bedaŭrinde nialande oni tion ne havas tie.

La 7^a de majo, relative frue, ĉirkaŭ 9.45 ni pretas por foriri al San Pietro.

Unue la placon San Pietro de ĉiu flanko kaj perspektivo ni vidis kaj fotis, poste ni manĝis la kunportitaĵojn; post tio ni disiris, Madzy kaj mi al librovendejoj la ceteraj al “suveniroj”.

Madzy kaj mi hejmeniris metroe, kie ni iom ripozis kaj legis. Kiam la ceteraj revenis, Madzy preparis la manĝaĵojn. Vespere ni ĉiuj ordigis niajn aferojn por la kofroj.

La 8^a de majo, mi vekigis iom post 9.00. Tiutage finfine kun bela vetero Madzy kaj mi iris solaj al San Paolo fuori le Mura, kie mi sukcesis finfine fari desegnaĵon kiu plaĉis al mi. Tiun mi do fotu kaj sendu al la pentristino, kiu estas membro de l'

librolegada grupo de Madzy; por mia datreveno ŝi donacis al mi belan libron kun desegnofolioj kaj stiftoj de diversaj koloroj. En buso poste ni iom ekskursis, kaj poste metroe ree al la domo.

La 9a kaj 10a de majo estis nia hejmvoyaĝo. Ankaŭ nun mezvoje ni havis tre bonan tranoktejon, kiun Etelka elektis. Kiel lerta ŝi fariĝis en tiaj aferoj!

Dumvoje Etelka terure suferis pro la Long-covid. Ĉe alveno hejmen feliĉe ŝi iom pli bone fartis denove. Vespere 19.45 ni pretas pri la manĝado, kaj la aŭto estas malplenigita kaj purigita; morgaŭ Madzy kaj Richard reportos la aŭton al la luigisto. Finiĝis nia Roma aventuro.

Se unu aferon mi lernis de ĉi vojaĝo, estas tio, ke nia amasa turismo vere estas granda plago – kiun persone ankaŭ mi helpis estiĝi, de post kiam 21-jara unuafoje mi iris al Jugoslavio, Zagreb, Dubrovnik, Ljubljana, Rijeka ktp. Sed la mondo ja estas tiel fascina!

[1] Do meze de l' unua jaro de la “Grand-Seminario”, la studo universitatnivela pri katolika filozofio & teologio.

[2] Nuptovojaĝo.

[3] Prononcu: Raĥel.

[4] Iun matenon mia frato Herman venis al mia studenta domo kun la sciigo, ke mortis neatendite la patro. Kelkajn monatojn poste subite de la ministerio mi ricevis monon ĉar senpatra, do leĝe orfo, mi estas kompatinda. Kolera mi tuj elspezis tion, aĉetante bileton por Romo. Tie kunstudento helpis min trovi adreson en la centro.

[5] Iun tagon mi ekbabilis kun laboristoj kiuj fosis sub Koloseo; en paŭzo ili venigis min por subtere iom diste montri iliajn laborojn; eĉ nederlandaj studentoj pri arkeologio tion kutime ne povis spekti!

[6] Tio pensigas pri siatempa vizito kun klaso al Romo; ankaŭ tiam oni prirabis iun, sed la junuloj tre fiere deklaris, ke ĉion angle ili ordigos – tamen poste ili revenis al mi petante, ke itale mi klarigu al la polico kio okazis, ĉar la anglan oni ne komprenis.

[7] Je aĝo, kiun mia patro eĉ ne atingis, unuafoje mi havis plentempan postenon en oficiala fako mia. Ĉar kaj instruiste kaj kiel pastoro mi nur havis postenojn malpli ampleksajn.

Hong Jia (Ĉinio)

Perdita diamanta ringo

G estis direktoro de elektra kompanio. Iutage lia edzino laŭte kriis en la dormoĉambro, “Mia diamanta ringo jam perdiĝis!”

Li tuj sin ĵetis en la ĉambron kaj demandis, “Kio okazas, nia kara?”

Ŝi diris, “Mi metis ĝin en la kesteton ĉe lit-tableto. Vi diris, ke la ringo kostas multe, ŝajne je ducent mil juanoj. Mi domaĝis ĝin kaj neniam ĝin surportis. Kia malbona afero! Mi sentas doloron en la koro. Sed kiu forprenis ĝin?”

G cerbumadis. “Ni ekzameni la vizitantojn, kiuj eniris nian domon antaŭ du aŭ tri tagoj. Laŭ mi, ĉiutage K, la ŝoforo de taksio venas al nia domo por preni nian fileton al la lernejo. Li havas ŝancon forpreni la ringon. Kaj P, mia malnova amiko antaŭ du tagoj kune kun siaj edzino kaj filino venis al nia hejmo por vizito. Li estas riĉa bankestro. Li ne povis tuŝi la ringon. En liaj okuloj tia ringo estas nenio valora. Por solvi la enigmon mi morgaŭ sondos la ŝoforon.”

La sekvan tagon kiam la ŝoforo venis al la hejmo, G tiris lin flanken kaj diris, “La diamanta ringo de mia edzino perdiĝis en la hejmo. Ĉu vi ĝin vidis? Se vi prenis ĝin, redonu. Tio ne gravas. Mi ne raportis tion al la polico. Ĉar la ringo estas multekosta, la kazo certe vekos atenton ĉe la polico.”

La ŝoforo tuj komprenis, kion G volas diri. Li estis suspektata forpreni aŭ ŝteli la ringon. Pro tempa urĝeco li ne volis disputi kun li. Li prenis lian fileton per taksio al la lernejo.

Kiam li revenis hejmen, li rememoris, kion G diris. Ju pli li pensis, des pli li koleriĝis. Evidente tiuj urbanoj malestimas nin, kiuj venas labori en la urbeto el la kamparo. Ĉu ni malriĉaj devus ŝteli ion aŭ alion por nin vivteni? Pensante, li elprenis botelon da alkoholaĵo kaj komencis drinki sola senparole. Kiam li ebriiĝis, lia kolero atingis kulminon. Li ŝancelpaŝe kaj stumble iris supren al la alta tegmento kaj volis salti de tie por sin mortigi. Vidinte tion, liaj najbaroj panikiĝis. Kelkaj el ili pene retenis lin kaj aliaj raportis tion al la polico. Tre rapide policanoj hastis al la loko. Unu el policanoj sin ĵetis kaj forte trenis lin de sur la tegmento. Li estis eskortita al la policejo.

Kiam li sidis en la policejo, li ŝajne iom sobriĝis. Policano, pridemandis al li, kial li volis salti de sur la tegmento, kaj li detale rakontis, kio okazis en la hejmo de G.

La polico komencis fari enketon pri la okazintaĵo kaj ili trovis kelkajn dubojn. G estas ordinara funkciulo en la registara instituto. Povas esti, ke li ne havas tiom da mono aĉeti tiel valoran ringon. Se tiel, la mono, per kiu li aĉetis la ringon, venas el

la kontraŭleĝa kanalo. Tio probable formas krimon de ĉantaĝo. La polico petis informon de la instituto, kie G laboras. La instituto respondis, ke kvankam G estas direktoro kun pli alta salajro, li tamen ne havas povon aĉeti tiom valoran diamantan ringon. La enketo de la polico profundiĝis. Ili alvokis G al la policejo kaj petis lin fari klarigon pri la ringo kaj premis lin montri la fakturon de la aĉetado. Ili avertis al li, “Se vi ne povas montri al ni la fakturon, ni rajtas akuzi vin pri ĉantaĝo.”

Siaflanke G panikiĝis, ĉar li devis konfesi, kion li kaŝe faris. Okazis, ke la estro de iu konstruata kompanio volis akiri kontrakton kun lia elektra kompanio. Li adoptis kontraŭleĝan rimedon kaj donacis al G diamantan ringon, pretekstante, ke la ringo estas donacita al lia edzino. Malgraŭ ĉio ĝi estas ago de monŝmirado. La polico tuj raportis tion al la instanco de la instituto, kie G laboras. Pro lia korupteco la instanco faris decidon haltigi lian funkciadon en la kompanio kaj sendis lin al la rilata departemento por deteno.

Kiam la edzino de G informiĝis pri tio, ŝi falis en konsterniĝon, ne sciante, kion ŝi faros poste. Tuttage ŝi fermis sin en la ĉambro kaj parolis al si mem kun larmo sur la tuta vizaĝo, kvazaŭ freneziĝinta.

Post kelkaj tagoj P, la amiko de G faris viziton al ŝi kun la celo redoni la diamantan ringon al ŝi. Unue ŝi surpriziĝis, kaj poste ŝi turnis sin de plorado al ridado. Ŝi tute ne atendis, ke la diamanta ringo povas reapari antaŭ ŝiaj okuloj. P rakontis al ŝi la epizodon.

Okazis, ke kiam lia familio faris viziton al ŝia familio antaŭ kelkaj tagoj, lia kvinjara filino ĝoje ludis kun ŝia sesjara fileto. Nerimarkite ili ŝteliris en ŝian dormoĉambron. La filino ludis la rolon de novedzino kaj la fileto la rolon de novedzo. Eltirinte la keston ĉe la lit-tableto, li elprenis la diamantan ringon kaj ŝovis ĝin sur ŝian fingron, dirante, ke li amas ŝin por ĉiam. Pro tio la ringo foriris kun la filino kaj restis sur ŝia fingro dum kelkaj tagoj. Kompreneble P kaj lia filino tute ne sciis, kio okazis en la hejmo de lia malnova amiko. P kaj lia edzino admonis ŝin, “Nun la ringo revenas kaj vi povas rapide doni ĝin al lia instanco, tiel ke li povos ricevi malpli severan punon.”

Aŭdinte tion, ŝi esprimis al ili dankemon, dirante, “Mi ne riproĉos mian fileton pro ties scio, kaj mi nur riproĉos mian edzon pro lia avideco!”

Luiza Carol (Israelo)



aŭtorino, Luiza Carol

La ringoleporoj

Hieraŭ oni festis la duan naskiĝtagon de mia nepino, la filino de mia filino Flora. Oni invitis ŝiajn gekuzojn kaj geamiketojn. Entute ses geinfanoj inter 2 kaj 5 jaraĝaj ludis kune sur la tapiŝo kaj ĝuis la hieraŭan eventon.

Flora, mia filino, preparis kelkajn surprizojn por la infanoj. Unu el la surprizoj estis ses boligataj terpomoj, metitajn cirkle sur rondan pleton. Flora skulptis la terpomojn laŭ formoj de leporoj, kun verdaj rondaj okuloj el pizo kaj etaj muzeloj el

olivoj. Ĉiu terpoma leporo havis sur la verto po unu solan longan oreton el folio de pureo, kaj ĉirkaŭ la radiko de ĉiu orelo troviĝis verda ringo el kukumo. Sed la plej mirinda fakto estis tio, ke ĉiu terpoma leporo kurbis sian solan oreton maldekstren kaj enpikis ĝian pinton en la dekstran parton de la oretradiko de sia maldekstra kunulo. Tiamaniere, ĉe la unua rigardo ŝajnis, ke ĉiu leporo havus po 2 orelojn, kvankam sur la pleto troviĝis entute ses leporoj kaj ses lepororeloj.

Jen granda mirindaĵo, kiu emociigis la infanojn kaj ricevis laŭdojn de la plenkreskuloj. Sed verŝajne neniu sentis tiom fortan emocion kiel mi. Mia koro ekbatis forte kiam mi demandis:

- Flora, de kie venis al vi tiu ideo?
- Mi tute ne scias – ŝi respondis.
- Ĉu vi vidis foje ion similan? Ĉu vi eble songis ion similan?
- Mi tute ne scias – ŝi ripetis.

La gastoj ariĝis ĉirkaŭ la pleto kaj komentis laŭte, dum en mian memoron revenis la plej stranga sonĝo de mia ĝisnuna vivo. Ĝi okazis pli ol tridek jarojn antaŭe, sed mi rememoras ĝin tiom klare kaj detale, kvazaŭ nur hieraŭ mi travivis ĝin...

Ofte mi demandis min, ĉu entute temis pri sonĝo, aŭ eble pri unu el tiuj strangaj fabeloj, kiujn Flora kaj mi elpensadis ĉiuvespere antaŭ enlitiĝo, kiam ŝi estis infano. Verdire, ni ambaŭ havis kelkfoje sonĝojn influitajn de niaj fabeloj... kaj aliflanke niaj sonĝoj influis novajn fabelojn, tiel ke ni facile povis konfuziĝi...

Tiutempe ni loĝis en Rumanio, dum la griza historia epoko de “Sekuritate”. Mankis varmo en la domoj, apenaŭ troviĝis manĝaĵoj en vendejoj, la homoj vivis en ĉiutaga vivminaco... Tiam multaj homoj malaperis subite, ĉar oni arestis ilin pro imagitaj kulpoj kaj turmentis ilin en prizonoj. Iliaj najbaroj kaj konatuloj eĉ ne kuraĝis demandi kie troviĝas la malaperintoj. Multaj homoj riskis siajn vivojn provante fuĝi eksterlanden. Kelkfoje la limgardistoj mortigis tiujn ĉe la landlimo. Tamen, multaj sukcesis elmigri kaj kreskigi siajn infanojn en pli normala etoso, en foraj landoj.

En tiu tempo mi estis juna kaj senedziĝinta. La patro de Flora forlasis min por alia virino, kaj ne plu interesiĝis pri mi kaj la infano. Mi estis infanĝardenisto en Bukareŝto kaj alportis mian filinon ĉiutage al la infanĝardeno kie mi laboris. Flora kutimiĝis pri tio, ke mi estas samtempe ŝia patrino kaj ŝia infanĝardenisto. Ŝi iel komprenis, ke mi amas ĉiujn infanojn, tamen neniu tiom multe kiel ŝin. Ŝi sciis ke vespere, kiam ni revenas hejmen, mi apartenas nur al ŝi. Kaj tiam, en nia eta ĉambro, ni elpensis fabelojn kaj songojn nur por ni mem...

Flora estis 6 jaraĝa kiam oni mortigis la fi-diktatoron de Rumanio, kaj finiĝis tiu malbela paĝo en la historio de Eŭropo. Ŝi apenaŭ rememoras ion ajn pri tiu periodo. Ĉu ŝi tamen rememoras... la ringo-leporojn? Ĉu? ...

Jes, iun vesperon vizitis nin kelkaj unuorelaj ringoleporoj, kiuj transdonis al mi nekutiman leteron. Ĝi estis fakte propono de elmigro por mi kaj Flora. Sed ne temis pri alia lando. Temis pri alia dimensio. La ringoleporoj kapablis translokigi nin en paralelan universon. Kiam ili kunigis siajn orelojn, ili realigis inter si iun rondan energikampon, ene de kiu ili povis kunporti homojn kaj aĵojn. La letero parolis pri iu genetikan kodon, kiun la leporoj manipulis laŭinstinkte, sed tiun frazon mi ne komprenis. Ĉiukaze la letero vaporiĝis, dum la leporoj atendis mian reagon. Mi havis konfuzajn sentojn. Mi ja estis dezirinta elmigri se eblus, sed al alia lando, certe ne al alia universo... Mi pensis: “Mi certe songas. Kaj en songo nenio tro grava povas okazi. Kial mi ne akceptu la proponon?”

Mi prenis mian filinon en la brakoj kaj la leporoj ĉirkaŭis nin. Ili kunigis siajn orelojn kaj... en kelkaj sekundoj ni troviĝis en alia mondo, kie atendis nin juna ĉiĉeronino. Laŭ ties klarigoj ni komprenis, ke ni estis sur paralela tergloba, kaj ene de ĝi en paralela Eŭropo, kaj ene de ĝi en paralela Rumanio, kaj ene de ĝi en paralela urbo Bukareŝto.

La konstruaĵoj similis, la parkoj similis, la malnovaj tramoj similis. Nur la homoj malsimilis. La homoj de tiu universo kapablis manipuli genetikajn kodojn, tial ili ĉiuj trapasis simplajn genetikajn operaciojn, kiuj malpliigis draste siajn egoismojn. Fakte, ĉiuj senescepte kapablis ami ĉiujn aliajn tiom multe kiel sin mem. Jen ĉio. En tiu paralela Bukareŝto, la homoj estis same malriĉaj, sed ili kundividis siajn proprajojn egale. Neniu estis pli malriĉa ol siaj najbaroj. La tramoj kaj busoj estis same malnovaj kaj primitivaj. Sed neniu havis sian privatan aŭton. Ene de la malnovaj tramoj, la homoj helpis unujn la aliajn, neniam forpuŝiĝis, neniam sakris, ĉiam protektis maljunulojn, infanojn, gravedajn virinojn... La ĉiĉeronino parolis pri

tre simplaj robotoj, kiuj aŭtomate parigas virojn kaj virinojn. Neniu geedziĝo fiaskis, neniu paro perfidis la geedzan ĵuron. La malnovaj preĝejoj estis malfermitaj tage kaj nokte. La homoj eniris tien ofte, dankante al Dio pro siaj senpekaj vivoj. Ili ne bezonis predikojn, ne bezonis konfesi ion ajn, fakte eĉ ne bezonis pastrojn. Ili nur dankis al Dio pro la vivo, dankis ankaŭ pro la morto, kiun ili ne timis. Manipulante genetikajn kodojn, ili jam sukcesis kuraci ajnajn fizikajn dolorojn. Tial malsanoj ne terurigis ilin. Morto signifis por ili nuran translokiĝon en novan nekonatan dimension, eble malpli enua ol tiu en kiu ili vivis. Ili ne tro bedaŭris la mortojn de siaj familianoj, ĉar ĉiukaze ili amis ĉiujn homojn egale samkiel sin mem, do ne aparte gravis kiu el ili ĵus forlasis la vivon. La artoj malprosperis kaj estis malaperantaj. Ja neniu spertis aliajn emociojn krom la egala amo por ĉiuj. Pri kio do parolu la poemoj? Pri kio oni komponu kantojn? La teatroj kaj koncertsalonoj aliformiĝis en grandaj restoracioj, ĉar nur la kuirado prosperis el ĉiuj artoj. La homoj ŝatis kunmanĝi kaj dume kunbabili. Pri kio ili babilis? Samkiel en nia paralela Bukareŝto: pri elmigrado. Ĉiuj revis elmigri el tiu enua vivo. Sed kien? Kiel? Eblis elmigri nur pere de interkonsento, kiam oni trovis anstataŭiganton el alia dimensio kaj oni interŝanĝis la lokojn.

La ĉiĉeronino kondukis nin al unu el la infanĝardenoj de la urbo. Ĝi similis nian infanĝardenon, sed estis pli granda. Ĝi havis multajn dormoĉambrojn, ĉar la infanoj kutimis tranokti tie. Ili amis la infanĝardenistojn samkiel siajn gepatrojn, do ili ne sopiris reveni hejmen. Fakte ili sopiris pri nenio. Ili emociiĝis pri nenio. Ili kunludis trankvile, sen kvereloj, sen larmoj, sen krioj.

Unu el la knabinoj similis mian filinon. Ŝi rigardis nin scivole, senemocie.

- Tiu ĉi estas mia filino - diris la ĉiĉeronino senemocie. Subite mi ekkonsciis, ke la ĉiĉeronino similis min okulfrape, kvazaŭ ŝi estis mia imago en spegulo. La konstato ŝokis min, ektimigis min. Mi prenis la manon de Flora. Ŝi tremis, ŝia korpo algluiĝis al la mia kaj ŝi flustris:

- Mi volas iri hejmen, panjo...

La ĉiĉeronino rigardis rekte en miajn okulojn kaj demandis:

- Ĉu vi kaj via filino volus interŝanĝi la vivojn kun ni? Ĉu vi pretus vivi ĉi tie anstataŭ ni?

- Mi volas hejmen... - ripetis Flora.

Mi rifuzis la proponon de la ĉiĉeronino rapide, senhezite.

Kaj la sonĝo finiĝis.

Ĉu ĝi estis sonĝo?

Rita Mkrťĵan (Armenio)



Fasko da mikroneveloj

La mondo, kiun ni vidas

Li estis tre aktiva en sociaj retoj. Preskaŭ ĉiutage li verkis, enmetis en sian paĝon poemojn, citaĵojn.

Li priskribis belecon de neĝaj montoj, de sia

aŭtorino, Rita Mkrťĵan

lando, rakontis pri antikvaj memorindaĵoj, pri florantaj arboj printempe, kaj post ĉiuj strofoj legantoj ĝuis belajn fotojn.

Li havis multajn geamikojn, partoprenis en komentojn, rakontis pri sia bonega vivo, pri lando, invitis viziti la urbon, landon.

En tiu tago en la ĉambro iĝis malvarme kaj li alvokis filon fermi la fenestron.

-Verŝajne, hodiaŭ pluvos, mi sentas odoron de aŭtuno, - diris li al filo.

-Ĉu vi diktos al mi novan poemon? - kun kareso en voĉo demandis filo.

-Jes, nepre. Mi "vidas" belegan folifalon en nia ĝardeno.

La filo helpis, ke blinda patro alproksimiĝu kaj sidu apud li ĉe komputilo.

Komenciĝis nova tago de ĉiama, jam kutima vivo.

Amo kaj racio

Amo sidis surtere kaj ploris:

-Mi ne povas forlasi lin, li estas plej bona el ĉiuj.

Racio konvinkas Amon:

-Li ne estas bonkora, liaj sentoj ne estas sinceraj. Vi ne iĝos feliĉa.

-Mi ne imagas mian ekziston sen li, sen liaj amvortoj, promesoj, - kun larmoj respondis la Amo.

Racio brakumis Amon kaj denove klarigis, ke ĉio estas nur promesoj, nur vortoj, kaj enamiĝo diferencas de vera amo.

-Mi vidas lin sen rozaj okulvitroj kaj vidas vian estontecon, - daŭrigis Racio.

Amo iomete trankviliĝis, silentis kaj post ioma tempo kun tremanta voĉo diris:

-Eble vi pravas.

Racio akompanis Amon, eksidis en saman lokon, kaj meditis pri sia unua venko, kiu okazis en la vivo.

En unu neĝa tago

En lernejo, la instruistino donis al ĉiuj taskon skribi ekzercan verkon pri neĝa tago. Peter eksidis ĉe la tablo, antaŭ fenestro en sia ĉambro, kaj malfermis kajeron. Hejmanoj paroladis mallaŭte, ĉar filo preskaŭ neniam sidis por prepari hejmajn taskojn.

Unua frazo jam estis skribita - Neĝas...

Peter spektis belajn neĝerojn kaj imagis, kiel la instruistino laŭdos lin, ĉar li skribos plej bonan verketon, sed, ve, la skribilo “rifuzis” daŭrigi “la vojon”.

Li tre ŝatas vintron, ŝatas, ĉar Meri, lia samklasanino, atentis lin nur kiam li malforte batas ŝin per neĝbuleto. Ŝi ridas kaj diras al li - Peter....

Finon de la frazo li jam ne aŭdas, sufiĉas, ke ŝi alvokas lin laŭ nomo.

Neĝas...

- Kia hela tago, kiel beliĝis arboj, ŝajnas, ke la urbo transformiĝis en iu mistera neĝa regno, - pensis Peter.

Nerimarkeble alproksimiĝis tempo por iri en lernejon.

- Peter, ĉu vi finis skribi hejman taskon, - demandis patrino.

- Jes, vikle respondi Peter kaj fermis la kajeron, kie estis skribita nur unu vorto - Neĝas...

La fortuno

La fortuno ĉiutage lasis sian domon kaj vagante, elektis iun homon kaj alproksimiĝis al li.

Homoj estis diversaĝaj, diverspovaj, sed ĉiam okazas en supro de feliĉo, eĉ se fortuno alvenis por ne tiel longa tempo.

Iam fortuno alproksimiĝis al la homo, kiu sidis sur benko kaj aspektis malfeliĉa. Kiel ekmiris “ŝi”, kiam homo ekstaris kaj rifuzis de “ŝia” alveno kaj helpo.

La fortuno ne havis permeson interparoli kun homoj, tamen demandis lin: “Kial vi returniĝis de mi?”

“Por ricevi prosperon, mi devas esti libera, sed mia vivo dependas de multaj homoj, kaj mi ne povos ĝui la prosperon pro multaj kaŭzoj, pro diversaj cirkostancoj.”

La fortuno silente atentis klarigon de la homo kaj rapidis reveni hejmen. “Ŝi” devis ekscii de siaj majstroj pri venontaga alveno al la homoj.

La fortuno ankaŭ ne estis libera.

Yin Jiaxin (Ĉinio)



aŭtoro, Yin Jiaxin

Fano de ĉina ŝako

En la infanĝardeno Dalin eme ludis neniun ludilon alian ol ludbrikojn. Iun tagon li hazarde vidis skatolon da ŝakpecoj en oficejo de la instruistoj. Li pensis, ke la rondaj kaj plataj pecoj eble estas alitipaj ludbrikoj. Post kiam instruisto diris al li, ke ĝi estas ĉina ŝako, li eke interesiĝis pri ĝi, malgraŭ sia analfabeteco al la ideogramo sur ĉiu ludpeco.

Antaŭ legoscio, Dalin ellernis de sia patro kiel ludi ĉinan ŝakon. Ĉiutage la patro da patro kaj filo faris plurajn partiojn. Dalin progresis en ŝakludo tiel rapide, ke li havis neniun egalulon en la elementa lernejo, kaj eĉ ofte venkis la patron. Li volis ludi ŝakon kun plenkreskuloj en la parko. Sed neniu el ili volis ludi kun li, konsiderante ke ne estas honorinde venki infanon, dume estas hontinda afero eventuale venkiti. En februaro de 2019, la pandemio kovim-19 atakis la tutan mondon, oni devigite restis hejme. Ekde tiam, Dalin komencis serĉi rivalon surrete kaj memstudi iujn manlibrojn de ŝakludo.

En la jaro 2021 Dalin ekvizitis mezlernejon. La gepatroj ne maltrankvilis pri sia filo en la elementa lernejo. Tamen, kiel lernanto de mezlernejo, Dalin havis pezan studtaskon. La gepatroj avertis, ke li ne plu dediĉu tro multe da tempo al ŝakludo. Sed Dalin ne observis la gepatran instrukcion. En la jarfino, la lerneja raporto montris, ke li ne akiris bonajn notojn en sia lernado. Kun indigno la gepatroj riproĉis lin severe.

En la sekvanta semestro, Dalin ankoraŭ agis kiel antaŭe, konservante pasion al ŝakludo.

Iun postagmezon pluvegis. La unua leciono estis sporto, la instruisto lasis la lernantojn sin distri libere en la klasĉambro. Dalin elprenis ŝakon kaj ekludis kun knabo. Sciante ke li estas tre lerta en ŝakludo, kelke da knaboj apude helpis lian rivalon, egale kelkaj kontraŭ unu. Dalin kun plena memfido pensis, ke eĉ pli da knaboj kune ne povos gajni la partion. Baldaŭ, li trovis, ke li ĵus subtaksis la unuiĝintan forton de la knaboj. Ju pli li deziris rapide venki la rivalon, des pli facile li eraris en juĝado. La batalo sur la ŝaktabulo fariĝis pli kaj pli intensa kaj malrapide. Kiam la leciono finiĝis, la partio ankoraŭ ne solviĝis. Dalin komprenis, ke se la ludo daŭrus, ĝi eble finiĝus per egala rezulto. Li ne volis akcepti la fakton, ke li ne venkis

la knabojn. Sidante sur sia loko, li meditis pri ĵusaj eraroj kvazaŭ sorĉite, tiel ke li ne perceptis, ke la dua leciono jam ekiris kaj la ĉefinstruisto paŝis al li.

Laŭ la ordono de la ĉefinstruisto, Dalin petis la patron viziti tiun. Informiĝinte pri lia spiritforesto en leciono pro ŝakludo, la patro elprenis la ledan zonon kaj batis lin furioze, dum la patrino minacis forĵeti lian ŝakon kaj bruligi la manlibrojn. Poste Dalin ne plu aŭdacis ludi ŝakon enlerneje.

Iun jaŭdon, surreta ŝakamiko sendis al li finiĝontan partion por studi. Pripensinte kelktempon, li ne povis eltrovi rimedon por plenumi la partion. Vendredon matene dum leciono, li pretervole ekmemoris la partion kaj ne povis sin deteni ŝtele elpreni la kopion de la partio. Fiksante sia rigardon al la kopio, li dronis en profundan pensadon. Ĉi-foje la ĉefinstruisto ankaŭ trovis lian spiritforeston kaj postulis lin venigi familieŝton.

Dalin ne kuraĝis sciigi al la gepatroj la postulon de la ĉefinstruisto, timante violentan batadon de la patro kaj perejĝon de sia ŝako kaj manlibroj. Li tre ĉagreniĝis. Tagmeze kiam li pasis preter la parko, subite ideo venis en lian kapon. Posttagmeze li kun kuraĝo demandis al la ĉefinstruisto, ĉu li povas venigi sian avon, ĉar la gepatroj estas okupitaj. Jesis la ĉefinstruisto.

Dimanĉe post tagmanĝo, Dalin iris al la sudokcidenta angulo de la parko, kie oni ludas ŝakon. Tiam malmultis ludantoj kaj spektantoj. Li venis al maljunulo, kiu sola sidis antaŭ ŝaktabulo, ŝajne atendante ludanton. Salutinte la maljunulon, li prove demandis: “Ĉu mi rajtas ludi kun vi?”

“Ah, vi kapablas ludi ŝakon, ĉu?” La maljunulo ekgajis kaj aldonis: “Mi donas al vi avantaĝon de unu aŭ du pecoj, ĉu?”

Antaŭe Dalin kelkafoje spektis la maljunulon ludantan kun alia, kaj bone sciis la nivelon de la maljunulo. Li diris: “Ne necesas doni avantaĝon al mi.”

“Haha, vi knabeto estas tre memfida!” La maljunulo ekridis kun intereso.

Dalin enkore asertis, ke li povas facile venki la maljunulon. Tamen li lasis la unuan ludon finiĝi per egalstato. La maljunulo pensis, ke li ne gajnis pro sia subtakso pri la knabeto. Dum la dua partio, li sin koncentris. Dalin intence faris kelkajn perdojn kaj fine malvenkiĝis. La maljunulo en instiga tono konsolis la knabeton: “Mi ne atendis, ke vi estas iom lerta.”

“Sed mi vere deziras vin venki. Ni ludu denove. Se mi malgajnos, vi punos min laŭ via plaĉo.” Dalin faris defion.

La maljunulo incitiĝis kaj ŝercis: “Se vi malgajnos, mi piedbatos vian pugon.”

“Konsentite! Se vi estos venkita, vi devos fari aferon por mi, ĉu bone?”

“Decidite!”

Dum la tria partio, Dalin simulis fari grandajn penojn kaj klopodi tre malfacile antaŭ ol gajni.

Akceptinte sian malvenkon, la maljunulo scivoleme demandis al la knabeto: “Kion vi esperas min fari por vi?”

“Avêĵo, ĉu vi volus helpi min, ŝajnigante vin kiel mian propran avon?” petis Dalin.

“Por kio?”

“Mi studis manlibron de ŝakludo dumlecione, la ĉefinstruisto trafis min kaj postulas renkontiĝi kun mia famiĉestro.”

La maljunulo abrupte ekkomprenis kaj ridete diris: “Ne estas mirinde, ke vi uleto povas ludi tiel bone, vi estas fano de ĉina ŝako!” Li daŭre demandis: “Kial vi ne sciigos al viaj gepatroj?”

“Mi timas ke ili min batos, forĵetos mian ŝakon kaj bruligos la manlibrojn,” diris Dalin en plora tono.

Sekvatage Dalin kondukis la maljunulon al la oficejo de la ĉefinstruisto. Li skrupule frapetis je la pordo kaj laŭte anoncis pri sia veno: “Saluton, sinjorino!”

Depost la pordo venis virina voĉo: “Bonvolu eniri!”

Puŝmalfermite la pordon, ambaŭ eniris la oficejon. La ĉefinstruisto tuj stariĝis renkonte al la maljunulo kaj ĝentile salutis: “Paĉjo, kial vi venis?”

Surprizite kaj perplekse Dalin timide demandis al la ĉefinstruisto: “Ĉu li estas...?”
“...mia bopatro,” respondis la ĉefinstruisto kun serioza mieno.



Yi Shu (1946-)



aŭtorino Yi Shu

Amrilato ekster geedzeco

Mi neniam imagas, ke tia afero okazas al mi.

Dum sesjara geedziĝo Ĝaming estas ne malbona edzo. Almenaŭ mi konsideras, ke li estas tia, ĉar li estas devokonscia, kaj en la familio li estas afabla al ĉiuj anoj kaj traktas niajn du

infanojn bone. Mi ne imagas, ke tia afero okazas al mi, neniam.

Tamen en lia poŝo mi trovis la leteron, kiun knabino skribis al li.

Mi pensis, ke mi ĝin misvidis.

Ĉu eblus? Amletero?

Ĝaming, jam tridekunu-jara, ne plu troviĝas en la aĝo, en kiu li ricevas amleterojn. Mi elprenis lian eŭropstilan pantalonon por lavado, kaj kiel kutime mi fosis en la pantalonaj poŝoj, esperante, ke nenion restu en ili. Tamen mi vidis ĉi tiun leteron.

Mi ĝin malfermis.

Ne decus, ke mi legis lian leteron. Sed ni jam geedziĝas ses jarojn kaj nia pli aĝa filo jam havas kvar kaj duonan jarojn. Ĉu dececo validas?

Vidinte la skribon de la knabino, mi sentis tion stranga. En la letero skribiĝis nur kelkaj mallongaj frazoj:

Ĝaming:

Mi vin amas.

Mi vin amas.

Mi vin amas.

Rozo

datita je la deksepa

La letero estis elsendita antaŭ tri tagoj. Strange, mi ne surpriziĝis, eble pro tio, ke ĝi estas bone skribita. Probable la amletero devas esti aŭdaca, malkaŝema, neflatema kaj senafekta. Kaj plie la manskribo de la letero sin montras nematura, ŝajne skribita de infana mano. La signaturo de la skribinto aspektas granda, kvazaŭ farita sur la dokumento por atesti fakton, indikantan la decidemon “Mi vin amas”.

Se Ĝaming estus instruisto, mi konsiderus, ke ĝi estas majstroverko de lia lernanto. Tamen li laboras en asekur-agentejo jam kvar jarojn.

Kiu estas tiu knabino

Mi ripetfoje rigardis la leteron. Sur la koverto la adreso estas la kompanio, kie Ĝaming laboras, kaj la poŝt-stampo apartenas al ĉi-loka poŝtoŝicejo.

Estas vere romantike, ke ŝi skribis leteron al li en la sama urbo. Malfeliĉe li estas edzigitaj kaj havas du infanojn. Mi subite sentas miajn manojn malvarmaj.

Ĉu mi, tenante geedzecon kun li ses jarojn, ne povus kompariĝi kun tia knabino? Kiom longe li konas ŝin? Ĉu ŝi traktas lin bone?

Mi ne scias.

Mi timas, ke ŝi traktas lin bone, ĉar ŝi skribis tian leteron al li.

Mi ankoraŭ metis la leteron en lian pantalon-poŝon kaj pendis lian pantalonon ankoraŭ sur la seĝapogilon.

Reveninte el la laboro, li diris nenion kaj ankaŭ mi nenion.

Post vespermanĝo li ludis kun du infanoj dum kelka tempo, kaj dormis.

La sekvan tagon, kiam li iris al la oficejo, mi trovis, ke la letero jam malaperis el lia poŝo. Tiam mi eksentis timon.

Kiam okazis ĉi tiu afero? Kiom longe li ĝin kaŝas de mi?

Li ne devus ĝin kaŝi de mi.

Li povus tuj diris al mi, "Mi ne volas vin. Ses-jara geedzeco estas nenio." Li povus diri tion.

Kial li kaŝas de mi tion? Kiel tio komeniĝis? Mi estas tro konfuzmensa. Mi havas grandan kredemon al li kaj mi neniel pensas, ke li povas fari tiaĵon. Mi eĉ ne sonĝis, ke knabino skribis amleteron al li.

Mi scias nenion.

Mi nur scias, ke la knabino nomiĝas Rozo.

Ĝi estas tre oreĵplaĉa nomo.

Mi tristiĝis. Ĉu ŝi estas tre juna, mi timas? Mi jam pli aĝas, sed ĉi tempdaŭron mi pasigis kune kun Ĝaming. Ĉu li ne sciis? Malgraŭ ĉio ni ambaŭ estas geedzoj.

Posttagmeze Ĝaming telefonis al mi, ke li ne revenos hejmen, ĉar kolego invitis lin al manĝo post labortempo. Tia telefonvoko estas tre ordinara kaj mi ne povas izoligi lin de la ekstera mondo. Mi devas lasi lin eliri, ĉu ne? Sed hodiaŭ mi dubas! Ĉu li vere eliri kun sia kolego? Mi ne kredas.

Mi ne povas fari ajnan enketon. Mi nur pensas, kiel aspektas la knabino nomata Rozo. Eble ŝi estas nur dekok-aŭ deknaŭjara? Ĉu Ĝaming trompas ŝin? Mia vizaĝo paliĝas.

Mi iris al la ĉambro, volante malfermi lian tirkeston, sed li jam ŝlosis ĝin. Mi edziniĝis al li jam dum longa tempo, sed li ŝlosas la tirkeston. Kion li volas fari? Miaflanke, mi volas ŝtele malfermi lian tirkeston. Ho, Ĉielo! Kial ni ambaŭ fariĝas tiaj unu kontraŭ la alia? Mi trovis la ŝlosilon, kiu estis jam metita en alia loko por

eventuala uzo. Nun mi malfermas la seruron kaj eltiras la tirkeston. Mi havas multajn aferojn por fari. Mi devus aĉeti legomojn, prepari manĝon, preni pli aĝan filon el la lernejo kaj pli junan filon el la infanvartejo. Sed sidante mi fosas en la tirkesto de la edzo.

Lia tirkesto estis plena de dokumentoj en bonordo. Ĉu li ne povas meti gravajn aĵojn en la hejmo? Mi zorgeme kontrolis ĝin, sed nenio trovita. Mi sentis iom da malespero. Tamen mi naskis iom da konsolo el la streĉiteco.

Iom poste mi vidis adreslibreton kaj mi rapide foliumis. Inter la paĝoj kuŝis paperslipo, sur kiu skribiĝis: Rozo Huang, la dua etaĝo, numero 10, Strato Sunsubiro.

La manskribo mi ne povas forgesi. Ŝia familia nomo estas Huang kaj ŝi loĝas en Strato Sunsubiro. Fine mi sukcesis akiri ŝiajn nomon kaj adreson. Mi ŝlisis la tirkeston.

Mi prenis la du infanojn kaj sendis ilin al la hejmo de ilia avino.

Mi malsatis kaj ĉagreniĝis la tutan vesperon. Ĝaming revenis je la tri kvaronoj post la deka, tre malfrue. Mi rigardis al li. Demetinte la surtuton, li bruligis cigaredon kaj sidiĝis en sofon.

Post momento li demandis, “Kie estas infanoj?” Li ankoraŭ memoras pri la infanoj.

Mi diris, “Mi sendis ilin al la hejmo de ties avino. Morgaŭ estos dimanĉo. Ili sin amuzu tie.”

“Em,” li murmuris.

Post laborhoroj, ĉiam tenante sian buŝon fermita, li spektas televidon dum kelka tempo, sin banas, poste ludas kun la infanoj kelkajn minutojn kaj poste iras dormi. Li aspektas eksterordinare laca. Komence mi pensis, ke lia laboro kaŭzas tion. Sed nun ŝajnas, ke li tediĝas de ĉi tiu familio!

Ĉar li ne eligis sonon, kaj ankaŭ mi ne.

Dimanĉe mi pensis, ke li ne forlasos la hejmon, sed posttagmeze li eliris, pretekstante, ke li rendevuos kun amiko. Mi ne demandis plu, ĉar demandado ne utilis. Se li intence trompas min, ne utilas, kiel ajn mi penas informiĝi de li. Eĉ se mi demandus mil fojojn, li silentigas min per mensogoj.

Mi eltenis.

Mi ne atendis, ke mi povas elteni tiel bone. Mi neniam imagis, ke tiaĵo okazas al mi.

Mi batis tion en mian kapon: numero 10, Strato Sunsubiro, Rozo kun familia nomo Huang. Kiel bela nomo, kaj mi humile nomiĝas Shufen.

Lunde li iris por laboro.

Mi telefonis al li en la kompanio. Lia voĉo iom flegmis. Li demandis, “Kian aferon vi havas? Mi estas okupata!”

Mi diris, “Ĉu mi prenos la infanojn hejmen? Mi volas spekti teatraĵon ĉi vespere.”

Li respondis, “Prenu ilin hejmen do. Ne ĝenu la patrinon per ili. Spektu teatraĵon alian tagon.”

Mi diris, “Okej.” Mi demetis la aŭdilon.

Silente sidante dum kelka tempo, mi eniris la ĉambron por ŝanĝi veston. Mi devus iom plibeligi min, sed ne aspektigi min kiel virinon kun velke flaviĝinta vizaĝo. Mi tamen ne havis bonan humoron.

Mi eliris.

Mi prenis taksion cele al “numero 10, Strato Sunsubiro”.

Jes, mi volis vidis ŝin. Vidi ŝin ne estas malprava, ĉu? Mi volis vidi ŝin aŭ ŝian patrinon. Mi volis babilu.

La taksio atingis Straton Sunsubiro.

Mi trankviliĝis. Strato Sunsubiro estis tiel bela strato kun feniksaj arboj ambaŭflanke. Tiam ruĝaj floroj sin trovis en pompo. La domoj estis eksmodaj kun nur kvar etaĝoj. La malhelaj balkonoj ĉirkaŭiĝis per malvarma vaporo. Mia dorso malsekiĝis de ŝvito. Vidante tiajn domojn, mi eligis spiron de faciliĝo.

La homoj, kiuj loĝas en tiaj domoj, ne devus esti malnoblaj kaj vulgaraj?

Mi supreniris la duan etaĝon laŭ la pura ligna ŝtuparo. Mi premis sonorilon.

Post momento mi refoje premis la sonorilon.

Neniu respondis. Ĉu oni iris al la laboro? Ĝuste tiam la pordo malfermiĝis. Knabino elŝovis la kapon. “Kiu?” ŝi demandis.

Mi rigardis ŝin.

Ŝi havas longajn harojn, malpezajn kaj molajn, malstreĉite falantajn sur la ŝultroj, dum miaj haroj estas jam tonditaj mallonge, oportune por tuja ordigo pro okupiteco pri hejmaj aferoj. Ŝia vizaĝo sin montras ovala, ŝia mentono bele konturiĝas, ŝiaj okuloj brile belas kaj ŝiaj lipoj grase diketas. Ĉu dudektri-jara? Mi pensis. Ŝi ne tiel belas, sed tiom allogas.

Ŝi portis dormorobon, ŝajne ĵus vekiginte.

Ŝi ne similis al Rozo Huang, kiel mi imagis.

“Kiun vi serĉas?” ŝi demandis refoje.

“Fraŭlinon Huang,” mi diris, “fraŭlinon Rozo Huang.”

“Jen mi estas.” Tio staris iom ekster ŝia atendo. “Jen kiu?”

“Mia familia nomo estas Lu,” mi diris.

“Fraŭlino Lu?” ŝi demandis. “Ŝajnas, ke ni renkontiĝis.”

“Sinjorino Lu. Vi povas rifuzi min eniri. Mi estas edzino de Lu Ĝaming.”

Ŝi ŝtoniĝis. Kun unu mano apogita sur la pordokadro, ŝi rigardis al mi. Mi mallevis la kapon. Mi vere surprizis ŝin. Sed ĉu tio donis al mi ĝojon?

Post longa momento ŝi diris, “Bonvole eniru.”

Malferminte la pordon larĝe, ŝi lasis min eniri. Kvankam la domo estis malnova, la malvarma aero el la klimatizilo komfortige ŝvebis. En la salono la kuntiritaj fenestrokurtenoj donis malhelecon. Sur la tablo staris granda vazon da flavaj rozoj, kiuj aligis aromon. Kaj la mebloj estis rafinitaj. Ĝaming ne havas monon kaj lia salajro nur sufiĉas por la hejmaj elspezoj. Eble li ne povas aĉeti ĉi tiun vazo da rozoj. Mi miris, kio lia plaĉas al ŝi.

Li estas nur ordinara viro.

Mi estas tre ordinara virino. Li povas inde preni min kiel sian edzinon. Sed ĉu ŝi? Li ne povas indi je ŝi, mi pensis.

En la dekstra angulo de la salono amasiĝis plene libroj. Ŝi ne estas tia virino, kaj tia virino ne povas ŝati Ĝaming, ĉar li ne estas riĉa.

Tio eble estas la kaŭzo, kial mi liberiĝas de zorgoj pri li. Li tute ne estas tia viro, kiu rajtas ĉasi amatinon ekster geedzeco.

Mi pririgardis la knabinon, kiu estis pli bona kaj matura ol mi imagis.

Ŝi aspektis iom malalte ol mi, aŭ preskaŭ same alta. Li ofte diras, ke mi estas pli peza kaj alta ol li. Ŝi estis svelte maldika. Eĉ ŝia dormorobo ne povis kaŝi ŝiajn belajn liniojn. Ŝi verŝis tason da teo por mi.

Iom klininte mian korpon, mi amare diris, “Mi vin ĝenas.”

Nemirinde tiel bona medio allogis lin. Mi ne riproĉas lin. Tiu ĉi loko similas al paca paradizeto izoligita de la ekstera mondo.

Mi sidis vidalvide kontraŭ ŝi en silento.

Ŝiaj haroj pendis ŝajne ĉie: ĉe la frunto, ĉe la okulanguloj, ĉe la buŝanguloj.

Ŝi abrupte diris, “Sinjorino Lu, vi estas... tre okulplaĉa.”

Mi ŝprucis, “Ne, vi estas ĉarma, vi estas bela knabino.”

Ŝi aldonis, “Ne, mi pensas, ke vi estas bela. Ĝis hodiaŭ mi ne konas vian belecon.”

Ŝi mallevis la kapon, kaj ankaŭ mi.

Mi esploris. Mi demandis ŝin, “Ĉu vi scias, ke li estas edzigita?”

“Jes, dekomence.”

“Sed, kial?” mi demandis.

“Mi enamiĝas al li,” ŝi respondis.

“Sed ĉu la knabinoj, kia vi, povus zorgi pri manko de koramiko?” mi mallaŭte demandis ŝin nekomprene.

“Ĉe la komenco la afero ne estis tia. Mi nur sentis solecon kaj mi volis serĉi kunulon, kiu havas varmajn manojn kaj korpon. Pro tio mi diris al mi, ‘Bone, li estas la ĝusta persono.’ Mi enamiĝis al li. Dekomence mi ne pensis, ke mi enamiĝos al li.”

Ŝi estis tre kvietita.

Dum palpebruma momento mi ankaŭ kvietiĝis.

“Mi scias, ke vi venos,” ŝi diris.

“Pardonon al mi.”

“Ne, ne, estas mi, kiu devas peti pardonon.” Ŝi starigis.

Varmaj manoj? Mi ne scias, ke li havas varmajn manojn. Mi pensas, ke liaj manoj same varmas kiel tiuj de aliaj. Sed ŝi diris, ke li havas tre varmajn manojn.

“Ĉu li... amas vin?” mi demandis.

Turninte la kapon al mi, ŝi ridete diris, “Li diras, ke jes. Sed... mi konsideras, ke jes, mi tamen ne kredas.”

“Kial vi kredas lin?”

“Li ne esprimas tion. Pri la amo mi sciiĝas. Mi tre facile enamiĝas, tre facile. Eĉ mi mem trovas min tre frivola. Se nur li havas varmajn manojn, sed kies manoj estas malvarmaj?” Ŝia rideto turniĝis al amareco.

“Ĉu vi volas, ke li divorcos disde mi?” mi demandis timeme.

“Ne temas pri divorco. Mi nur sentas...ke li ne amas min.”

“Sed kial vi ankoraŭ restas kun vi?” mi demandis.

“Mi jam enamiĝas al li.”

“Li ne indas vian amon. Li estas tre ordinara viro. Tiaj viroj, kia li, troviĝas en ĉiuj oficejoj.”

Ŝi mallevis la kapon, “Eble vi pravas. Tamen mi renkontis lin. En li estas io bona. Por li mi suferis iom multe. Sed tio ne gravas. Li havas siajn avantaĝojn.”

“Ĉu vi volas edziniĝi al li?” mi demandis.

“Kelktempe mi volas. Kiam ĉiuj aliaj ekhavas siajn edzon kaj infanojn, mi ĉiam sentas min tre soleca. Tiam mi volas edziniĝi. Sed mi ne povas edziniĝi al li kaj miaj familianoj ne permesas al mi edziniĝi al li.”

“Kial?”

“Li estas... tre ordinara. Miaj familianoj estas tre elektemaj kaj ili volas, ke mi edziniĝos al sukcesplena persono.” Ŝi ekridetis.

“Sed se vi plu tenas la rilaton kun Ĝaming tiamaniere, kian planon vi havas?” mi demandis kalme.

Mi elmetis serion da demandoj, dum ŝi respondis senĉese.

“Mi ne havas ajnan planon” Ŝi diris, “Malgraŭ ĉio ni devas pasigi la tagojn kaj li donas al mi ĝojon. Mi nur bedaŭras, ke mi ŝtelas la tempon de vi kaj viaj infanoj.”

Mi ekpensis pri nia ĉiutaga vivo kaj lia salajro nur sufiĉa por elspezoj. Pri lia flegmo al mi mi ne retenis amaran ridon. Ĉu li montras tian amon al ni? Eble ĉio, kion li plej amas, estas li mem?

Li estas saĝa.

Subite mi ekpensas, ke li estas saĝa.

Li ne povas divorci disde mi, ĉu necese? Nun li kunas kun Rozo, sen ajna zorgo, kaj jam akiris ĉion ŝian. Se ni divorcus unu de la alia, li edzinigus ŝin. Kiel li povus pariĝi kun ŝi?

Mi timas, ke, se Rozo kunvivus kun li, post unu aŭ du jaroj ŝi fariĝus mi la dua. Li estas prava agi tiamaniere. Ĉe Rozo li ricevas ĝuon—li ne volas ŝian ĉagrenon, sed nur ŝian plezuron. Ĉe mi li ankoraŭ havas familion kaj restas familiestro.

Tio estas duobla perfekteco por li.

Tamen li tiom damaĝas Rozon kaj tiom vundas min.

Jen mi havas! Pro kio mi edziniĝis al tia viro? Sed kiel pri Rozo? Kian eraron ŝi faris? Li utiligas ŝin ĝis ekstrema.

Mi mallevis mian kapon.

“Li ŝatas vin,” mi diris, “mi povas vidi tion en li.”

“Mi pensas, ke jes. Tamen li estas tre bona edzo. Mi volas diri, ke li ĉiam tenas en sia koro la familion, la infanojn kaj vin. Li estas bona edzo. Mi vidis viron dekoble malbonan ol li. Kaj li ĉiam konservas bonajn aferojn de la malnova tempo. Mi tre volas konatiĝi kun vi. Li ofte mencias vin.” Kiel ŝi eltenas tion? Kial tia knabino, kia ŝi, volas kuniĝi kun Ĝaming? Mi vere ne komprenas.

“Vi estas tre bela, kion mi neniel imagas. Mi ne imagas, ke li havas tiel belan edzinon. Mi pensis, ke vi estas malaltulino kun ordinara vizaĝtrajto.”

“Tamen vi estas multe pli bela ol mi,” mi diris elkore.

“Ne, ne, mi ne estas bele konstruita. Mi neniam ŝatas mian vizaĝon.” Ŝi diris, “Bonvole kredu min. Mi ne forrabos de vi Ĝaming-n. Se li forirus de vi, li jam frue forirus.”

Mi diris, “Sed nun kiam li revenas hejmen, ŝajne kiel ekstreme sentiĝinta persono, li ne eligas eĉ unu vorton, kun laca mieno. Kiel ni povos treni nin plu en tia geedzeco?”

“Ĉu eblus tiele?” Rozo rigardis min. “Li sin montras tiom famili-ama. Li amas siajn filojn, dum min...li tute traktas kiel amikino, sed ne kiel virinon. Li ne ŝatas aŭskulti miajn ĝenaĵojn. Ĉiufoje kiam mi elverŝas ion afliktan, li turnas la temon al alia direkto. Tial mi asertas, ke li ne tiom amas min, sed li amas vin.”

“Vi havas tre belan hejmon,” mi diris.

“Mia hejmo?” ŝi ridetis. “Ĝi estas la hejmo de miaj gepatroj. Ili vojaĝas kaj revenos hejmen post du monatoj.”

“Viaj gepatroj certe amas vin,” mi diris.

“Jes, kompreneble. Kiuj gepatroj ne amus siajn gefilojn?” ŝi ridetis. “Ili dorlotas min.”

“Ĉu vi ne timas malesperigi ilin?”

“Mi ne sentas tielon,” ŝi diris. “Se oni enamiĝas al iu, tio ne rilatas al ties kondiĉoj. Postuli de li kondiĉojn neeble signifas amon, ĉu? Estas pure, ke mi enamiĝas al Ĝaming. Fakte mi penas bone ami lin. Miaj gepatroj komprenas tion. Sed ili ne tre ĝojas pro tio. Mi tamen devas havi liberecon ami iun.”

Mi iom kortuŝiĝis. “Por via bono vi devas disiĝi de Ĝaming. KREDU al mi, ke mi eldiras tiujn vortojn el la koro, sed ne el egoisma celo.”

“Mi scias, ke mi devas disiĝi de li, jam frue. Nur...ne tre facilas fari tion.” Ŝi diris, “mi jam elspezis mian amsenton.”

“Vi povas elekti pli bonan viron.”

“En miaj okuloj li estas vere bona viro,” ŝi diris.

Mi sentis tion iom stranga, kaj mi eĉ forgesis tristecon. Li estas bona en ŝiaj okuloj? Mi ĉiam diras, ke li estas bona, ĉar li estas kalkulata kiel devoplenuma edzo. Nun pruviĝas, ke li havas alian virinon, kaj tio estas jam negita.

La knabino nomata Rozo scias la tutan tempon, ke li estas jam edzigitaj kaj li ne portas respondecon al ŝi, sed ŝi eĉ diras, ke li estas bona. Kial? Ŝi aspektas tre saĝa.

“Li nur...ne havas tre grandan idealon, aŭ li iam havis idealon, sed poste li ĝin forlasis. Mi sentas, ke li estas juna. Ĉu vi ne havas la saman senton? Li estas iom infaneca.”

Mi surprizite larĝiĝis miajn okulojn. “Li? Infaneca?” Mi ne povas imagi. Ĉu li estas infaneca? Mi nur sentas, ke li povas spiri, sed sen forto.”

“Ĉu vi ne sentas tion?” ŝi demandas al mi.

“Ne,” mi diris, “tute ne.”

“Ke li tre timas malvarmon, ĉu vi scias? Jes, li timas malvarmon. Mi ofte ŝaltas klimatizilon kaj malvarmo regas en la tuta ĉambro, sed li ne ŝatas, li timas malvarmon.”

Mi diris, “Sed tiu ĉi domo apartenas al viaj gepatroj, kiuj pagas la elektran koston. Kial li malŝatas tion kaj alion? Li ne rajtas diri tion. Li estas absurda viro. Mi nun trovas, ke mi edziniĝis al drola viro.”

“Jen mi donas ĉi rajton al li. Ni... estas amikoj. Li ne bezonas porti respondecon al mi. Mi ne riproĉas lin, de la komenco ĝis la fino, mi ne riproĉas lin. Li ne trompas min. Li traktas min bone.”

“Vi postulas de li tre malalte, ĉar vi posedas bonajn kondiĉojn.”

“Mi nur postulas paron da varmaj manoj, ĉu ŝtelitaj ĉu pruntitaj. Kiam mi dronas en soleco, se iu premas miajn manojn, mi jam sentas kontentecon.”

“Tio estas tre facila,” mi ŝin konsolis.

“Ne facila. Hodiaŭ vi venas, mi ne plu revidos lin. Mi sentos hontemon se mi revidos lin. Kelktempe mi envas vin, ĉar vi posedas lin laŭleĝe, sed mi ne.”

Mi abrupte diris, “Mi divorcos disde li, tiel ke vi povos ekhavi lin. Mi konsideras, ke li ne indas mian eltenadon. De ses jaroj mi faras nenion eraran, kiel ajn forte vi allogas, li ne devas fari tian aferon.”

“Ne, li vin amas.”

“Li ne amas min.” Mi diris, “Kredu min.”

Ŝi mallaŭtigis sian voĉon, “Viroj preskaŭ kondutas tiele, ĉu ne? Mi plejble imagas, ke li estas tre bona.”

“Ĉu estas mi, kiu ruinigas vian revon? Li estas la tipo de tiaj viroj. Tamen li estas bonŝanca renkonti vin. Tio, kion li volis, estas akiri malgrandan profiton el vi.”

“Ne!” ŝi ŝrikis. “Li ne estas tiaspeca viro, tute ne!”

“Ĉu mi devus priskribi lin tiom malbona?” Mi diris al ŝi, “Finfine li estas mia edzo, sed diras, ke ĉiuj viroj samas. Kaj li kompreneble estas tia.”

“Ne divorcu disde li. Mi scias, kiel mi devas agi. Vian familion...mi ne volas subfosi. Poste mi ne lin vidos.”

“La problemo estas, ke ankaŭ mi ne volas lin vidi.” Mi diris, “Mi havas paron da manoj...”

“Ne agu pro mi...”

“Ne pro vi. Mi ĵus vidis klare lian veran vizaĝon. La viro, al kiu mi edziniĝas antaŭ ses jaroj, estas tia viro.”

“Ĉu vi volas divorci disde li?”

“Jes.”

“Fakte preskaŭ ĉiuj viroj pli aŭ malpli samas,” ŝi mallaŭte diris, “Mi ĉiam laŭdas lin pro lia boneco. Vi devas pli multe kompreni lin kaj vi trovos, ke li vere estas bona.”

Mi rikanis.

Ili ĉiam diras, ke ilia edzino ne komprenas ilin.

Ili ĉiam diras ĉi tiujn vortojn.

Mia Ĉielo! Se mi havus kvardek ok horojn ĉiutage, eble mi povus trovi tempon por kompreni lin. Se niaj elspezoj ne estus tiom multaj, eble mia spirito ne estus tiel streĉita kaj mia rideto pliiĝus.

Nia vivo estas vivo, sed ne miraĝo.

Ĉu estas vivo, kiu estas bela? Tamen li kritikis min, ke mi ne komprenas lin.

Mi admiras ŝin.

Sed kion ŝi akiris? Preskaŭ nenion, mi timas. Ĝuste kiel ŝi diris, ŝi akiras nenion alian ol paron da varmaj manoj. Mi volontas cedi lin al ŝi. Tamen iutage ŝi ne sentos, ke liaj manoj estos tiom varmaj ol aliaj.

Ŝi konsideras, ke li estas bona, ĉar ŝi ankoraŭ ne akiras lin.

Kiel longe li kaj mi ne manpremas? Mi ne scias. Kiam li renkontas ŝin, ĉu li ofte prenas ŝian manon? Ĉu antaŭ ŝiaj okuloj li jam fariĝis tute alia persono? Mi ne scias.

Mi nur sentas min laca.

Sesjara geedzeco. La infanoj. Hejmaj aferoj. Tuttagaj lavado, ordigado, legomaĉetado kaj preparado de manĝoj. Mi laciĝas de tiom da aferoj, tiel ke mi ne havas tempon por pripensi aliajn aferojn. Dum lastaj jaroj la nura laŭdo, kiun mi aŭdis, venas eĉ el la buŝo de Rozo. Ŝi diris, “Vi estas tre bela.” Ŝi diris, ke mi estas bela.

Mi ne havas larmon. Divorco ne estas facila afero. Kion ni devas fari pri la du infanoj? Kien loki ilin? Kaj mi? Kiel mi pasigos miajn tagojn poste?

Nun mi povas sensente treni mian vivon. Se okazos ŝanĝo neatendite, mi eble ne povos ĝin elteni. Probable la homa vivo iras tiamaniere.

Mi iom envidas ŝin. Se ŝi diras, ke ŝi forlasas lin, ŝi povas foriri, dum mi ne povas, ĉar mi portas katenon. Tio estas la diferencon inter mi kaj ŝi. Ŝi estas vere libera.

Mi mallaŭtigis mian tonon kaj tre humile demandis, “Ĉu vi... vere ne lin vidos?”

“Jes. Vi povas kredi min. Ami iun celas fari bonon al li, ĉu ne? Mi ne subfosos lian familion.” Ŝi diris, “Mi kredas vin. Vi ne estas banala virino.”

Ŝi mallevis la kapon. Ŝi tre emis mallevi la kapon kaj kuntiri siajn brovojn. Tia esprimo estis tre alloga. Se mi estus Ĝaming, ankaŭ mi ekhavis korinklinon al ŝi, kiu belaspekta kaj korinklinema, petis neniom da altaj postuloj.

Mi eligis suspiron.

Eble mia propono estas bona por ŝi, ĉu ne? Ŝi ne povas edziniĝi al Ĝaming. Eĉ se li ne havus edzinon, li ne povus sin doni al ŝi, ĉar li multe malproksimas de ŝi en ĉiuj flankoj, mi scias.

“Mi volas foriri,” mi diris.

“Pardonon.” Ŝi levis la kapon, kun larmoj sur la tuta vizaĝo.

Mi metis mian manon sur ŝian ŝultron, dirante, “Rozo, ne indas, ke vi faras tion por li.”

Ŝi turnis sian kapon flanken, ne povante kaŝi la tristecon sur la vizaĝo, “Aŭ mi ne indas por li, sed li ne trompas min.”

Mi nereteneble diris, “Kiu trompas la knabinojn kia vi?”

Mi amare ridetis. Mi foriris.

La strato plenis je ardanta sunlumo. Mi diris, ke mia hejmo kaj la ŝia ŝajnas du mondetoj. Mi subite sentis, ke mi ne volas riproĉi Ĝaming, kvankam mi jam diris multajn malbonajn vortojn pri li. Eble ni ambaŭ nin sentas lacaj. Nemirinde, ke li trovas ĉi lokon por ripozeti.

Mi prenis infanojn hejmen kaj preparis manĝon, kaj li revenis kutime post laboro. Mi tenis mian buŝon fermita, sen diri unu vorton. Unu semajnon poste li ne “estis

invitita de kolegoj por manĝo”. Komence li ŝajne perdis la spiriton, kaj mi eĉ vidis lin stari stupore antaŭ la fenestro. Je eksono de la telefonilo li aspektis treege streĉite.

Ĉu ĉion ĉi li faras por Rozo? Mi ne riproĉas lin, ĉar Rozo ja estas aminda knabino. Ankaŭ mi sopiras al ŝi. Eĉ se li elektus ŝin, mi ne povus diri ion. Ŝi vere estas pli bona ol mi. Riproĉinda estas Ĝaming. Vere ŝi ne plu iras vidi lin. Ŝi plenumis, kion ŝi promesis al mi.

Mi sentis iom da hontemo. Mi ne imagas, ke ŝi montras tian sincerecon.

Post du semajnoj li iom post iom iris al la normala stato. Li ofte restas hejme, ludante kun la infanoj, ankoraŭ kiel modela tipo de bona edzo. Mi sentas bedaŭron pri Rozo. Tia malfacile akirebla knabino sopirigas lin dum du semajnoj. Mi kovas neniom da enviemo al ŝi.

Amo estas nur faceto de la vira vivo.

Mi memoras pri ŝia tiutaga vizaĝo plena je larmo. La tutan tempon ŝi laŭdis lin, sed ne diris unu vorton kontraŭ li. Sed kion li faris por ŝi? Li nur prenis ŝin kiel subitan am-aventuron.

Male mi sopiras al ŝi.

Jes, mi sopiradas al ŝi longan longan tempon.

Ŝi estas escepta ino.

Nia hejmo statas tutsame kiel antaŭe. Ĝaming ĉiutage iras al kaj revenas el la laboro kaj prezentas sian salajron al la hejmo. Ĉiutage mi faras la hejmajn aferojn nefinfareblajn. Li eble ne scias, ke mi renkontiĝis kun Rozo.

Mi deziras, ke li ne scios.

Mi plu ŝajnigas min, ke tiu afero neniam okazis. Rozo diris, ke ili kondukis tiele, sed niaflanke ni devas daŭre vivi nian vivon.

elĉinigiŝ Cai Long



desegnita de Paula Adúriz (Hispanio)

Tan Ge

Ponto

Ĉe la aŭroro la pluvo subite intensiĝis, kvazaŭ verŝite per sitejoj.

Blekante, la montdiluvo torentis el la valo senbride kiel grego da timigitaj sovaĝaj ĉevaloj.

La konstruejo surprizite vekigis. La homoj eksaltis el la lito, sed stariĝis en inundakvon. Aŭdiĝis panika ekkrio, kaj tuj poste pli ol cent homoj, interpuŝigante, kuregis suden. Tamen la inundo pli ol du futojn alta jam dancadis sur la vojo. La homoj freneze retrokuregis.

Nek oriente nek okcidente troviĝis vojo. Nur norde estis mallarĝa ligna ponto.

La morto alpremiĝis en la malicaj ridoj de la inundo.

La homoj, stumblante, puŝis sin en la direkto al la ligna ponto.

Ĉe la ligna ponto, en la akvo alta ĝis la femuroj, staris ilia sekretario de la Partia filio, la maljunulo baldaŭ emeritiĝonta.

Kun pluvo fluanta sur la malgrasa vizaĝo, li, monte aplomba, senparole najlis siajn okulojn al la bruanta homamaso.

Haltinte, la homoj rigardis la maljunulon.

Li raŭke kriegis: "La ponto estas streta! Formu vicon kaj ne interpuŝigu! La kompartianoj viciĝu ĉefine!"

"Ankaŭ kompartianoj estas homoj," aŭdiĝis la kriego el inter la homamaso.

"Tio ne estas filmulado!" eĥis alia krio.

"Venu kaj anoncu vin al mi, se vi volus ekŝigi el la Partio!" la maljunulo malvarme diris.

Nenia protesta kriadado plu. Pli ol cent homoj kuregis laŭvice unu post alia preter la maljunulo sur la lignan ponton.

La akvo leviĝis iom post iom alten kaj senskrupule lekadis al homoj la taliojn.

La maljunulo subite etendis sian manon kaj eltiris junulon el la vico, insultante: "Ĉu vi, al la diabloj, ankoraŭ meritas esti kompartiano? Vi foriru la lasta de ĉi tie!" Li furioze muĝis kiel leopardo.

La junulo ĵetis al li koleran ekrigardon kaj tuj iris flanken.

La vico iris en perfekta ordo.

La ligna ponto komencis tremi kaj dolorĝemi.

Fine, kiam la akvo atingis la bruston de la maljunulo, restis nur li kaj la junulo.

La junulo ekpuŝis la maljunulon, dirante: "Vi unue foriru!"

"Ne babilaĉu! Tuj for de ĉi tie!" kriante, li forte puŝis la junulon sur la lignan ponton.

Abrupte, la ligna ponto disfalis kun tondra bruego en la akvon. La junulo estis englutita de la akvo.

La maljunulo ŝajnis kribi ion, tamen, unu subita ondego ankaŭ voris lin.

Regis vasta etendaĵo da akvo.

Kvin tagojn poste la inundo vanuis.

Maljunulino, subtenata de iu je la brako, venis ĉi tien por fari oferadon al du mortintoj — ŝiaj edzo kaj filo.



elĉinigis Pipi (Ĉinio)



desegnita de Paula Adúriz (Hispanio)

Anonimulo

Ordinara civitano

Yang Fang reverkis laŭ la interreta rakonto

Tiun tagon inaŭguriĝis la nove konstruita teatro por infanoj en la urbeto. Vespere la teatro plenis je homaj voĉoj. Plenkreskuloj kondukis infanojn tien por spekti prezentadon. Mirna, la estro de la teatro babilis kun konato ĉe la pordo, kiam fortika mezaĝa viro hasteme aliris. Li estis Ĝoŝi, loka loĝanto de la urbeto. Li diris al la teatrestro, ke la situacio ne estas en bona ordo. Kiam li fumante apud la pordo, li rimarkis, ke ses Vuŝo-aspektaj viroj eniras la teatron unu post alia.

Mirna surpriziĝis, ĉar Vuŝo estas la loko, kie teroristoj tre aktivaj kaj en lastaj jaroj senĉese kaŭzas multe da ĝenaĵoj. Se tio, kion Ĝoŝi diris, estas la vero, plejeble okazos granda teruraĵo ĉi-nokte. Ĝoŝi montris tiujn Vuŝ-anojn sidantajn ĉe la unua vico, “Ŝajnas, ke tiu plejaĝulo, senemocia kaj kvieta, eble estas ilia ĉefo. Ili observas ĉie kaj preparas sin por agi.”

La estro volis alvoki policon, sed Ĝoŝi opiniis, ke malmultas policianoj en la urbeto kaj la speciala taĉmento bezonas longan tempon por atingi ĉi tien. Eĉ se ekzistas danĝero, oni devas preventi la krizon. Post kiam Ĝoŝi informiĝis pri la ĉirkaŭaĵo de la teatro, li ekhavis ideon. Post konsiliĝo Mirna haste faris aranĝojn.

Kiam la prezentado komenciĝis, Ĝoŝi venis al la unua vico de spektantoj kaj diris al la maljunulino sidanta najbare al la Vuŝo-ĉefo, “Sinjorino, la estro jam aranĝis por vi sidlokon en la loĝio sur la dua etaĝo. Post momento la bruo sur la scenejo laŭtiĝos kaj vi ne povas ĝin elteni.” Ŝi sciis, ke sur la tuta dua etaĝo troviĝas loĝioj, kiujn nur honoraj gastoj povas ĝui. Kun dankemo ŝi stariĝis kaj iris malantaŭen.

Foririginte pretekste la maljunulinon, Ĝoŝi tuj sidiĝis sur ŝian sidlokon. Ĉirkaŭrigardante la spektantojn najbarajn, li amike etendis sian manon, “Mi nomiĝas Ĝoŝi, kia estas via honora nomo?” Tiu Vuŝano, turninte sian kapon kaj ekrigardinte lin, diris rigidmiene, “Kalos.” Li ne etendis la manon.

Kun ekrideto Ĝoŝi ree demandis, “Vi ŝajnas alilokano, ĉu? Estas interese, ke vi sola venas al la teatro por infanoj por spekti la prezentadon.” Kalos iom malpacientiĝis, klarigante, ke li venas fari viziton, kaj pro nenio farinda li okaze spektas la prezentadon.

Rigardante en liajn okulojn, Ĝoŝi diris, “Vi ne diras la veron, amiko.”

Radio da konfuziteco fulmis en liaj okuloj. Li demandis, “Kion vi celas?”

Ĝoŝi eksplodis per ridego, “Mi vidas, ke vi portas orelaŭdilojn kaj sub via vesto estas ŝtopita kontraŭkugla veŝto. Eble vi estas soldato, ĉu ne?”

Kalos surpriziĝis, demandante kiel li sciigās pri tio. Ĝoŝi diris, ke li estas amiko de la teatrestro kaj tiu diris al li, ke pro lastatempaj oftaj teruraĵoj la registaro intensigas la kontraŭrimedojn. Hodiaŭ nokte multaj specialaj taĉmentanoj ŝajnigas sin kiel spektantojn en la teatro, tial mi divenas, ke vi estas unu el ili.”

Kun kaŝa surpriziĝo Kalos kontraŭvole balancis la kapon, “Mi ne atendas, ke vi travidis min.” Je lia eldiro Ĝoŝi tuj atestis sian divenadon.

Kiam Kalos streĉite pensis, kiel trakti la situacion, li abrupte sentis, ke pistolo pikas lian talion. Rigardante stupore al Ĝoŝi, li venis al la kompreno, “Do vi estas...”

Ĝoŝi aplombe ekbalancis la kapon, dirante ke li fakte estas la estro de la speciala taĉmento kaj kiam liaj personoj eniris la teatron, ili jam estis sub la gvato.

Ĝoŝi mallaŭte diris, “Bone rigardu la loĝion sur la dua etaĝo.”

Kalos tuj turnis la kapon kaj post zorgema observado li trovis, ke ŝajne en la anguloj de ĉiuj loĝioj sin kaŝas embuskantoj kaj sennombraj mallumaj tubaperturoj de pafiloj svage celas malsupren.

“Solpafistoj celas la kapon de ĉiuj viaj subuloj. Se iu el ili agas malprudente, ili ĉiuj estos pafmortigitaj.”

Kalos ĵetis al li malican ekrigardon kaj mallevinte la kapo, tuj alparolis al la mikrofono ĉe sia kolumo, “Ĉiuj sidu obeeme. Sen mia ordono neniu povus agi.”

Danĝerplena rivalado

Ektrankviliginte sin, Kalos diris memmoke, “Ŝajnas, ke ni troviĝas en la vazego kiel testudoj, sinjoro Ĝoŝi.” Li kompreneble sciis, kion signifas sub la celado de solpafistoj, sed li divenis, ke Ĝoŝi ne kuraĝos ataki sen prudento, ĉar la teatro plenas je famiilestroj kaj infanoj. Se atako okazos, tio kaŭzos neanticipeblan rezulton. Ili ambaŭ rigardis unu al la alia kaj neniu riskis agi laŭvole.

Forpasis sekundoj, minutoj. En la orelaŭdiloj de Kalos sonis panika voĉo de liaj subuloj, “Ĉefo, ekster la teatro ŝajne venas multaj soldatoj de la speciala taĉmento.” Nun li konsciis, ke la interno kaj ekstero jam sin trovas sub la regado de la speciala taĉmento, kaj la antaŭa plano estas malfacile plenumbla.

Tiumomente Ĝoŝi iniciate sugestis, “Mi havas bonan ideon.” Li admonis al Kalos, ke ili forlasu la planon, tiel ke li povos certigi ilian sekuran forlason.

Post kelka pensado Kalos vole nevole konsentis kaj elmetis postulon, ke tiam, kiam la prezentado finiĝos, la geaktorj suriros la scenejon laŭkutime, Ĝoŝi devas surscenigi ilin ambaŭ, tiel ke post kiam liaj subuloj forkuros sekure, li prenos Ĝoŝi kiel ostaĝon por forkuri sub ties kovrado. Ĝoŝi jam divenis lian intencon kaj konsentis senhezite. Li mansignis, ke Mirna alvenu, kaj diris al tiu, kiel agi. Kalos ankaŭ tuj informis siajn kunulojn.

Ĉe finiĝo de la prezentado la anoncistino deklaris, “Nun ni invitu Ĝoŝi-n, amiko de la teatrestro kaj lian amikon sursceniĝi por celebri la sukceson de la prezentado.

Ĝoŝi, demetinte la pistolon, suriris scenejon kune kun Kalos kaj aliĝis al la manklakantaj geaktoroj. Kiel atendite, kiam ili du eniris inter la homgrupon, Ĝoŝi estis premita de la pistolo de Kalos, “Nun mi prizorgu vin, sinjoro Ĝoŝi.” Kiam ĉiuj spektantoj foriris, la kvin Vuŝanoj sidantaj sub la scenejo stariĝis kaj ankaŭ foriris sen ajna vizaĝesprimo.



Aŭdinte el la orelaŭdiloj, ke liaj kunuloj jam forkuris, Kalos tuj levis sian brakon kaj pafis pafon. La geaktoroj, kiuj pretis disiĝi, stupore ŝtoniĝis. Kalos abrupte disŝovis sian eksteran veston kaj montris ringon da dikajo. “Ĉiuj staru ĉeloke kaj ne moviĝu, alie ĉiuj devas morti!” li kriis minace kaj fieraĉe blufis al Ĝoŝi staranta antaŭ si. “Vi jam misvidis. Mi surportas ne kontraŭkuglan veŝton, sed dinamit-veŝton!”

Antaŭ ol li finis sian parolon, Ĝoŝi tuj sin turnis kaj fulme donis al li fortan pugnobaton, kiu falis sur lian vizaĝon. Kalos, ankoraŭ ne reaginte, falis kun kapo malantaŭen sur la teron. Ĝoŝi riskeme sin ĵetis kaj forte premis liajn ambaŭ manojn. La geaktoroj kaptis la ŝancon forkuri. Ĝuste tiam okazis neimagebla afero. Forta bato estis donita sur la postan parton de la cerbo de Ĝoŝi kaj tiu falis sur la teron. Malantaŭ li staris dikega aktoro, kaj svingante pistolon, li signis, ke Mirna en stuporo, kiu staras malproksime, ne moviĝu.

“Vi vivoriska frenezulo!” Kalos ŝancele stariĝis kaj donis fortan piedbaton al Ĝoŝi. Okazis, ke kiam li estis regata de Ĝoŝi sub la scenejo, li jam elpensis la duan planon. Ĉar lia kunulo kaŝas sin inter la geaktoroj, li povos servi kiel lia lasta atuto. Li ne imagis, ke tiu plano estas rompita de Ĝoŝi.

La dikegulo starigis Ĝoŝi kun kapo plene makulita de sango kaj Kalos minacis sinjoron Mirna. Ili kvaropo iris al la enirejo de la teatro.

Elekto de la heroo

Ekster la teatro staris plene armitaj soldatoj de la speciala taĉmento. Vidante, ke tiuj du teroristoj premas sian pistolon al la kapo de ostaĝoj, neniu el ili facilanime atakis. Kalos arogante kriegis, ke li bezonas aŭton por foriri, kaj la taĉmentestro devigite konsentis postulon. Tre rapide la aŭto alvenis. La dikegulo saltis en la

ŝoforan sidlokon, kaj forŝovinte Mirna kaj trenante Ĝoŝi, Kalos sin ŝovis en la malantaŭan sidlokon. Kalos, juĝante, ke Ĝoŝi estas la ĉefo de la speciala taĉmento, kaj se li havas Ĝoŝi en la mano, tiuj soldatoj ne kuraĝas agi kontraŭ ili.

Apenaŭ la aŭto ekveturis, la taĉmentestro ordonis al siaj taĉmentanoj, “Tuj postatingu ilin per aŭto. Se ni ne sukcesos, ni sendos ĝin al la ĉielo per raketpafilo!”

Aŭdinte tion, sinjoro Mirna multe surpriziĝis kaj haste haltigis la taĉmentestron, “Absolute neeble. Ĉu vi ludas ŝerce per la vivo de ostaĝo?”

La taĉmentestro severmiene diris, “En la aŭto vere estas ostaĝo, sed estas ankaŭ terorista ĉefo. Se ni lasus lin foriri, poste pli multaj homoj perdos sian vivon. Ĉu vi komprenas?”

Mirna neniom cedis, “Kvankam Ĝoŝi estas ordinara civitano, li ĵus brave savis kelkcent vivojn en la teatro. Vi estas tre klara pri tio, ĉu ne?”

Baldaŭ la aŭto kuris ekster la urbeton kaj veturis en izolitan vojeton. Kalos ordonis al Ĝoŝi, “Donu al mi vian pistolon.”

Ĝoŝi elpoŝigis ĝin kaj donis ĝin al li. Vidinte ĝin, Kalos ekstuporis, “Vi komandas la taĉmenton. Ĉu vi ludas tiaĵon?”

Ĝoŝi kviete respondis, “Mi ne estas ĉefo, sed nur ordinara civitano.” Kaj li elverŝis la veron.

Tiam li mensoge asertis, ke troviĝas specialaj agentoj, kaj igis Kalos malkaŝi sian identecon, kaj li sukcesis timigi la rivalon per ŝajnigitaj solpafistoj en la loĝioj, kiuj fakte estis laborantoj aranĝitaj de Mirna, kunportantajn rekvizitajn pafilojn. Li ne atendis, ke tio ruinigis la volforton de Kalos, kiu ne nur rezignis la planon pri kidnappado de ostaĝoj, sed ankaŭ ĝisatendis la alvenon de la speciala taĉmento.

Kalos ege koleriĝis pro tio, ke ordinarulo eĉ igis liajn subulojn sentaŭguloj kaj ruinigis la planon zorgeme preparitan de li. Li abrupte levis la pistolon, sed li fine retenis lin, “Mi tre admiras vian kuraĝecon, sed vi devas konduki nin tuj foriri de ĉi tie. Se vi faras artifikon, vi perdos vian vivon, ĉu vi komprenas?” Ĝoŝi ekbalancis sian kapon. Tamen Kalos ankoraŭ restis malklara pri la situacio, “Vi ne kunportis vian infanon, kial vi iris al la teatro por infanoj?” Ĝoŝi eligis elspiron, dirante, ke lia infano jam mortis kaj li iris tien pro sopiro al la infano.

Vidinte, ke Kalos volas pludemandi, Ĝoŝi elverŝis la kaŭzon de la morto de sia fileto.

Okazis, ke tiam lia fileto ludis ekstere de la domo. Neatendite li renkontis du gansteroj venantaj el alia loko. Ili kidnapis lin kaj devigis lin gvidi ilin al la urbeto. Survoje li brave batalis kontraŭ ili kaj fine ili ĉiuj perdis la vivon. Aŭdinte tion, Kalos eksentis miron, “Unu infano povis pereigi du plenkreskulojn. Ja, kia patro, tia filo. Se li ankoraŭ vivus, mi volus pririgardi lin.” Ekskuinte la kapon, Ĝoŝi amare fermis siajn okulojn.

Antaŭe la vojo disfarkiĝis. Ĝoŝi abrupte malfermis siajn okulojn, kaj montrante la forkiĝintan vojeton, dirante, “Rapide veturu tra ĉi vojeton. La dikegulo, vidinte ĉe la vojkruciĝo tabulon kun dikaj literoj “Malpermeso eniri”. Li minace diris, “Ĉu vi volas trompi min? Ĉu malpermesas eniri?”

Ĝoŝi diris, “La vojeta estas tre mallonga. Lastatempe la vojeto estas sub riparado. Se vi volas savi vian vivon, do obeu al mi.”

Kalos fakte ne trankviliĝis pri la ir-reirantaj aŭtoj sur la vojo, kaj li divenis, ke Ĝoŝi ne kuraĝos fari artifikon. Do li ordonis al dikegulo veturigi la aŭton laŭ la vojeto por pririgardi.



La aŭto veturis sur la vojeton. En mallumo ili ne havis klaran vidon. Subite la aŭto malsupren enfalis, ŝajne en ŝlimon kaj malrapide sinkis. Kun surpriziĝego Kalos lumigis la eksteron per poŝlampo. Ĉi tie troviĝis eĉ vasta marĉejo! “Vi bastardo! Mi ne atendas, ke mi fine pereigos en via mano!” li ŝrikis kun koleremo.

Ĝoŝi flegme diris, “Ĉu vi ne volas vidi mian fileton? Ankaŭ mi sopiras al li.” Ŝajne pensante pri alio, li aldonis, “Mi forgesis diri al vi, ke antaŭe mi servis en la speciala taĉmento.” Fininte tion, li trankvile fermis siajn okulojn. Okazis, ke la du gansteroj, kiujn lia fileto renkontis, estis teroristoj devenantaj de Vuŝo. La filo sagace gvidis ilin en la mortigan marĉejon, kiun nur la lokanoj de la urbeto konis. Kaj li, Ĝoŝi ankaŭ finis sian vivon kune kun tiuj teroristoj per la sama maniero.

Kalos malespere hurlis, sed la mallumo voris ĉi ĉion rapide.

Deng Yingxue

Ĉe la fenestro troviĝas pego

Elĉinigiĝis Mandio (Ĉinio)

Post blindiĝo de liaj okuloj, liaj memoroj fariĝis pli kaj pli klaraj kaj freŝaj.

Li ofte pensis pri la printempo, antaŭ kiu lin trafis la okulmalsano. Tiam li estis leganta libron ĉe la tablo. Subite grizbruna birdo alflugis al la fenestro. Starante sur la fenestrobreto, ĝi sagace ĉirkaŭrigardis. Ĝi havis pintan kaj longan bekon, kiu similis al solida ferhoko. La plumoj sur ĝiaj flugiloj kaj vosto kun miksitaj koloroj de nigro kaj blanko impresis bele.

“Kiel aminda birdo!” li senĉese laŭdadis. Li ĝin fikse rigardis sen palpebrumado, tute absorbite, ĝis ĝi forflugis al fruktoĝardeno nemalproksima.

La patrino ridetante diris: “La pego alvenas al nia fruktoĝardeno kiel kuracisto. Ŝajnas, ke ni havos riĉan rikolton ĉijare.”

Ĝis nun tiuj paseoj ankoraŭ ŝvebas antaŭ liaj okuloj, sed la realo jam tute ŝanĝiĝis. Lia mondo disfalis, kaj la pego, kiun li ŝatis, forflugis oni ne scias kien.

Pensante pri tio, li kaŝe faligis larmojn. La patrino sidigis ĉe li senvorte, nur forviŝis liajn larmojn kaj milde glatigis liajn harojn per sia kruda mano.

Iutage, kiam li kuŝis stupore en la lito, subite la patrino gaje diris al li: “La pego alflugis kaj nun ĝi staras sur la fenestrobreto de nia hejmo.”

Li abrupte sidigis. Tio vere estis surprizo, kvazaŭ du malnovaj amikoj renkontiĝus.

Li malaŭte demandis al sia patrino: “Ĉu ĝi estas la sama kiel tiu antaŭe?”

Ŝi duonvoĉe respondis: “Jes, eble ĝi ja estas tiu, kiun ni vidis antaŭe.”

Turninte sian vizaĝon, li penis aŭskulti, sed li aŭdis nenian voĉon.

Ŝi klarigis: “Ĝi ne havas bonan humoron hodiaŭ. Ĝi ne volas kanti.”

Ekde kiam li malsaniĝis, ŝi fariĝis pli kaj pli firma kaj humura. Ŝia spritajo lin amuzis.

La duan tagon li vere aŭdis la pepadon de la pego, kies klaraj kaj melodiaj “Ang-Ang” krioj ankoraŭ sonis ĉe liaj oreloj.

Fakte la krioj de pego estis neniom belsonaj, sed en liaj oreloj tiuj krioj kvazaŭ venis el la ĉielo.

La pego verŝajne konis lian koron, kaj de tempo al tempo flugfalis sur la fenestrobretan kaj kantis por li, kvazaŭ konversaciante kun li. Ĉiufoje, kiam la birdo

alflugis, lia koro pleniĝis je ĝojo. Li imagis, kiel la birdo ĉirkaŭrigardas, starante sur la fenestrobreto: sunlumo disverŝas radiojn sur ĝian korpon, vestante ĝin per orkolora gazo; ĝia akra beko, kune kun la kapo, turniĝas en diversaj direktoj, ŝajne ĝi pretiĝas sin eliri por kuracado en ĉiu momento... Pensante pri tio, li montris delikatan rideton sur la vizaĝo.

Ankaŭ la patrino ŝatis tiun pegon. Ĉiufoje, kiam la birdo alflugis, ŝi sidiĝis silente kontraŭ li, sen diri unu vorton. Li konsideris, ke lia patrino certe stuporiĝas en rigardado al ĝi.

Kiam lia mondo fariĝas pli kaj pli mallarĝa, krom lia patrino akompananta lin, la pego, kiel malnova amiko, des pli sentigis lin tre plezura.

Poste lia patrino kunportis lin ĉien por kuracado, kaj li finfine liberiĝis de blindeco!

Antaŭ liaj okuloj la patrino aspektis multe pli maljuna kaj kaduka ol antaŭe. Ventblovo flirtigis faskon da blankaj haroj al ŝia vizaĝo, kvazaŭ ŝirmante ŝiajn okulojn plenajn je varmaj larmoperloj. Sed ŝiaj larmoj ne povis esti retenitaj kaj falglitis sur ŝia osteca vizaĝo kun feliĉa mieno.

Li prenis la patrinon je la mano, ne povante ekparoli kun retenitaj plorsingultoj.

Kiam li hejmenrevenis, li iris al la fenestro por rigardi, ĉu la pego ankoraŭ troviĝas tie.

Tamen ĉio ekster la fenestro surprizis lin. La antaŭa ĝardeno en pompanta verdaĵo jam malaperis senspuro, kaj anstataŭe staris vico da simplaj kabanjoj el ferplatoj.

“Tiuĵare, kiam vi malsaniĝis, mi forvendis la ĝardenon,” la patrino diris kun granda bedaŭro.

Estis certe, ke ŝi elspezis la monon por kuraci lin. Antaŭe ŝi ĉiam diris al li, ke la mono por kuraci lian malsanon estas la mono, kiun ŝi ŝparis. Tio pruvis, ke ŝi trompis lin. Kaj ankaŭ li naskis dubon, de kie ŝi venigis la pegon.

Kun rideto ŝi diris: “Nenia pego... Por ĝojigi vin mi mem faris inventon: mi aŭdigis sonregistraĵon.

Liaj larmoj malrapide falis. Lia patrino, jam pli ol sesdek-jara, ne estis multe klera. “Aŭdigi sonregistraĵon” eble estis ŝia plej granda inventaĵo dum ŝia tuta vivo.

Li neniam vidas plu tiun pegon, sed en lia koro ĉiam troviĝas unu bela birdo, la birdo kiu estas pentrita per la patrino amo kaj eterne ŝvebas en lia vivo.

Xi Xi (1937-2022)



aŭtorino, Xi Xi

Xi Xi (ŝi ŝi) estas la plunomo de Zhang Yan, kiu naskiĝis en Ŝanhajo, Ĉinio. En 1950 ŝi fiksloĝiĝis en Hongkongo. Ŝi publikigis pli ol tridek librojn inkluzive poemaron, romanojn kaj novelojn. Tiu ĉi novelo estas unu el ŝiaj reprezentaj verkoj.

elĉinigis Jianye Wang (Ĉinio)

Tia fraŭlino, kia mi

Tia fraŭlino, kia mi, fakte ne konvenas teni aman rilaton kun iu ajn. Sed la amsento inter mi kaj Xia (*ŝja*) disvolviĝas arde ĝis hodiaŭ, kio min surprizas. Mi sinkas en tia situacio, el kiu mi ne povas eltiri min, mi pensas, tute pro tio, ke min krule manipulas la sorto, kiun mi ne povas kontraŭstari. Mi aŭdis, ke kiam vi vere amas iun, vi nur kviete sidas ĉe angulo, juĝante, ĉu lia pretervola rideto povas igi vin senti, ke via animo forflugas el la korpo. Al Xia mi vere havas ĝuste tian senton. Tial, kiam li demandis al mi, “Ĉu vi min amas?”, mi esprimis mian senton sen ajna rezervo. Mi ne scipovas protekti min mem. Miaj paroloj kaj kondutoj ĉiam fariĝas la ridindaĵoj de aliuloj. Kiam mi sidis kune kun Xia en la kafejo, mi aspektis tiom ĝoje, sed mia koro plenis je kaŝita ĉagreno, kaj mi fakte ne ĝuis grandan ĝojon, ĉar mi jam antaŭsciis, kien mia sorto kondukos min tute pro mia kulpo. Komence mi ne devus promesi al Xia iri malproksimen por viziti lian amikon, kiu li longe ne vidis, kaj poste mi ne rifuzis al li ofte iri al kinejo. Pri tiuj aferoj mi pentis jam malfrue. Fakte ĉu penti aŭ ne penti, jam ne tiel gravas. Nun sidante ĉe angulo de la kafejo, mi atendas Xia. Mi jam promesis al li, ke mi kuniros kun li viziti mian laborejon. Kaj ĉio finiĝos en tiu momento. Kiam mi konatiĝis kun Xia, mi jam diplomiĝis el la lernejo longan tempon. Al lia demando “Ĉu vi havas laboron?” mi respondis, ke mi jam laboras multajn jarojn.

“Kian laboron vi havas?” li demandis.

“Fari ŝminkadon por aliaj homoj,” mi diris.

“Ha, ŝminkado,” li diris.

“Sed via vizaĝo estas simple neŝminkita,” li diris.

Li diris, ke li ne ŝatas la ŝminkitajn fraŭlinojn, sed senornamajn vizaĝojn. Pro tio li rimarkis mian vizaĝon sen ajna ŝminko. Mi pensis, ke ne mia respondo al lia demando alportas asociadon, sed mia vizaĝo estas pli pala ol tiu de ordinaraj homoj, kaj ankaŭ miaj manoj. Miaj vizaĝo kaj manoj aspektas pli pale ol tiuj de ordinaraj homoj. Tio estas la rezulto kaŭzita de mia laboro. Mi scias, ke kiam mi eldiros la laboron, kiun mi faras, Xia, kiel miaj antaŭaj amikoj, rekte komprenos, kion mi volas diri. En lia imago mia laboro estas plibeligi la vizaĝon de aliaj virinoj: ekz. por la novedzino, kiu aperos kun beligita vizaĝo en geedziĝa ceremonio. Kiam mi diris al li, ke mi ne havas feriojn kaj eĉ en dimanĉoj mi estas multokupita, li kredis, tio estas vera, ĉar en ferioj kaj dimanĉoj troviĝas tiom da novedzinoj. Sed mia laboro ne estas ŝminki novedzinojn. Mi vere faras lastan ornamon por tiuj homoj, kiuj jam perdis sian vivon, por ke ili je la foriro de la homa mondo aspektu trankvile kaj milde. En la pasintaj tagoj mi menciis mian okupon al miaj amikoj. Kiam ili havis iom da miskompreno, mi tuj faris ĝustigon kaj klarigon, lasante al ili ekscii, kia homo mi estas. Tamen nia honesteco perdigis al mi preskaŭ ĉiujn amikojn kaj mi fortimigis ilin. Ŝajnis, ke mi, sidanta kaj trinkanta kafon kontraŭ ili, estis timiga fantomo. Mi ne riproĉas ilin, ĉar oni havas primitivan timon al la mistero nekonebla en nia vivo. Kiam mi respondis al Xia la demandon, mi ne faris klarigon, unue pro tio, ke li surpriziĝos kaj panikiĝos pro mia laboro, kaj mi ne devus plu maltrankviligi la amikojn ĉirkaŭ mi pro mia stranga laboro, kio estas nepardonebla por mi, due pro tio, ke mi estas mallerta esprimi mian pensojn kaj mi emas teni min silenta dum longa tempo.

“Sed via vizaĝo restas tiom nature simpla,” li diris.

Kiam Xia diris tion, mi jam sciis, ke tio estas la omeno sur la vojo de la sento inter ni. Tamen tiam Xia estis tiom ĝoja pro tio, ke mi estas fraŭlino, kiu ne sin ŝminkas, sed mia koro plenis je ĉagreno. Mi ne scias, kiu estos la persono, kiu ŝminkos min en la mondo. Ĉu estas la onklino Yifen? Kiel ŝi, ni ambaŭ havas la komunan deziron, ke dum niaj vivantaj jaroj ni ne ŝminkos niajn plej proksimajn karulojn. Mi ne sciis, kial post apero de la omeno mi ankoraŭ ofte daŭre promenadas kun Xia. Eble kiel homo, mi ne havas povon min regi kaj fine paŝon post paŝo suriras la vojon, kiun la sorto diktas al mi. Fakte mi mem ne povas fari racian klarigon pri miaj diversaj agoj. Ĉu la homo ne kondutas tiele? Multe da homaj kondutoj estas absurdaj.

“Ĉu mi povus viziti vian laborejon?” li demandis.

“Devus ne problemo ekzistas,” mi respondis.

“Ĉu ili sin ĝenas pri tio?” li demandis.

“Neniu, mi timas,” mi diris.

Li diris, ke li volas vidi mian laboron, ĉar matene tiun dimanĉon mi devis iri al mia laborejo, dum li ne havis ajnan aferon por fari tiun tagon. Li diris, ke li volontos akompani min al mia laborejo. Do ĉar li jam restos tie, kial ne ĉirkaŭvidi dum kelka tempo? Li diris, ke li volas vidi la vigligan scenon de novelzinoj kaj tiuj fraŭlinoj, kiuj edziniĝos al la foro, kaj kiel mi beligos ilin kiel florojn kaj kiel mi turnos malbelulinojn belaj, mi konsentis senhezite. Mi scias, ke la sorto jam alportis min al la blanka linio de la komenco, kio estas destinita okazi. Pro tio mi atendas lian alvenon en malgranda kafejo. Kaj poste ni kune iros al mia laborejo kaj ĉio klariĝos. Tiam li ekscios, ke la parfumaodoro, kiun li konsideris, ke mi aspergas speciale por li, fakte estas laodoro de antisepta likvaĵo alkroĉanta al mia korpo, kaj ankaŭ ke mi ofte surportas blankan veston, ne pro tio, ke mi speciale ĉasas purecon en aspekto, sed pro tio, ke oportunas por mi en- kaj eliras mian laborejon. Laodoro de medicina likvaĵo fiksita sur mia korpo jam penetriĝis en miajn ostojn. Mi iam uzis diversajn metodojn por forlavi ĝin, sed mi ne sukcesis ĝin forigi, kaj fine mi ne plu klopodis fari tion. Mi jam kutimas flari tiun specialan odoron. Dume Xia sciis nenion pri ĝi. Li iam diris al mi, kian unikan parfumon vi uzas! Sed baldaŭ ĉio venos sub la lumon. Mi estas teknikistino, kiu povas fari elegantan hararanĝon kaj nodi belan kravaton. Tamen ĉi ĉio ne helpas. Miaj manoj pritondis harojn kaj barbojn de multaj silentemuloj kaj aranĝis la kravat-nodon sur ilia solena kaj serioza kolo. Ĉu li povus toleri, ke miaj manoj tondu liajn harojn, aŭ ke mi zorgeme nodu kravaton por li? Tiu ĉi paro da manoj origine estis varmaj, sed en oniaj okuloj ili jam fariĝas malvarmaj, kaj origine ili povis brakumi novnaskiton, sed en oniaj okuloj ili jam fariĝas blankaj ostoj karesantajn skeletojn. Onklino Yifen, kiu incis ĉi teknikon al mi, havis multajn motivojn, kiujn oni povas diveni el ŝiaj paroloj en ĉiutaga vivo. Jes, ĝi estas tekniko, kun kiu oni ne timas senlaborecon dum la tuta vivo kaj povas gajni abundajn enspezojn. La fraŭlino, kia mi, kiu ne bone scipovas legi kun malalta klereco, ne havas kapablon konkuri kun aliaj en ĉi tiu vorema kaj tiranema mondo, ĉu? Onklino Yifen lernigis al mi sian unikan teknikon, tute pro tio ke mi estas ŝia sanga nevino. Dum ŝi laboris, ŝi neniam lasis aliajn viziti ŝin, ĝis kiam mi estis akceptita de ŝi kiel ŝia adepto, ŝi lasis al mi strikte sekvi ŝin kaj lerni de ŝi iom post iom, ne sentante timon eĉ antaŭ la nudaj kaj glacifridaj kadavroj. Eĉ tiujn dispecigitajn korpohartojn kaj krevintajn kraniojn mi jam ellernis kiel kunigi kaj kunfliki, kvazaŭ kudrante teatran kostumon. Mi denaske perdis la hepatrojn, kaj la onklino plenkreskigis min. Estas strange, ke mi iom post iom fariĝas simila al ŝi: ŝiaj silentemo, palaj manoj malrapidema irmaniero. Kelktempe mi eĉ dubas, ĉu mi estas mia memo, aŭ mi estas alia onklino Yifen, kaj ni ambaŭ fakte estas unu persono. Mi estas la kontinueco de mia onklino Yifen.

“De nun vi ne plu zorgas pri vestoj kaj manĝaĵoj,” diris la onklo Yifen.

“Kaj vi ne plu, kiel aliaj fraŭlinoj, vivas depende de la aliaj,” ŝi aldonis.

Fakte pri ŝiaj eldiroj mi ne komprenas, kion ŝi volis diri. Mi ne scias, kiel mi ellernis de ŝi ĉi tiun teknikon, tiel ke mi ne zorgas pri vestoj kaj manĝaĵoj nek vivas depende de la aliaj. Ĉu ekzistas aliaj okupoj, kiuj povus igi, ke mi ne zorgas pri vestoj kaj manĝaĵoj nek vivas depende la aliaj? Tamen mi estas fraŭlino, kiu havas preskaŭ neniom da klereco, kaj en ĉi tiu mondo mi ne povus konkuri kun aliaj fraŭlinoj. Do pro tio mia onklino lernigis al mi tiun specialan teknikon tute por mia bono. Fakte, kiuj homoj, ĉu malriĉuloj aŭ riĉuloj, ĉu altranguloj aŭ almozetantoj en la urbo ne bezonus nian helpon? Se nur la mano de la sorto alportas ilin ĉi tien, ni estas ilia lasta balzamo kaj ni igas, ke ilia vizaĝo aspektas tiom trankvila, kvieta kaj milda. Mi kaj onklino Yifen havas propran deziron. Krom nia propra deziro, ni havas komunan deziron, ke ni ne faru ŝminkadon por niaj plej proksimaj karuloj dum niaj vivantaj jaroj. Do en la lasta semajno mi dronis en granda tristeco kaj mi malklare sentis, ke io ĉagreniga okazis. Tio okazis al mia juna frato. Laŭ mia scio, mia frato konatiĝis kun bela kaj bontemperamenta fraŭlino kun elstaraj vizaĝtraĵoj kaj talento. Ili ĝoje rilatis unu al la alia. Mi pensis, ke tio estas ĝojiga kaj feliĉa afero. Tamen la ĝojo alvenis tro rapide. Baldaŭ mi sciigis, ke tiu fraŭlino senkaŭze edziniĝis al la viro, kiun ŝi ne amas. Kial du geamantoj ne povas geedziĝi, sed devigite sopiri unu al la alia dum la tuta vivo? Mia juna frato fariĝis tute alia homo. Li iam diris, ke li ne volas vivi plu. Mi ne sciis, kion fari. Ĉu mi faros ŝminkadon eĉ por mia juna frato?

“Mi ne volas vivi plu,” diris mia juna frato.

Mi kaj mia frato tute ne komprenis, kial la afero evoluis en tian situacion. Se ŝi dirus, “Mi ne vin ŝatas plu”, la juna frato havus nenion por respondi. Sed ili ambaŭ vere amas unu la alian nek pro sent-rekompenco nek pro financa problemo. En ĉi tiu civilize moderna socio, ĉu ankoraŭ ekzistas tiaj fraŭlinoj, kiajn la gepatroj devigas edziniĝi? Kial ili klinas sian kapon al la sorto dum la longlonga vivo? Ve, mi deziras, ke mi ne faru ŝminkadon por miaj plej intimaj karuloj. Sed kiu povas certiĝi pri tio?

Kiam Onklino Yifen oficiale akceptis min kiel sian adepton kaj komencis lernigi al mi sian unikan teknikon, ŝi diris, ke mi devas sekvi ŝiajn jenajn vortojn, alie ŝi ne akceptas min kiel sian adepton. Mi ne sciis, kial ŝi diris tion tiom senŝerce. Ŝi diris serioze, ke kiam ŝi kuŝos, mi devos fari ŝminkadon por ŝi persone, ne lasante iun ajn fremdulon tuŝi ŝian korpon. Mi ne trovis tion malfacila, sed nur miris pri ŝia insistemo. Se mi kuŝos, kian rilaton havos mi mem kaj mia korpo? Tamen tio estas la privata deziro de la onklino, mi certe helpas al ŝi realigi ĝin, se mi nur povos travivi ĝin la konvena tago. Dum la longa vivvojo mi kaj mia onklino same ne havas ambician deziron. La onklino esperas, ke mi estu ŝia ŝminkistino, dum mi nur esperas, ke pere de mia lerteco kreos “la plej trankvilan mortinton, kiu estos pli milda kaj egalanima ol la aliaj mortintoj, kvazaŭ morto vere estus la plej bona ripozo en

paco. Fakte se mi vere sukcesos, tio nur estos ludo por pasigi la tempon, kiam mi enuos en la homa mondo. Ĉu ĉio en la mondo ne havas signifon? Kaj mia klopodo estos vana. Se mi kreos “la plej trankvilan mortinton”, ĉu mi esperas gajni premion? La mortinto estas senscia, kaj la familianoj de la mortinto ne scias pri la klopodado, kiun mi faras sur la mortinto. Krome mi ne okazigas ekspozicion por paradi, lasante al la publiko eniri por distingi bonajn ŝminkistojn disde la malbonaj, aŭ konstati la novigojn en ilia laboro, kaj des malpli, ke oni faras komentojn, komparojn, studojn kaj okazigas seminarion pri diversaj ŝminkadoj sur la mortintoj. Ĝi estas nur speco de ludo en mia malgranda ĉelo. Sed kial mi esprimas mian deziron? Probable ĝi estas movforto puŝi mian plulaboron. Mia laboro estas soleca kaj izolita, ĝi havas nek rivalojn nek spektantojn, des pli sen manklakadoj. Kiam mi laboras, mi aŭdas nur mian mallaŭtan spiradon. La ĉambro plenas je viraj kaj virinaj mortintoj kaj regas mia sola mallaŭta spirado. Mi eĉ povas senti, ke mia koro tristas aŭ lamentas. Kiam la koro de la aliaj ĉesas lamenti, mia koro batas multe pli sonore.

Hieraŭ kiam mi pretis fari ŝminkado por paro de gejunuloj, kiuj mortigis sin pro amo, gapante al la vizaĝo de la dormanta junulo, mi tuj sentis, ke li estas ĝuste la tipo por mi krei “la plej trankvilan mortinton”. Kun fermitaj okuloj kaj malfirme fermita buŝo, kaj kun malklara cikatro sur sia frunto, li dormis tiel, kiel li vere dormas en trankvileco. Dum ĉi tiuj multaj jaroj mi ŝminkis milojn da vizaĝoj, multaj el kiuj portis tristan mienon kaj plejparto de kiuj estis feroca torditaj. Al tiuj vizaĝesprimoj mi faris plej konvenajn ĝustigojn per riparado kaj beligo, tiel ke ili fariĝis senlime mildaj. Sed la vizaĝo de tiu junulo, kiun mi renkontis hieraŭ, havis nedireblan trankvilecon. Ĉu lia sinmortigo estas ĝojiga afero? Tamen mi ne kredis tiun mienon, kaj mi konsideris, ke lia ago estas ekstreme poltrona. Tiu, kiu ne havas kuraĝon kontraŭstari la sorton, ne meritis radion da mia atentemo. Pro tio mi forigis la ideon krei “la plej trankvilan mortinton” kaj rifuzis fari ŝminkadon por li. Mi transdonis lin kaj lian fraŭlinon, kiu stulte cedis al sia sorto, al la onklino, ke ŝi bonigos iliajn vangojn brulvunditajn pro trinkado de forta venena likvaĵo.

Neniu ne scias la paseon de la onklino, ĉar kelkaj propraokule vidis la scenon. Tiam la juna onklino emis kanti dum laborado kaj alparoli la mortintojn kuŝantajn antaŭ si, kvazaŭ ili estus ŝiaj amikoj. Sed poste okazis, ke ŝi fariĝis silentema. Ŝi kutimas diri ĉiujn vortojn, kiujn ŝi kaŝas en la koro, al tiuj amikoj peze dormantaj. Ŝi neniam skribas taglibron kaj tiuj vortoj parolitaj de ŝi estas paĝoj de taglibro. Tiuj peze dormantaj antaŭ ŝi estas la plej fidelaj aŭskultantoj de la homaro, kiuj povas aŭskulti al ŝia detala rakontado dum longa tempo, kaj ili ankaŭ estas unuaklasaj konservantoj de sekreto. Ŝi emis rakonti al ili, kiel ŝi konatiĝis kun viro, kun kiu, kiel aliaj geamantoj, ŝi ĝuis tiom da ĝojo, kaj okaze ŝi pasigis la tagojn jen malproksimajn jen interrompitajn jen serenajn jen nebulajn. Tiam unu fojon en ĉiu semajno ŝi iris al

beligejo lerni ŝminkadon senhalte eĉ spite ventpluvon. Ŝi preskaŭ ellernis la teknikojn de ĉiuj instruantoj, kaj kiam la instanco de la lernejo informis al ŝi, ke nenio indas ŝian plustudadon, ŝi persistis iri tien por scii, ĉu instruantoj havas ion novan por lernigi al ŝi. Ŝi ŝajne denaske interesiĝis pri ŝminkado tiel intense, ke ŝiaj amikoj ĉiuj konsideris, ke ŝi poste funkciigos grandan beligejon. Sed ŝi ne faris tion, kaj ŝi dediĉe aplikis kion ŝi lernis al la korpoj de tiuj peze dormantoj antaŭ si. Pri tiuj aferoj ŝia amanto sciis nenion, ĉiam pensante, ke ŝi preferas nur ŝminkadon. Ĝis tiu tago, kiam ŝi kondukis lin al sia laborejo kaj montrante unu mortinton apude, ŝi diris al li, ke ĝi estas tre forlasita kaj soleca laboro, ke en la mondo ekzistas tia loko, kie ne troviĝas pravoj kaj malpravoj nek disputoj pro enviemo, malamo kaj famo, kaj ke kiam ili falas en la mallumon, ili ĉiuj fariĝas trankvilaj kaj mildaj, li ekhavis panikon, ĉar li neniam imagis, ke tia fraŭlino eĉ okupiĝas pri tia okupo. Jes, li amis ŝin kaj volis fari ĉion por ŝi. Li ĵuris, ke kie ajn li ne forlasos ŝin kaj ilia amo certe daŭros ĝis iliaj haroj blankiĝos. Tamen antaŭ grupo da mortintoj ne povantaj paroli nek kapablantaj spiri lia kuraĝeco tute malaperis. Li eligis laŭtajn kriojn kaj turninte sin, forkuris rapide. Li puŝmalfermis ĉiujn pordojn panike sur la tuta vojo sub la vido de multaj homoj. Poste la onklino neniam vidis lin plu. Oni nur aŭdis, ke ŝi sola en la ĉelo parolas al siaj silentemaj amikoj, ĉu li diris, ke li amas min, ĉu li diris, ke li neniam forlasos min, kaj kial li panikiĝis. Poste la onklino iom post iom silentemiĝis, aŭ pro tio, ke la vortoj, kiujn ŝi volas diri, jam findiritaj, aŭ pro tio, ke ne necesas por ŝi ripeti tiun rakonton, kiun ŝiaj silentemaj amikoj jam scias. Kelkaj vortoj vere nenecese ripetiĝos. Kiam ŝi lerniĝis al mi sian teknikon, ŝi rakontis al mi siajn paseojn. Ŝi elektis min, sed ne mian fraton. Kvankam kuŝis kaŭzo alia en tio, tamen la ĉefa motivo estis, ke mi ne estas timemulino.

“Ĉu vi timas?” ŝi demandis.

“Mi ne timas,” mi respondis.

“Ĉu vi estas poltrona?” ŝi demandis.

“Ne,” mi respondis.

Pro mia netimemo la onklino elektis min kiel sian daŭriganton. Ŝi havis antaŭsenton, ke mia sorto samas kun la ŝia. Ni eĉ ne povis klarigi, kial ni ambaŭ iom post iom similiĝis unu al la alia. La komenca kialo estis, ke ni ambaŭ ne havis senton de timo kaj neniom da poltroneco. Tiam kiam ŝi rakontis al mi siajn paseojn, ŝi diris, ke en la mondo certe ekzistas tiaj homoj, kiaj ni, kiu ne timas. Tiutempe ŝi ankoraŭ ne iris ĝis la grado de tuta silentemo. Ŝi lasis min stari apude por vidi, kiel ŝi ruĝiĝas per ruĝo la obstinan buŝon kaj longe karesas longe malfermitan okulon por paciĝi. Tiun tempon ŝi ankoraŭ intermite alparolis la grupon da peze dormantaj amikoj: kaj vi, kial vi timas? kial la geamantoj ne havas tiom da fidemo nek kuraĝon. Inter ŝiaj peze dormantaj amikoj ne malmultis malkuraĝaj kaj malfortaj uloj, kiuj des pli

dronis en silento. La onklino vere sciis kelkajn rakontojn de sia amikoj. Iufoje pudrante inon kun buklo da haroj ĉe la frunto, ŝi diris, “Ve, kiel malforta virino ŝi estas. Por fariĝi nominale bela kaj sindonema filino, ŝi eĉ forlasis sian amaton. La onklino sciis, ke ĉi virino faris tion por rekompenci la favoron kaj tiu virino cedis al la sorto, kaj ili ĉiuj senhelpe donis sin al la sorto, kvazaŭ ili ne estus vivanta homoj kun pensoj kaj emocioj, sed pecoj de varo.

“Ĝi estas timiga laboro,” diris miaj amikoj.

“Ĉu fari ŝminkadon al mortintoj? Mia Ĉielo!” diris miaj amikoj.

Mi ne timis, sed miaj amikoj timis. Ili ne ŝatis miajn okulojn, kiuj ofte rigardas la okulojn de la mortintoj, nek miajn manojn, kiuj ofte karesas la manojn de la mortintoj. Komence ili nur ne ŝatis, sed poste ili ekhavis timon. Kaj plie ili komence ne ŝatis kaj timis miajn okulojn kaj manojn, kaj poste tiaj maŝato kaj timo etendiĝis al mia tuta korpo. Mi vidis ilin foriri de mi, kvazaŭ bestoj evitus ardanta fajro kaj kampuloj trafus aron da flugantaj lokustoj. Mi demandis, “Kial vi timas? En ĉi tiu mondo estas iuj homoj, kiuj devas fari tion. Ĉu mi laboras nebone aŭ ne plenumas mian devon? Tamen mi iom post iom kontentiĝas pri mia nuna stato kaj mi jam kutimas esti en soleco. Estas multaj homoj, kiuj ĉasas varman kaj dolĉan okupon, kaj ili ĉiam ŝatas stelojn kaj florojn. Sed kiel oni povas sin montras firma en paŝado inter la steloj kaj floroj? Nun mi havas preskaŭ neniun amikon. Ili sentas el mia mano malproksiman kaj profundan landon kaj fridecon, kaj ili vidas el miaj okuloj sennombrajn silentemajn flosantajn reaperojn. Pro tio ili eksentas timon. Eĉ se miaj manoj estas varmaj, miaj okuloj povas larmi kaj mia koro ardas, ili ne povas returni sian kapon al mi. Mi ankaŭ komencis, kiel la onklino, prenas tiujn peze dormantajn mortintojn kiel miajn amikojn. Mi sentas tion stranga, ke mi eĉ diras al ili en treega kvieteco, “Ĉu vi scias, ke morgaŭ matene mi kondukos amikon kun familia nomo Xia ĉi tien por viziti vin. Xia iam demandis, ‘Ĉu ili prenas tion serioze?’ Mi diris, ke vi ne. Ĉu vi vere ne prenas tion serioze? Morgaŭ Xia venos ĉi tien. Mi pensas, ke mi scias, kia rezulto min atendas, ĉar mia sorto jam kunfandiĝis kun tiu de Onklino Yifen. Mi pensas, ke mi vidos, kiel aspektos Xia en paniko, kiam li eniros ĉi tien. Ve, ni uzas malsamajn manierojn igi la alian perdi la animon. Pri tio mi ne panikiĝos. Mi jam scias, el diversaj antaŭsignoj, la finan scenon. Xia diris, ‘Via vizaĝo estas pure simpla.’ Jes, tamen la pure simpla vizaĝo ne havas forton igi al iu kuraĝe fronti ĉion sen ajna timo.”

Mi volis konverti min al alia okupo. Ĉu mi ne povas fari aliajn okupojn kiel aliaj fraŭlinoj? Kvankam mi ne havas povon fariĝi instruistino, flegistino, sekretariino aŭ skribistino en la oficejo, ĉu mi ne povas servi kiel vendistino en vendejo, vendi panon en bakejo aŭ eĉ dungigi kiel servistinon por fari purigon? Tiaj inoj, kia mi, postulas nur manĝaĵon kaj loĝadon ĉiutage, ĉu mi ne povas trovi lokon, kiu apartenas

al mi? Por honeste diri, pere de mia lerteco de ŝminkado, mi vere povas fariĝi la ŝminkistino por tiuj novedzinoj. Tamen mi ne povas imagi, ke kiam mi ŝmiras ruĵon sur la lipojn kaj ili subite krevas al rideto, kian penson mi eknaskos? Multe da rememoroj igas, ke mi povas plenumi ĉi taskon, kiu tre konvenas al mi. Do, se mi turnus min al alia okupo, ĉu miaj palaj manoj kaj vizaĝo povus ŝanĝi sian koloron, la odoro sur mia tuta korpo, kiu jam penetris en miajn ostojn povus tute malaperi? En tiu tempo, ĉu mi devus tute kaŝi de Xia mian nunan laboron? Kaŝi la paseojn de nia proksima karulo estas malfidela afero. En la mondo ankoraŭ estas multaj inoj, kiuj kaŝas siajn jam perdiĝintajn virgecon kaj vane pasigitajn jarojn. Mi malestimas ilin. Mi certe diros al Xia, ke dum mia longatempa laborado mi senescepte ŝminkas la peze dormantajn mortintojn. Kaj li devas koni en mi tian junulinon: mia korpo ne odoras je unika parfumo, sed je antisepta likvaĵo; mi ofte min vestas blanke ne por starigi al mi puran profilon, sed pro tio, ke vestite tiel, mi povas oportune eniri mian laborejon. Tamen tio estas nur gutoj da marakvo. Kiam Xia scios, ke miaj manoj longatempе tuŝadas tiujn peze dormantajn mortintojn, ĉu li volontos, prenante min je la mano, transsalti la rojon kun torenta fluo? Ĉu li volontos lasi min tondi al li harojn kaj nodi lian kravaton? Ĉu li eltenos, ke mia rigardo fiksiĝas sur lia vizaĝo? Ĉu li havos nenian heziton kuŝigi sin antaŭ mi? Mi pensas, ke li ekhavos timon, grandan timon, ĝuste kiel miaj tiuj amikoj: komence ili surpriziĝis, poste ne ŝatis min, kaj fine pro timo turnis de mi sian vizaĝon. Onklino Yifen diris, ke se oni vere amas unu la alian, kion alian ili timas? Sed mi scias, ke la amo por multaj homoj aspektas firma kaj persistema supraĵe, sed fakte ekstreme fragila kaj malforta. Pufanta kuraĝo estas nur pakpapiro de bombono. La onklino diris, ke eble Xia ne estas timemulo. Tial mi ne faras plupaŝan klarigon al mia okupo. Kompreneble la alia kialo estas, ke mi ne lertas en esprimado pri mi mem. Eble pro mia malbona esprimado aŭ mia misa elektado de medio, klimato, tempo aŭ temperaturo tio ŝanĝus kion mi volas esprimi. Tio, ke mi ne klarigas al li, ke mi ne faras ŝminkadon al novedzinoj, prezentas al li provon. Mi volas observi kiel li reagis al tiuj, kiujn mi beligas. Se li timos, do li vere timos. Se li tuj forkuros, svingante siajn piedojn, do mi alparolos al miaj peze dormantaj amikoj, ke nenio okazis.

“Ĉu mi povus vidi, kiel vi laboras?” li demandis.

“Devas esti, ke ne ekzistas problemo,” mi respondis.

Jen kial mi nun sidas por atendi alvenon de Xia ĉe angulo de la kafejo. Mi iam sammomente kiel nun zorgeme pripensis, ke tio kion mi faris, ne estas justa al li. Se li sentas timon pro mia okupo, kian kulpon li havus? Kial li estas postulata esti tre kuraĝa? Kial ies timo al la mortinto devas esti ligita al la poltroneco en la amo? Ili eble estas tute senrilataj aferoj. Kiam mi estis tre juna, mia gepatroj jam forpasis. Mi kaj mia plijuna frato, du georfoj, plenkreskis sub la flegado de mia onklino. Mi scias

tre malmulte pri la deveno kaj paseoj de miaj gepatroj. Ĉion, kion mi scias nun, la onklino diris al mi. En mia memoro ŝi diris al mi, ke mia patro okupiĝis pri ŝminkado al la mortintoj, kaj poste li edzinigis mian patrinon. Kiam li pretis geedziĝi kun ŝi, li demandis al ŝi, “Ĉu vi timas?” Ŝi diris, ke ne. Mi pensas, ke mi ne timas, eble pro tio, ke mi similas al mia patrino kaj en mia korpo fluas ŝia sango. La onklino diris, ke mia patrino ĉiam vivas en ŝia memoro, ĉar ŝi diris, ke pro amo ŝi ne timas. Eble jes. Mi jam ne povas memori ŝiajn figuron kaj voĉon, sed ŝi ankaŭ vivas eterne en mia malklara memoro. Mi pensas, ke se mia patrino diris, ke pro amo ŝi ne timas, ĉar ŝi estas mia patrino. Mi ne povas min pravigi postuli al ĉiuj en la mondo tia, kia ŝi. Aŭ mi devas riproĉi, ke mi denaske akceptis tian sorton. Mi okupiĝas pri tia neeltenebliga laboro. Kiuj viroj ne ŝatas tiujn mildajn, varmajn kaj dolĉajn inojn, kiuj devas okupiĝi pri intima, delikata kaj eleganta laboro. Sed mia laboro estas malvarma, makabra kaj viglomanka. Mi pensas, ke mi jam involviĝas en tia nebuleca etoso. Do pro kio la viro brila kiel la suno edziĝos al tia sombra ino? Kiam li kuŝos apud ŝi, ĉu li ne pensas, ke ŝi ofte kunas kun kadavroj? Kiam ŝia manoj tuŝos lian haŭton, ĉu tio pensigos lin, ke ili estas paro da manoj longatempes karesantaj la mortintojn? Ho ve, tia fraŭlino, kia mi, ne taŭgas por esti amrilata al iu ajn. Mi certas, ke mi kaŭzas ĉiajn misojn, kaj mi devas forlasi ĉi tien kaj reiris al mia laborejo, tiel ke ne plu ekzistas Xia, kiun mi konas, kaj li forgesos konatiĝi kun ino, kia mi, kiu faras ŝminkadon por novedzinoj. Tamen ĉio estas tro malfrua. Tra vitro mi vidas lin aliranta de la kontraŭa flanko de la vojo. Kion li prenas en siaj brakoj? Devas esti granda bukedo da belaj floroj. Kiu dato estas hodiaŭ? Ĉu naskiĝtago de iu? Mi rigardas lin eniri tra la pordo de la kafejo. Li trovas min sidanta en malhela angulo. Ekstere estas sunplena vetero. Li alportas la sunlumon, ĉar lia blanka ĉemizo rebrilas sub sunlumo. Li similas al sia nomo, ĉiam en somero (*Xia* signifas “someron” en la ĉina—trad.).

“Haj, ĝojan dimanĉon!” li salutis.

“Mi donacas ĉi ĉiujn florojn al vi,” li diris.

Li vere estas gaja. Li sidigas por trinki kafon. Ni havis multajn gajajn tagojn. Tamen kio estas gajo? Gajo ĉiam forpasas rapide. Mi kovas ĉagrenon en la koro. Ni nur bezonas tri cent paŝojn por iri de ĉi tie al mia laborejo. Poste, kiel okazis la afero antaŭ multaj jaroj, panikiĝinta viro fluge elkuros el la pordo kaj ĉiuj scivolaj okuloj sekvos lin ĝis li malaperos el la vido. La onklino diris, ke en ĉi mondo vere ekzistas brava kaj sentima viro. Tamen, mi scias, ke ĝi estas nur supozo. Kiam Xia aliris de la kontraŭa flanko de la strato kun granda florbukedo en la brakoj, mi sciis, ke tio estas malfavora omeno. Ho ve, tia fraŭlino, kia mi, ne taŭgas por mergiĝi en amrilato, aŭ mi devas diri al miaj peze dormantaj amikoj: ni ĉiuj estas samaj, ĉu ne? Kelkdek jaroj estas nur palpebruma daŭro. Por kia ajn kaŭzo, ne necesas por neniu eskapi panike pro iu. La granda bukedo da floroj, tre belaj, kaj li estas gaja, dum mi afliktiĝas. Li vere ne scias, ke en nia rondo floroj signifas adiaŭadon.

Fratoj Grimm



Fratoj Grimm

Avantaĝa negoco

Kampanano pelis sian bovinon sur la foirplacon kaj vendis ĝin por sep taleroj. Hejmirante, li devis preteriri lagon. Jen li aŭdis jam el malproksime kiel krias la ranoj. „Ŭok, ŭok, ŭok.“

„Jes ja“, li parolis al si mem: „Ili krias eĉ en kampo avena. Estas sep, kiujn mi elaĉetis, ne ok.“ Kiam li proksimiĝis al la akvo, li vokis al ili: „Stulta bruto! Ĉu vi ne scias tion pli bone? Sep da taleroj estas, kaj ne ok.“

Sed la ranoj plu kvakis: „Ŭok, ŭok, ŭok.“

„Nu, se vi ne volas akcepti tion, mi povas rekalkuli ilin al vi.“ Li prenis la monerojn el poŝo kaj nombris la sep talerojn, ĉiam po dudek kvar groŝoj por unu talero. Sed la ranoj ne interesiĝis pri lia nombrado kaj kriis denove: „Ŭok, ŭok, ŭok, ŭok.“


„He“, kriis la kampanano tute kolere, se vi volas scii tion pli bone ol mi, nomburu ilin mem“. Kaj li ĵetis la monon per unu fojo en la akvon. Li atendis starante ĝis la finnombrado kaj la redono de la groŝoj. Sed la ranoj obstinis pri sia opinio kaj kriis seninterrompe: „Ŭok, ŭok, ŭok, ŭok“ kaj ili ankaŭ ne reĵetis la monon el la lago. Li ankoraŭ atendis dum sufiĉe longa tempo, ĝis kiam ekvesperiĝis kaj li devis iri hejmen. Li insultis la ranojn kriante: „Aĉaj akvodululoj, fi-obstinuloj, gapuloj, grandan buŝegon vi havas kaj vi povas kriegi, ke la oreloj de la aŭdantoj ekdoloras, sed sep talerojn vi ne povas kunnombri. Ĉu vi eble pensas, ke mi starados ĉi tie, ĝis kiam vi estos pretaj?“

Dirinte tion, li foriris, sed la ranoj kvakis ankoraŭ: „Ŭok, ŭok, ŭok“. Tial li tre ĉagreniĝis, irante hejmen.

Post kelke da tempo li elmarĉandis denove bovinon, li buĉis ĝin kaj faris la kalkuladon, ke tiukaze, se li vendos la karnon avantaĝe, li ricevos tiom da mono, kiom valoras la du bovinoj, kaj ke li havos la haŭton eĉ aldone. Kiam li atingis kun la karno la urbon, jam kunkuris antaŭ la pordego tuta gregoj de hundoj; antaŭe kuris granda leporhundo, kiu saltadis ĉirkaŭ la karno kaj flaradis kaj bojis: „Boj, boj, boj!“

Kiam li tute ne volis ĉesi boji, parolis la kampanano al li: „Jes, ja, mi rimarkas certe, ke vi bojas, ĉar vi postulas ion de la karno. Jen mi ja mokon rikoltus, se mi

donus la karnon al vi.“



La hundo respondis nur: „Boj, boj!“

„Ĉu vi eble eĉ formanĝos la karnon, por esti rekonata ĉe viaj kamaradoj?“

„Boj, boj!“, parolis la hundo.

„Nu, se vi obstinas pri tio, mi lasos

la karnon al vi, mi ja bone konas vin kaj mi scias, ĉe kiu vi servas. Sed tion mi diras al vi, dum paso de tri tagoj mi devos ricevi la monon, alie vi suferos. Vi havas fakte nur la eblon porti ĝin al mi.“

Poste li demetis la viandon kaj reiris hejmen. La hundoj ĵetis sin sur la karnon kaj bojis laŭte: „Boj, boj!“

La kamparano, kiu aŭdis tion malproksime, parolis al si: „Aŭskultu, nun ili ĉiuj postulas ion de ĝi, sed la granda hundo devos pagi al mi.“

Kiam tri tagoj jam pasis, pensis la kamparano: „Hodiaŭ vespere mi havos la monon enpoŝe“. Kaj li estis plena de plezuro. Sed neniu iris al li por pagi la karnon.

„Oni ne plu povas fidi al iu ajn“, li diris, kaj fine lia pacienco finiĝis. Li iris en la urbon kaj repostulis la monon de la viandisto. La viandisto supozis, ke temas pri ŝerco.

Sed la kamparano diris: „Tute sen ŝerco, mi volas rehavi mian monon. La granda hundo portis la tutan buĉitan bovinon al vi antaŭ tri tagoj, ĉu ne?“

Jen la viandisto ekkoleriĝis, prenis balailstangon kaj pelis lin eksteren.

„Atendu“, parolis la kamparano, „ekzistas ankoraŭ justeco en la mondo!“ Tial li iris en la reĝan kastelon kaj petis pri aŭdienco. Oni kondukis lin antaŭ la reĝon. La reĝo sidis apud sia filino kaj demandis lin, kiu sufero okazis al li.

„Ah“, diris la kamparano, „la ranoj kaj la hundoj forprenis mian monon kaj la viandisto pagis min pro tio per bastono.“ Kaj li rakontis detale, kiel tio okazis.

Pri tio la reĝidino devis laŭte ridi, kaj la reĝo parolis al li: „Pravigi vin mi ne povas pri tiu kazo, sed por tio vi rajtos edzinigi mian filinon. Dum sia tuta vivo ŝi ankoraŭ ne ridis, ĝis nun, krom ĵus pri vi. Kaj mi promesis ŝin al tiu, kiu kapablas ridigi ŝin. Danku Dion pro via bonŝanco.“

„Ho“, respondis la kamparano, „mi tute ne volas havi ŝin, mi havas hejme nur unu edzinon, kaj tiu estas jam tro multe por mi, kiam mi revenas hejmen, mi sentas kvazaŭ starus en ĉiu angulo unu edzino. Jen la reĝo koleriĝis kaj diris: „Vi estas krudulo.“

„Ah, reĝo mia“, respondis la kamparano, „kion atendi de bovo alian krom bovajo?!“

„Atendu“, respondis la reĝo, „vi ricevu alian pagon. Nun foriĝu, sed post tri tagoj revenu. Tiam vi ricevos kvincent.“

Kiam la kamparano paŝis antaŭ la pordegon, parolis la pordogardisto: „Vi ridigis la reĝinan filinon, tial vi certe ricevos rekompencan grandaniman.“

„Jes, certe“, respondis la kamparano, kvincent mi ricevos.“

„Aŭskultu!“ parolis la soldato, „donu iom de ĝi al mi, „kion vi povus fari kun tiom da mono?“

„Ĉar estas vi“, parolis la kamparano, „vi ricevu ducent, anonciĝu post tri tagoj ĉe la reĝo kaj elpagigu ilin.“

Judo, kiu staris proksime kaj aŭskultis la interparoladon, postkuris la kamparanon, retenis lin ĉe la jako kaj diris: „Miraklo dia! Kia bonŝanculo vi estas! Mi ŝanĝos la monon por vi, mi volas ŝanĝi ĝin al malpli valoraj ŝanĝmoneroj, kion vi volas fari kun la duraj taleroj, ĉu?“

„Trompa judĉjo!“ diris la kamparano, „trident vi ankoraŭ povos ricevi, donu la sumon tuj kiel moneretojn al mi. Post tri tagoj oni repagos ilin al vi ĉe la reĝo.“

La judo ĝojis pri la profiteto kaj alportis la sumon el aĉaj groŝoj al li. Estis groŝoj, el kiuj tri validis tiom, kiom du plenvoloraj. Post paso de la tri tagoj iris la kamparano laŭ la ordono de la reĝo al li.

„Detiru lian jakon“, parolis la reĝo, „li ricevu la kvincent.“

„Aĥ“, diris la kamparano, „ili ne plu apartenas al mi. Ducent da ili mi fordonacis al la pordegogardisto kaj trident transŝanĝis la judo al mi. Do, laŭjure mi posedas nenion de la sumo.“

Dum tio enpaŝis la soldato kaj la judo, ĉiu el ili postulis sian parton, kiun ili laŭdire forĝajnis de la kamparano. Ili ricevis siajn batojn laŭ la ĝusta mezuro. La soldato eltenis la batojn pacience, ĉar li jam sciis, kiel tio sentiĝas. Sed la judo lamentegis kaj kriis: „Aĥ, ho ve, ĉu tio estas la duraj taleroj?“

La reĝo devis ridi pri la kamparano, kaj ĉar lia tuta kolero estis for, li parolis: „Ĉar vi jam perdis vian rekompencan antaŭ ol vi ricevis ĝin, mi donos al vi anstataŭaĵon, iru en mian trezorejon kaj prenu al vi tiom da mono, kiom vi deziras.“

La kamparano ne atendis, ĝis kiam la reĝo ripetis ĝin je dua fojo, kaj plenigis siajn vastajn poŝojn tiom, kiom eblis. Poste li iris en tavernon kaj nombris sian monon. La judo ŝtelire sekvis lin kaj aŭdis, kiel li grumble murmuris al si: „Nun la reĝo, tiu fripono, tamen trompis min! Ĉu li ne povis doni la monon mem al mi, tiukaze mi sciis, kion mi havas, kiel mi nun sciis, ĉu ĝi estas la ĝusta sumo, kiun mi enpoŝigis hazarde bonŝance!“

„Gardu ĝin Dio!“ parolis la judo al si mem, „li parolas malrespekte pri nia reĝo, mi kuros al li kaj flustros tion, tiel mi ricevos rekompencan kaj lin oni eĉ punos krome.“

Aŭskultinte pri la diroj de la kamparano, la reĝo ekkoleriĝis kaj ordonis, ke la judo iru al la kamparano kaj alkonduku la pekinton. La judo kuris al la kamparano: „Vi iru al nia mastro, al la reĝo, tuj, sen jako kaj pako.“

„Mi scias pli bone, kio decas“, respondis la kamparano, unue mi ordonos al la tajloro, ke li faru novan kostumon al mi, ĉu vi pensas, ke viro, kiu havas tiom da mono enpoŝe, iru al la reĝo kun malnovaj ĉifonaj vestoj?“

La judo, kiam li vidis, ke la kamparano ne estis forkondukebla sen la nova kostumo, ektimis perdi sian pagon, se finiĝus la kolero de la reĝo, kaj la kamparano restus sen puno.

Tial li diris: „Mi pruntedonos al vi por la mallonga tempo belan kostumon, nur pro amikeco. Ĉion eblan faras ja la homo, nur pro amo!“

La kamparano akceptis tion, surmetis la kostumon de la judo kaj foriris kun li. La reĝo riproĉis la kamparanon pro ties fiaj diroj, kiujn la judo denunciis.

„Ah“, parolis la kamparano, „tion, kion diras judo, estas ĉiam mensogo, tiaj uloj ne elbuŝigas veran vorton. Tiu ulo ĉi tie kapablas aserti, ke mi surhavas lian kostumon.“

„Kion tio signifas?“ kriis la judo, „ĉu la kostumo ne estas mia? Ĉu mi ne pruntedonis ĝin al vi pro pura amikeco, por ke vi povu paŝi antaŭ nian mastron, la reĝon?“

Kiam la reĝo aŭskultis tion, li parolis: „Jun la judo certe trompis, aŭ min aŭ la kamparanon“, kaj li ordonis ankoraŭ kelkajn pliajn „durajn talerojn“ al li. Sed la kamparano iris hejmen en sia altkvalita kostumo kaj kun konsiderinda monsumo enpoŝe kaj diris: „Ĉifoje mi trafis la celon.“

Originalo: Der gute Handel

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj,

Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Der gute Handel“

Stranga muzikisto

Estis iam stranga muzikisto, kiu iris tute sola tra arbaro kaj cerbumadis. Kaj kiam nenio postrestis por pensi, li diris al si mem: „La tempo en la arbaro fariĝas pli kaj pli enua. Mi alkondukos bonan kunulon.“

Li prenis la violonon de la dorso kaj violonis tiom laŭte, ke la sonoj penetris de arbo al arbo. Ne daŭris longan tempon ĝis kiam aperis trotanta lupo en la arbustoj.

„Ah, lupo venas! Tiun mi ne sopiras“, diris la muzikisto.

Sed la lupo paŝis al li kaj diris: „Ha, kara muzikisto, kiel bele vi violonas! Tion ankaŭ mi dezirus lerni.“

„Tion vi lernos rapide“, respondis la muzikisto, „vi devos nur fari ĉion, kion mi ordonos.“

„Ho, muzikisto“, diris la lupo, „mi ja obeos al vi tiel, kiel lernanto sian majstron.“

La muzikisto ordonis al ĝi kuniri, kaj kiam ili jam iris iom sur la vojo, ili atingis

malnovan kverkon, kiu estis interne malplena kaj en la mezo disfendita.

„Rigardu ĉi tien“, diris la muzikisto, „se vi volas lerni violoni, tiukaze metu la antaŭpiedojn en tiun ĉi fendon. La lupo obeis, sed la muzikisto rapide levis ŝtonon kaj per unu bato tiom firmpinĉis ambaŭ piedojn, ke la lupo devis kuŝi kiel kaptito.

„Atendu tiom longan tempon, ĝis kiam mi revenos“, diris la muzikisto kaj foriris.

Post certa tempo li parolis je dua fojo al si mem: „La tempo en la arbaro fariĝas pli kaj pli enua, mi volas alkonduki alian kunulon“, li prenis sian violonon kaj denove ludis tiel, ke la sonoj penetris de arbo al arbo. Ne daŭris longan tempon, ĝis kiam proksimiĝis ŝtelire vulpo inter la arboj.

„Ah, vulpo venas“, diris la muzikisto. „Tiun mi ne sopiras.“

La vulpo paŝis al li kaj diris: „Ha, kara muzikisto, kiel bele vi violonas. Tion deziras lerni ankaŭ mi.“

„Tion vi lernos rapide“, respondis la muzikisto, „vi devos nur fari ĉion, kion mi ordonos.“

„Ho, muzikisto, „respondis la vulpo, „mi obeos vin tiel, kiel lernanto sian majstron.“

„Sekvu min“, diris la muzikisto, kaj kiam ili iris dum iom da tempo sur la vojo, ili venis al pado, je kies ambaŭ flankoj staris altaj arbustoj.

Tie la muzikisto haltis, kurbigis je unu flanko avelan arbedon teren kaj tretis per piedo sur la pinton, poste li kurbigis ankaŭ arbeton de la alia flanko teren kaj diris: „Ek do, vulpĉjo, se vi deziras lerni ion, etendu vian maldekstran antaŭpiedon al mi.“

La vulpo obeis kaj la muzikisto ligis ĝian piedon al la maldekstra trunko.

„Vulpĉjo“, li diris, „nun etendu la dekstran piedon al mi.“ Tiun li ligis al la dekstra trunko. Kaj kontrolinte, ĉu la nodoj de la ŝnuroj estas ankaŭ sufiĉe firmaj, li lasis eksalti la arbedojn kaj ili kurbigis supren, kaj dum tio ili rapide levis la vulpon tiel, ke ĝi ŝvebis enaere kaj baraktiĝis.



„Atendu tie tiom longan tempon, ĝis kiam mi revenos“, diris la muzikisto kaj foriris.

Denove li parolis al si mem: „La tempo en la arbaro fariĝas pli kaj pli enua, mi volas alkonduki alian kunulon“. Li prenis sian violonon kaj la sonoj penetris de arbo al arbo. Jen alsaltadis leporeto.

„Ah, leporeto venas!“ diris la muzikisto, „tiun mi ne volas havi.“

„Ha, kara muzikisto, „diris la leporeto, „kiel bele vi violonas. Tion deziras lerni ankaŭ mi.“

„Tion vi lernos rapide“, respondis la muzikisto, „vi devos fari nur ĉion, kion mi ordonos.“

„Ho, muzikisto, „respondis la leporo, „mi obeos vin tiel, kiel lernanto sian majstron.“

Ili iris iom plu sur la vojo, ĝis kiam ili atingis en la arbaro senarbejon, kie staris trema popolo, la muzikisto ligis longan ŝnureton ĉirkaŭ la kolon de la leporeto, kies alian finaĵon li ligis al la tremanta popolo.

„Viglu, leporeto, saltu nun dudekfoje ĉirkaŭ la arbon“, kriis la muzikisto kaj la

leporeto obeis, kaj kiam ĝi jam kuris dudekfoje ĉirkaŭ la trunkon, la ŝnureto volviĝis dudekfoje ĉirkaŭ ĝi kaj la leporeto estis kaptita. Kaj ĝi povis tiri kaj tiradi tiom, kiom ĝi kapablis, tio premis nur pli la ŝnureton en la molan kolon.

„Atendu tie tiom longan tempon, ĝis kiam mi revenos“, diris la muzikisto kaj iris plu.

La lupo intertempe moviĝadis kaj tiradis, mordis la ŝtonon kaj tiom longan tempon prilaboris la ŝtonon, ĝis kiam ĝi eltiris kaj liberigis la piedojn el la fendo. Plena de kolero ĝi persekutis ekscitite la muzikiston kaj volis disŝiri lin.

Kiam la vulpo vidis kuri lin, ĝi komencis lamenti kaj kriis laŭte: „Frato lupo, helpu al mi, la muzikisto trompis min.“

La lupo tiris la arbetojn malsupren, tramordis la ŝnuretojn kaj liberigis la vulpon, kiu iris kun ĝi por venĝi sin je la muzikisto. Ili trovis la firmligitan leporeton, ankaŭ ĝin ili liberigis, kaj poste ili ĉiuj serĉis la malamikon.

La muzikisto survoje ankoraŭfoje eksonigis sian violonon, kaj ĉifoje li estis pli bonŝanca. La sonoj penetris ĝis la oreloj de malriĉa lignohakisto, kiu baldaŭ, ĉu li volis, ĉu ne, interrompis la laboron kaj kun la hakilo ĉebrake proksimiĝis por aŭskulti la muzikon.

„Fine venas tamen la ĝusta kunulo“, diris la muzikisto, „ĉar mi serĉis homon kaj ne sovaĝajn bestojn.“

Kaj li komencis ludi tiel bele kaj kordisŝire, ke la malriĉa viro staris kvazaŭ ensorĉita, kaj ke lia koro ekfrapis pro ĝojo. Kaj kiam li staris tiel, alvenis la lupo, la vulpo kaj la leporeto. Kaj la viro rimarkis tuj, ke ili havis malican intencon. Tial li levis sian briltreman hakilon kaj starigis sin antaŭ la muzikisto, kvazaŭ li volus diri: „Kiu intencas tuŝi lin, vin gardu, ĝi havos problemon kun mi.“

La bestoj ektimis kaj forkuris en la arbaron, sed la muzikisto ankoraŭfoje dankeme ludis muzikon por la viro kaj poste vagis plu.

Originalo: Der wunderliche Spielmann

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Der wunderliche Spielmann“ lingve kontrolis Vladimir Türk



elgermanigis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio)

Eileen Chang (1920-1995)



Bovo

Buŝprenante pipon de tabako, Luxing staris ĉe la pordo, kun ambaŭ brakoj sur la talio. Pluvo ĵus ĉesis kaj akveroj gutis el la malseka pajlo sur la tegmento. Sur la tero troviĝis pli aŭ malpli malaltaj kotaj flakoj plenaj je malhele verda akvo. Kelkaj hundvostaj herboj meze de la akvosupraĵo

aŭtorino, Eileen Chang

malpeze svingis siajn rufajn spikojn en turniĝanta akvokirliĝo. La vento alblovanta al la homa vizaĝo glacie tanĝis la homan nazpinton, alportante iom pli daodoro de freŝa herbo ol en vitro.

Luxing frapetis la pipoforneton kontraŭ la pordklapon por malplenigi tabakpolvon, pli striktigis la zonan, kaj iris al la bovstalo. Tie la maldensa sunlumo post komenca sereniĝo de la vetero penetris la barilon kaj projekciis lumajn kaj ombrajn oblongojn sur la kotan teron; du malgrasaj flavetaj kokidoj, skuante malsekajn flugilojn, iris tien kaj ĉi tien beki nutraĵon; en la bovstalo solece kuŝis malplena kaj polvokovrita trogo, sur kiu sterniĝis paperfolio kun legomoj por sekigo sur ĝi, kaj en kies anguloj videblis sekaj fojno-pajleroj; unu flanko de la barilo jam blankiĝis pro frotado de la bovo, kiam ĝia kolo ĵukis post satmanĝado de fojno. Li malpeze metis sian manon sur la barilon difektitan de frotado kaj karesis la krudan lignopalison. Acideco grimpis malsupren de lia nazeĝo kaj ŝtopis lian gorĝon. Larmoj inundis liajn okulojn.

Aŭdinte pezajn spirojn malantaŭ sia dorso, li surpriziĝis. Kiam li turnis sian kapon por vidi, li ne sciis, kiam lia edzino jam staris malantaŭ li. Same kiel li, ŝi stupore rigardis la malplenan bovstalon. Ŝiaj haroj estis taŭzitaĵoj de vento, la mentono tremetis kaj larmoj ludadis en ŝiaj okuloj. Li tenis sin senparola kaj ankaŭ ŝi senvorta. Tamen ili klare komprenis unu la alian, kion estas sur la koro. La malgrasaj kokidoj susure paŝis tra tufo de hundvostaj herboj. Silento regis ĉirkaŭe. La suno ĵetis la radiojn sur la sekigitajn legomojn, kiuj elspiris mildan malbonodoron en ventblovo.

“Kion vi decidis finfine?” ŝi viŝis siajn okulojn per la blua antaŭtuko.

“...Preskaŭ nenion.”

“Preskaŭ nenion! Tuj venos Printempokomenco. Ĉiuj kondukas bovojn al

kampoj, sed kie estas nia bovo?”

“Morgaŭ mi iros al la hejmo de la tria onklino pruntepreni bovon, pruntepreni bovon!” li malpacience frapetadis la barilon per pipstango.

“Nu, facilas diri senvalorajn vortojn! La tria onklino estas nia bona najbaro, sed kiam ŝi volis pruntepreni de ni kelkajn ŝeng-ojn* da rizo, vi rifuzis. Nun vi volas peti de ŝi pruntedonon, ĉu ŝi volantas?”

Lia malpacienco pliiĝis. Ju pli li malamis, ke ŝi tuŝas la doloran lokon, kiun li jam pripentis, des pli ŝi insiste vundis ĝin. Li ja estis kulpa pro tio, ke li ofendis la trian onklinon akordiĝeman, sed lia edzino eĉ prenis tion multfoje por primoki lin...

“Morgaŭ mi min turnos al Jiang Tiangui!” Li turnis sin, esprimante, ke li ne plu volas interparoli kun ŝi, tamen ŝi ŝajne neniel kontentiĝis pri lia respondo...

“La edzino de Jiang Tiangui deklaris publike, ke, se oni volas pruntepreni bovon, li devas anticipi pagi monon por tio.”

Mallevinte siajn okulojn, li klinis sin, kaptis kokidon per mano kaj ekzamenis ĝiajn ripojn kaj malgrasajn piedojn ripetade. La kokido pepadis sur lia manplato.

“Ne! Ne!” ŝi kriis ekscitite. Ŝi jam tute komprenis lian senvortan sugeston. Tiumomente ŝi ŝajne aspektis pli maljuna ol ordinare, kvankam ŝi nur atingis la aĝon de tridek jaroj. Ŝi lin rigardis per la panikita kaj petema rigardo elĵetita el siaj brunaj obeemaj okuloj: “Ĉifoje mi neniel donas promeson al vi! Unue mia bovo... mia bovo estas forkondukita de aliulo, kaj poste mia arĝenta harpinglo... nun estas vico por tiuj ĉi kokidoj! Kiel viro, vi nur scipovas elvendi miajn aĵojn... Mi demandu vin, kiu ŝparis monon aĉeti ilin malgraŭ sia suferado de malvarmo kaj malsato? Mi demandas vin...” Tute perdinte sinregon, ŝi kovris sian vizaĝon per la blua antaŭtuko kaj ekploris.

“Estas vi, kiu insiste petas pruntepreni bovon, kaj ankaŭ estas vi, kiu domaĝas la kokidojn!” Li deturnis sian vizaĝon kaj eksuĉis pipon. Li ekprenis pecon de sekigita legomo, ekflaris ĝin kaj remetis ĝin sur la trogon.

“Ĉu nur mi domaĝas...” Ŝi penis ŝovi sian vizaĝon trans lia ŝultro. “Vi... vi estas malavara. Vi eĉ ne domaĝus la kabanon, se vi volus donaci ĝin al aliulo. Mi neniel faros tion! Kian mizeron mi suferas! Mi mastrumas la tutan hejmon por vi, sed mi nur meritas tiujn aĉajn vortojn! La Ĉielo rigardu... Unue oni forprenis mian bovon kaj poste mian arĝentan harpinglon, kaj nun la vico iras al la kokidoj! Estas pli bone tranĉi de mi pecojn da karno kaj donaci ilin al aliaj, ĉu! Tiel vi ne plu havos ŝancon eltrudi ion ajnan de mi!”

Muta, li levis la kapon kaj direktis sian rigardon al la hel-pala ombro de la subiranta suno sur la kota muro. Li sciis, ke li ne devas serioze preni tiujn ŝiajn vortojn, ĉar ŝi moliĝos antaŭ ol la suno subiros post la monton. Malgraŭ ĉio, pruntepreni bovon estas grava afero. Se ne plugi la teron, ĉu ni atendas morton pro

malsato? Tion ŝi ankaŭ komprenas, kvankam ŝi estas virino.

La flava luno oblikve pendis super la kamentubo de la pajlokabano kaj la malseka pajlo estis prilumita fride blanka. La kamentubo elvomis densan kuirfumon, kiu nebuligis la lunluman pejzaĝon. La kokidoj jam enfermiĝis en kokejo, mallaŭte klukante.

El la duone malfermita pordo de la pajla kabano elfiltrigis strio da orangruĝa lumo de la olelampo, kaj altstatura figuro staris ĉe la pordo, preskaŭ kovrante la tutan pordkadron. Li estis Luxing, kiu suĉis pipon, kun brako sur la kokso. Se morgaŭ nokte, li pensis, mankos pepkrioj de la kokidoj, kiel solecan nokton li pasigos!

La sekvantan matenon, antaŭ ol aŭdiĝis kokerikado, lia edzino ellitiĝis kaj faris fajron en la forno. Tuj poste Luxing ankaŭ ellitiĝis. Post manĝo de varmaj kuiritaj kukurbpecoj, liginte per ruĝaj tolpecoj la krurojn de la du kokidoj, li prenis ilin kun ĝiaj kapoj malsupren kaj vigle iris al la familio Jiang.

Ĉe aŭroro la ĉielo prezentis belan lazurkoloron postpluvan. Arbobranĉoj komencis elŝovi junverdajn ŝosojn kaj sur ili brile pendis roseroj, kiuj ŝpruce malsekigis preterpasanton, se li tuŝis ilin. Inter arboj videblis rondaj teramasoj, al kies suproj konvulvuloj alkrōiĝis kaj etendis siajn purpurajn trumpetetojn en la rompitaĵojn ĉerkojn malkaŝitajn ekster bruna grundo. Preter tiuj tomboj kampuloj kantante pasis, kun ŝpato sur la ŝultro, kondukante bovon. La bovo de la familio Jiang estis nigra bubalo kun bela kaj fortika korpo. Ĝiaj du mildaj okulegoj sub la ombro de du fortikaj kornoj oblikve rigardis al la fremda Luxing, kaj en liaj okuloj ĝi estis respektbla princo, kiu meritis la koston de dek kokidoj, kvankam ĝia kolo estis malbone vundfrotita de jugo. Li eĉ sentis sin kiel defendanta komandanto de tiu ĉi princo. Novaj ĝojo kaj fiereco plene okupis lian koron, tiel ke li laŭte fajfis sur la vojo.

Atinginte la celokon, la knabobubanisto, laŭ la ordono de sia mastro, ripetade admonis lin, kiel trakti ĝin, kaj starante apude, ggratis lin ekipi ĝin per plugilo, kaj forlasis ilin. Luxing komencis peli ĝin, tamen ĝi ŝajne ŝerce ludis kun li. Apenaŭ ĝi faris tri paŝojn, ĝi kuŝigis sin sur la teron kaj rifuzis stariĝi. Malgraŭ, ke li penadis ĉiurimede, ĝi, sub la ombro de la dikaj kornoj, ruzeme oblikve rigardis lin. La suno ĵetis ardantajn radiojn sur lian vatitan veston kaj li multe ŝvitis tra la korpo. En malproksimaj kampoj aliaj kampuloj facile manipulis bovojn, kantante. Tia vidaĵo fulmis tra lia koro de tempo al tempo, ĉiam kun sarkasmo.

“Bastardo! Vi molestas min! Simple nur min!” li malpacience sakris. Krak! li donis al ĝi vipbaton. “Vi... vi... bastardo, ĉu vi kuraĝas molesti min?”

La pupiloj de la bovo subite grandiĝis. Ĝi direktis la rigardon al li kaj ĝiaj naztruoj rondiĝis, sible elspirante. Ĝi malrapide, sed impone stariĝis, ke li tuj flaris la krizon en la aero. Ombro de drasta hororo subite falis en lian koron. Li oblikve

sin klinis kaj evitis la du grandajn kornojn, kiuj rekte sin ĵetis al li. Li tuj faligis sin sur la teron, turnadis sian tutan korpon kaj ruladis sin malsupren laŭ la oblikva deklivo ĝis suba kampsulko. Ruliĝante, li aŭdis la bruon spiradon el ĝiaj rondigitaj naztruoj, kaj li sentis, ke tiuj ĝiaj monstraĵoj okulegoj alpremiĝas pli kaj pli proksimen kaj fariĝas pli kaj pli grandaj, kiel veturilaj radoj. Poste li sentis tranĉantan doloregon, kaj la sango sala kaj fiŝodora fluis en lian buŝon. Li perdis konscion. Ĉe liaj oreloj ŝajne aŭdiĝis de malproksime spirado de la bovo kaj homa bruado.

Alia vesperkrepusko. La edzino de Luxing, surhavante kanabveston por funebrado, akompanis eksteren nigran ĉerkon portantan de du homoj. Ŝi fojrefoje alpremis sian vizaĝon al la malvarma ĉerktabulo, viŝante la duonsekgitan sigelitan lakon sur la ĉerko per siaj pendantaj taŭzitaĵoj haroj. Ŝiaj mildaj kaj tremetantaj brunaj okuloj plenis de larmoj. Ŝi mallauĝe rakontis per tremetanta voĉo:

“Unue... unue mia bovo... mia fortika kaj kapabla bovo... estis forkondukita... Mia arĝenta harpinglo... el mia doto... brila harpinglo el naŭdekprocenta arĝento... Kaj poste miaj kokidoj... kaj vi... vi ankaŭ estas forportita” ŝi singulte ploris. Ŝi sentis, ke tiuj, al kiuj ŝi aminklinas dum la tuta vivo, jam forflugis per flugiloj unu post la alia en nokta malvarma kaj malseketa vento.

La flava luno pendis oblikve super la kamentubo kaj fariĝis svaga en la kuirfumo. Konvolvuloj levis delikatajn purpurajn trumpetetojn kaj hundvosta herbo svingis kaŝtankolorajn spikojn. La vivtempo etendiĝanta antaŭ ŝi estis longlonga nokto. Kiel soleca estis la nokto, kiu malhavis pepkriojn de kokidoj kaj altan skuiĝantan figuron de Luxing!

**ŝeng-o: ĉina tradicia mezurunuo de kapacito de greno, egala al unu litro proksimume.*



1936-a jaro

elĉinigis Kang Long (Ĉinio)

Chiung Yao (1938-)



aŭtorino Chiung Yao

En profunda korto (6)

6

La unuan nokton, kiam Fang ekloĝis en la domo de Familio Bai, ŝi maldormis.

Kuŝante sur la luksa litego kun manoj sub sia kapo, ŝi gape rigardis al la vitra lustreto pendanta el la

plafono. Ĉe la litkapo aromo de rozfloroj atakis ŝian nazon. Ekster la fenestro la lunlumo mildis kiel akvo, kaj la nokta zefiro blove karesis la fenestrajn kurtenojn. En la tuta domo regis silento. Ŝi kuŝis senmove. Kvankam ŝi estis tre laca, ŝi ne emis endormiĝi. Ŝi nur sentis maltrankvile ondantajn pensojn en la kapo. Ŝi serĉis en la memoro tiutagan posttagmezon: kion ŝi faris tiam? Ŝi promenadis kun Tingting en la pinarbaro sur la montdeklivo, kaj ŝirkolektis du junajn bambuojn en bambuaro. Poste ili paŝadis laŭvole. Kiam ili atingis la randon de la ponto ĉe bambuaro, ŝi diris al Tingting, “Ni kolektu rulŝtonetojn sub la ponto, ĉu bone?”

Tiu hezitis iomete. Kun neordinara mieno, ŝi ĵetis abomemindan rigardon al la rivereto. Fang mirplene demandis, “Ĉu vi ne ŝatas rulŝtonetojn en la rivereto do?”

“Ne estas tiel,” ŝi skuis la kapon. Poste, montrante la rivereton, ŝi diris, “Ĝuste en la rivereton mia propra patrino ensaltis kaj dronis en ĝi.”

“Ho,” Fang rapide ekkuntiris siajn brovojn. Kial plenkreskuloj lasas siajn infanojn sciiĝi pri tiuj malfeliĉaĵoj! Ili eĉ ne konsideras, ĉu tiuj animetoj povas elteni tion! Kiel kruela vi estas, Bai Peiwen!

“Ili diris, ke tiun tagon la rivereto ŝveliĝis. Kaj plie la ponto estis puŝrompita de fluakvo pro la tajfuno de antaŭa tago. Tial, paĉjo diris, ke panjo falis pro mispaŝo. Ĉi tie ne estis lampoj kaj tiun nokton estis tre mallume. Ŝi certe ne vidis, ke la ponto jam estis rompita.”

“Kiel vi sciiĝas multe pri tio?”

“Tion ĉiuj scias. Ili babilis pri tio malantaŭ mia dorso, pensante, ke mi ne povas aŭdi. Ili ankoraŭ diris...” La knabinon kaptis subita malvarma ekstremo.

Ne! Ĉu ili ne volas teni de la knabino la sekreton pri la deveno? Ektirante la manon de Tingting, Fang tuj venis al la alia temo de la parolo, “Ni ne plu babilu pri

tio, Tingting. Vi konduku min al la Templo de Pinoj kaj Bambuoj por nin distri, ĉu bone? Mi aŭdis, ke la templo estas tre fama, sed mi neniam vizitis ĝin.”

“Bone! Mi konduku vin tien.” Tiel ili iris al la templo laŭ la vojeto inter pinarbaro. Ili grimpis laŭ la ŝtonŝtuparo, ambaŭflanke de kiu staris junverdaĵoj pinoj en silento. La pinoj ŝirmis ilin kontraŭ la sunlumo kaj ili surpaŝis la ŝtupojn kovritajn per malhela musko. Ĉirkaŭe regis nepriskribbla soleneco kaj kvieto. Post longa tempo, grimpite multe da ŝtupoj, ili fine venis antaŭ la templon. Floroj kaj arbedoj dense kreskis antaŭ ĝia pordo, antaŭe kaj malantaŭe staris pinarbaroj, kaj dekstre kaj maldekstre troviĝis bambuaroj. Pro tio oni nomis ĝin “Templo de Pinoj kaj Bambuoj”. En ĝi Avalokiteŝvaro estis oferata. Antaŭ la templa navo ŝvebis spirale incensfumo. Kaj antaŭ la pordo staris grandega bronza kvarpieda incensbruligujlo, en kiu sennombraj incens-vergetoj brulis. Starante antaŭ la pordo, oni povis pririgardi la urbon Taibej en malproksimo tra la ĉirkaŭa pitoreskejo.

Antaŭ la templo ili staris dum kelka tempo. Tingting, ŝvingante sian manon, diris, “Instruistino, ĉu vi ne petas paperslipon pri sortodivenado!”

Kun malseriozeca konduto, ŝi vere bruligis fasketon da incensvergetoj kaj petis paperslipon, sur kiu legiĝis la jenaj vortoj kun tre ambigua senco:

“Geedziĝo kaj riĉeco sendependas de la homa volo, certe la vantulon vanigos la dezir’ altcela en parolo, homoj, kiuj blinde trovas sin en labirinto nur komprenas, ĝis la lun’ elvenos kaj disdividiĝos dika nubtavolo.”

Kun streĉita kolo, Tingting rigardis scivoleme kaj demandis, “Kion ĝi diras, instruistino? Kion vi deziras el sortodivenado?”

Ĉifinte la slipon, Fang ridete respondis, “Mi deziras tion, kion mi volas, dum ĝi diras tion, kion ĝi volas. Nu, Tingting, estas malfrue. Ni devas reiri.”

Kiam ili atingis la domon, estis tempo por vespermanĝi. Sinjorino Bai ankoraŭ ne revenis, kaj sinjoro Bai ordonis porti lian porcion al supra etaĝo, tiel ke nur ambaŭ Fang kaj Tingting altabliĝis. Pro tio, ke ŝi kuradis tien kaj reen ekstere la tuan posttagmezon, Tingting havis bonan apetiton kaj unuspire englutis du bovlojn da rizaĵoj, dum Fang manĝis malmulte. La bona apetito de Tingting gajigis ŝin. Rigardante Tingting, ŝi demandis, “Ĉu vi manĝas sola en ordinara tempo, dum via paĉjo restas sur la etaĝo kaj via panjo forestas?”

“Jes,” respondis Tingting, “mi ne manĝas ofte.”

“Ne manĝi?”

“Estas tre seninterese por mi manĝi sola. Mi rifuzis manĝi. Kelktempe, Yazhu devigis min manĝi, kaj mi nur manĝis iomete.”

Ne mirinde, ke la knabino estas tiel magra! Rigardante al Tingting, Fang faris decidon interne. Ŝi volas, ke la knabino normaligiĝos, gajigiĝos kaj bonsaniĝos. Nuntempe ŝia lernado siavice fariĝas malpli grava. Post vespermanĝo, Fang urĝis

ŝin finfari ekzercojn sub ŝia superrigardo kaj helpis ŝin ripari la mankon en aritmetiko. Poste, ŝi petis al ŝi elpreni tiun rompitan pupon. Ŝi elspezis unu kaj duonon da horoj fliki kaj bonigi ĝin. Ĉar ŝi ne havis pecetojn da tolo, ŝi eĉ disŝiris sian propran subjupon, per kies silkpeco kaj punto ŝi elfaris novan bluzon por la pupo. Dum kudrado, Tingting ĉiam staris sur genuoj apud ŝi, ĝojmiene rigardante ŝin en laborado, kaj helpis ŝin, jen transdonante pinglon jen fadenon. Post kiam ŝi fine prilaboris la pupon, Fang stariĝis el la tapiŝo, ridete dirante, “Bone, via pupo aspektas pli bele.”

Tingting ĵetis adoremanto rigardon al Fang. Kaj ŝi fiere okule ekzamenis sian pupon kaj alpremis ĝin al sia brusto, murmure dirante, “Bona pupo, mia tre tre aminda pupo.”

Ĉe tio Fang tre emociiĝis. Pro malfrua tempo, ŝi urĝis Tingting enlitiĝi post sinbanado. Vidinte, ke ŝi surmetas piĝamon kaj sin enŝovas sub la litkovrilon, Fang sin klinis por ordigi ŝian vatitan litkovrilon. Guste dum ĉi tiu momento, la knabino subite levis sian korpon, ĉirkaŭprenis ŝian kolon per siaj brakoj, altiris ŝian kapon kaj ekkisis per malseketaj lipetoj sur ŝia vango, hasteme dirante, “Mi vere amas vin, instruistino.” Post tiuj vortoj, ŝi, pro hontemo, forlasis Fang-on, kaj sin turninte, enŝovis sian kapon en kapkusenon por afekti endormiĝi. Starante en stuporo, Fang ne moviĝis dum longa tempo. Tiu neatendita ago de Tingting tre emociis kaj ekscitis ŝin, tiel ke ŝi ne povis sin regi. Kun malsekigitaj okuloj, ŝi eĉ ne povis havi klaran vidon tra siaj okulvitroj, sur kiuj flosis tavolo da vaporo. Post longa momento, vidinte ke Tingting ne turniĝadas plu, ŝi ĵetis alian rigardon al ŝi kun klinita korpo super ŝi. Vere la knabino dronis en profunda dormo post tuttaga laciga irado. Kun vesuspiro, ŝi kovris ŝian frunton per kiseto kaj duonvoĉe diris, “Dormu bone, infano. Havu dolĉan sonĝon.”

Eliginte alian suspiron, ŝi retiriĝis el ŝia ĉambro kaj tirfermis la pordon. Tiam, ŝi trovis, ke Bai Peiwen staras ĉe la kruĉiĝo de la saloneto kaj koridoro, kun sia vizaĝo al ŝi. Ŝi sciis, ke li havas akrajn orelojn. Ŝi, alpaŝante, salute diris, “Ĉu vi ankoraŭ ne enlitiĝas?”

“Venu ĉi tien kaj sidiĝu dum momento,” diris Bai Peiwen.

Ŝi alpaŝis kaj sidiĝis sur la sofono en la saloneto. Tie, krom murlampoj, aliaj lampoj ne estis ŝaltitaj, kaj regis nur malhela kaj milda lumo. Apogante oblikve kontraŭ la fenestroporto, Bai diris kviete, “Vi jam okupiĝis la tutan possttagmezon. Laŭ mi, vi elkore prizorgas la infanon, ĉu ne?”

“Mi prizorgas ŝin, ĉar ŝi estas tre ‘malriĉa,’” ŝi respondis.

“Malriĉa?” Li ekŝtoniĝis. “Kion vi signifas per tiu vorto?”

“Mi neniam vidi aliajn infanojn pli mankoplana ol ŝi!” ŝi diris iom ekscitite. “Al ŝi mankas varmo, mankas amo, mankas zorgiteco kaj mankas ĉio!”

“Ĉu vi riproĉas min?” li demandis.

“Mi ne kuraĝas vin riproĉi, sinjoro Bai,” ŝi diris, penante mildigi sian ekscitecon. “Sed, donu pli da amo al ŝi, sinjoro Bai. Ŝi vin bezonas!” En ŝia voĉo troviĝis iom da peta tono.

Li eksentis kortuŝitecon. “Mi scias,” li diris, ĉifoje kun voĉo sincera kaj elkora. “Vi certe pensas, ke mi estas nerespondecoma patro. Tamen, sciu, ke mi kutime ne scipovas, kiel zorgi pri la infano, kaj des pli, ke mi ne scias, kiel trakti ŝin. Tiu knabino ofte vekas en mi dolorajn rememorojn. Nu, fraŭlino Fang, ĉu vi aŭdis pri ŝia propra patrino, mi pensas?”

“Jes, iomete,” ŝi diris duonvoĉe, “ŝi estas bona virino, kiu indas je via rememorado dum la tuta vivo.”

Li dronis en meditado. “Ofte pro momenta konfuziteco en menso, oni emas fari eraron neripareblan dum la tuta vivo. Se ŝi ankoraŭ vivus...” Li faris profundan enspiron kaj daŭrigis impulse en tono dolora kaj aspira, “Mi volontas oferi ĉion mian por reakiri ŝian vivon!”

“Ho, sinjoro!” ŝi ekkriis pretervole. Ŝi kortuŝiĝis. Sur lia vizaĝo, ŝi vidis ardantajn varmon kaj doloron, kiuj ŝin frapis. Ŝi sentis konfuzitecon, perpleksecon kaj senrimedecon.

“Ho,” li tuj venis al sia konscio. Maltrankvileco naĝis sur lia frunto. Li tuj cedis, dirante elturniĝeme, “Pardonon, fraŭlino Fang. Bonvole pardonu min. Mi ne devus diri al vi tion. Mi perdis sinregadon, mi pensas.”

“Ho, ne, sinjoro Bai,” ŝi diris hasteme kun sentoj ondantaj en si. Ŝi pentis, ke ŝi eltiris el li tiun parolon. Stariĝinte, ŝi diris rapide, “Mi sentas elĉerpitecon, sinjoro Bai. Mi volas reiri al mia ĉambro. Ĝis morgaŭ, sinjoro Bai!”

“Momenton,” li diris sentive. “Ŝajnas, ke vi iom timas min, fraŭlino Fang.”

“Ne,” ŝi ekhavis kontraŭvolan ekstremon, sentante sin tre malforta.

“Ne timu min, fraŭlino Fang,” diris la viro brustvoĉe. “Bonvole pardonu min pro miaj malĝentileco kaj malprudenteco, kiujn kaŭzas mia malofta kontaktado kun aliaj, precipe kun inoj. Mi preskaŭ forgesas ĝentilecon kaj dececon en interparolo.”

“Ho, vi estas bonkora, sinjoro Bai,” ŝi diris iom rigide, “Mi ne timas vin, neniam. Do, ĝis revido, sinjoro Bai.”

Sin turninte, ŝi hasteme reiris en sian ĉambron, tiel hasteme, kvazaŭ fuĝante de io.

Nun kuŝante en la lito, kun fiksa rigardo al la plafono, ŝi neniel endormiĝis. Tio, kion ŝi spertis dumtage, sin prezentis en ŝia menso bildon post bildo, tiel klare kaj tiel vivece. Ŝi neniel sukcesis forskui la figurojn de la patro kaj filino de antaŭ siaj okuloj. La blindulo pasigas tristajn tagojn kaj la knabino troviĝas en kompatinda situacio. Kiel doni helpon al ili? Ĉu denove trovi la pereintan edzinon kaj patrino

por ili ambaŭ? Ŝi eksentis malvarman tremon. La nokta vento kun aŭtuna frosto enblovis tra fenestro garnita per kulvualo. Nokto jam profundiĝis.

Ŝi ĵetis rigardon al brakhorloĝo. Estis proksime al la unua horo. Ĉirkaŭe regis silento. Sinjorino Bai ankoraŭ ne rehejmiĝis. Preninte anglalingvan libron *Fiero kaj Antaŭjuĝo*, ŝi komencis legi ĝin distrite. Fakte ŝi ne povis koncentri siajn pensojn nek ŝia rigardo povis fiksiĝi sur la libron longe. Leginte kelkajn liniojn, ŝi ĉiam pretervole levis siajn okulojn al la vazo da rozoj aŭ al la skulptaĵo por mediti senvorte. Oni ne sciis, kiom da tempo forpasis. Ekhupado surprizis ŝin. Tiu sinjorino Bai revenas. Kial sonorigi la hupon? En tiel kvieta profunda nokto! Ĉu ŝi ne kunportas la ŝlosilon al la dompordo? Demetinte la libron, ŝi aŭskultis subkonscie. La aŭto veturis en la ĝardenon. La aŭtopordeto frapfermiĝis, eligante grandan bruon. Kaj sekvis klakaj paŝoj de altkalkanumaj ŝuoj irantaj en la salonon. Poste, ŝi supreniris la etaĝon, kantante per laŭta voĉo. Ŝi vere havis belan voĉon. La kanto, kiun ŝi kantis, ne estis la laŭmoda, sed la malnova poemo muzikigita:

Loĝas vi ĉe la Janzi-rivera fin',
kaj mi loĝas ĉe malsupra basen-ter'.
Mi sopiras, sed laŭ vol' ne vidas vin,
trinkas ni la saman akvon de l' river'...

Tamen ŝi ne finkantis la kanton kaj abrupte interrompis kantadon, kvazaŭ ĝenite de io. Fang ne aŭdis la pordon de la najbara ĉambro malfermiĝi, sed nun ŝi aŭdis la retenatan kaj koleran voĉon de Bai Peiwen, kiu mallauĉte muĝis, "Ailin!"

Ailin? Ĉu tio estas la nomo de sinjorino Bai?

"Kio? Ĉu vi? Bai Peiwen?" La tono de la virino estis akuta kaj provoka. "Kian aferon vi havas?"

"Ĉu vi ne brue veku dormantojn de la tuta domo?"

"Ho? Ĉu vi timas, kiun mi voĉe vekas? Tiun vian guvernistinon? Haha!" Ŝia ridsono akutiĝis. "Ne timu, ke mi voĉe vekas ŝin. Se vi ne estus blinda, vi trovus, ke ŝi ankoraŭ ne endormiĝas! Lamplumo elfiltrigas el la pordfendo de ŝia ĉambro. Mi vetu, ke ŝi aŭskultas al nia interparolo kun streĉitaj oreloj!"

"Ailin!"

"Ha, mi diru al vi, Bai Peiwen, ne ludu artifikon antaŭ mi. Mi ne scias, por kio vi veniĝis tiun guvernistinon al la hejmo. Sed, mi ne ŝatas ŝin, ĉar en ŝiaj okuloj videblas ŝtelista rigardo, mi diras al vi, ŝtelista rigardo!"

"Ailin! Ĉu vi freneziga! Kiom da vino vi jam drinkis?" Lia voĉo plenis de indigno kaj senhelpeco, kaj plie kun iom da maltrankvileco. "Ĉu vi povus diri malpli da vortoj?"

"Malpli da vortoj? Kial? Estas vi, kiu paroligas min starante antaŭ mi! Ĉu vi timas nun? Ĉu vi timas, ke aŭdas ŝi, tiu, por kiu vi aranĝis dekoradon de ŝia ĉambro

kaj kiun vi venigis per ĉiuj rimedoj? Maljuna virgulino! Ha! La blinda mastro kaj guvernistino, mi atendas rigardi, kiel la afero de vi ambaŭ disvolviĝos! Tio estas bonaj materialoj por novelverkado!”

“Fermu vian buŝaĉon, vi malnobla kaj obscena!” Lia voĉo tremetis, kaj tiuj vortoj videble elpafiĝis el inter liaj dentoj.

“Kio? Malnobla kaj obscena? Ĉu vi diris, ke mi estas malnobla kaj obscena?” ŝi plilaŭtigis sian voĉon. “Vere obscena estas la sinjorino, kiu ĵetis sin en la riveron. Eĉ se mi estus obscena, mi ankoraŭ ne naskis bastardon al vi!”

Klara kaj sonora frapado. Evidente estis Bai Peiwen kiu vangfrapis sian edzinon. Fang anticipis, ke sekvos pli granda ŝtormo. Ŝi aŭskultis maltrankvile. Sed male fariĝis kviete ekstere. Neniu sono aŭdiĝis dum longa momento. Tamen, kvazaŭ pasus jam jarcento, Fang aŭdis Ailin diri per retenata, dentgrincanta kaj malamplena voĉo, “Bai Peiwen, se vi refoje batos min, ne riproĉu min pro mia venena faro. Mi volas ruinigi ĉion vian!”

“Do ruinigu!” li diris en tono basa kaj trista. “Kion alian mi havas por vi ruinigi? Ĉio mia jam estas ruinigita tuttute.”

Pordknarado montris al Fang, ke li jam reiris en sian ĉambron. Kun retenata spiro, ŝi ne povis moviĝi dum longa momento, sentante, ke ĉiu ŝia muskolo estas rigida kaj ĉiu ŝia nervo dolora. Tiu interparolo, kiun ŝi aŭdis, igis ŝin tiel surprizita, tiel nekredbla, kaj plie ŝi ekhavis tiel pezan, intensan kaj humiligitan senton. Gapante al la plafono, ŝi ne povis endormiĝi plu. Ŝi jam delonge divenis la malbonegan rilaton inter geedzoj Bai, sed ne atendis, ke ili staras tiel antagonisme. Kia familio! Sed kio pri ŝi mem? Kian rolon ŝi ludas, implikiĝinte en ĉi tiun familion? Nur simplanima guvernistino? Jen, aŭdu ĵusan paroltonon de Ailin! “Fang Siying, vi malpravas, malpravas, malpravas!” Ŝi parolis al si per la sama vorto sinsekve. Post tio, ŝin atakis subita stuporiĝo. Tra ŝia menso fulmis la ideo: retiriĝu! Se mi forlasu, estas ankoraŭ ne malfrue. Do mi retiriĝu! Tamen... tamen... kio pri la senpatrina knabino?

La sekvantan matenon, Fang ellitiĝis jam multan momenton post la naŭa horo. Feliĉe estis dimanĉo kaj ne necesis por ŝi iri al la lernejo. Post tualetado, ŝi malsupreiris la ŝtuparon. Ŝin renkontis flugrapide Tingting kun naiva, gaja kaj infaneca mieno.

“Ĉu vi havis bonan dormon, instruistino?”

“Jes,” dirante, ŝi nereteneble oscedis.

“Mi atendas vin por matenmanĝi kune.”

“Kaj via paĉjo?”

“Li jam manĝis supre.”

“Kaj via panjo?”

“Ŝi ankoraŭ dormas.”

“Ho.” Fang altabliĝis por preni matenmanĝon, sed ŝi montris sin distrema. Tingting fiksis senteman rigardon sur ŝi. Pro ŝia silentemo, la knabino ne kuraĝis ekparoli. Post manĝado, Fang sidiĝis en sofon. Altirinte Tingting apud sin, ŝi mallaŭte diris, “Tingting, mi loĝigu min en la lernejon denove kaj mi venu ripari viajn lecionojn ĉiutage.” La knabino paliĝis.

“Pro kio? Ĉu mi nebone kondutas? Ĉu mi tro lacigis vin?” ŝi demandis ĉagrene. Tute malaperis la sunlumo el ŝia vizaĝo.

“Ho, ne, tio ne koncernas vin...” diris Fang, malvigle kaj lace.

“Do, pro kio?” Tingting timeme rigardis al ŝi per paro da tristaj kaj petemaj okuloj. Tio konkeris ŝin. “Instruistino, mi estu bonkondata kaj obeema. Ne foriru, ĉu bone?”

“Kiu volas foriri?” demandis voĉo. Levinte la kapon, Fang vidis Bai Peiwen malsupreniri laŭ la ŝtuparo. En sia hejmo li moviĝis lerte kaj facile kaj li ne uzis apogbastonon.

“Jen vi, paĉjo,” diris Tingting maltrankvile, “Retenu instruistino Fang! Ŝi diris, ke ŝi volas loĝigi sin en la lernejon denove.”

Bai ŝtoniĝis, sin tenante senparola longe. Ankaŭ Fang silentis. En aero saturiĝis doloriga kaj embarasiga etoso. Post kelka tempo, Bai duonvoĉe diris, kvazaŭ al si mem, “Ŝi estas vere forta. Mi eĉ ne povas reteni gubernistino!”

Lia tono pikvundis Fang. “Ho, sinjoro!” ŝi ekkriis. “Ne diru tion!”

“Kion alian mi devas diri?” Sur lia vizaĝo videblis nenia esprimo kaj lia voĉo sonis malplene kaj malproksime. “Ŝi ĉiam estas venkema, por eterne!”

“Sed...” Fang diris urĝeme, “mi ankoraŭ ne vere foriris!”

“Do, vi volas resti ĉi tie, ĉu?” li demandis rapide. Vigleco reaperis sur lia vizaĝo.

“Mi... aj... mi volas...” ŝi balbutis, sed fine, ŝi eligis abrupte, “Jes, mi restu ĉi tie.” Ĉe tio, ŝi malklare sentis interne, ke ŝi falis en lian kaptilon. Tamen ŝi ankoraŭ ĝojis, ke ŝi diris tion, kaj ŝi tiom ĝojis, kvazaŭ liberiginte el la kateno en la koro, ke ŝi mem trovis sian parolon miriga. **(daŭrigota)**



elĉinigiĝis Vejdo

Xue Yongruo (aŭtoro en Tang-dinastio)

Veto pri Kantoj

En Kaiyuan (*kajjŭan*)-erao (713-741), Tang-dinastio, Wang Changling (*vang ĉanglin*), Gao Shi (*gaŭ ŝi*) kaj Wang Zhihuan (*vang ĝihŭan*) ĝuis saman renomon kiel famaj poetoj. Siatempo ili ĉiuj ankoraŭ ne estis favoritaj de fortuna kaj havis similan vivon de migranto.

Foje, en frosta tago, kiam neĝetis, la triopo kune vizitis restoracion kaj aĉetis kredite iom da vino kundrinki. Subite alvenis dekkelkaj geaktoroj de la Pira Ĝardeno, nome, la imperia muzika institucio, kiuj ascendis la supran etaĝon por festeni. La tri poetoj do sidigis sin en kvietaj angulo ĉe forno por rigardi.

Post nelonge, sinsekve alvenis ankaŭ aliaj kvar sveltaj kantistinoj-hetajroj, ĉiuj lukse vestitaj, senkompare pimpaj kaj sorĉe ĉarmaj.

Kaj, post momento, ekludiĝis muzikoj, senescepte de famaj majstraj verkoj en la kuranta erao.

Wang Changling kaj liaj amikoj kaŝe interkonsiliĝis, dirante:

"Ni ĉiuj ĝuis famon kiel elstaraj poetoj, kaj neniam mem decidis la vicordon inter ni, sed nun venas bona ŝanco ke ni povas kaŝe spekti ilian kantadon, kaj, ni interkonsentu pri tio, ke tiu, kies versoj estos plej multe kantataj en la festeno, gajnos la ĉampionecon inter ni!"

Jen unu el la kantistinoj ekkantis laŭtakse:

*Fride pluvis sur rivero dum nokthoro;
adiaŭas mi amikon ĉe aŭroro.
Se demandos pri mi en Luoyang parencoj;
En jadkruĉ' glacikristalas mia koro!"**

Wang Changling do levis sian manon signi sur muro, deklarante: "Unu mia verskvaro!"

Kaj nun alia kantistino ekkantis:

*Ovrante l' keston, vidis mi viajn manleterojn,
kaj vangoj malsekiĝis de larmoj kun premtristo.
Kiom soleca estas vi en la nokt-teraso?
Sed tie --- hejmo de Yang Ziyun (jang zijŭan) la beletristo.*

Gao Shi do levis manon signi sur muro, deklarante: "Unu mia verskvaro!"

Kaj nun la tria kantistino ekkantis:

*Matene mi balaas. Ovriĝas palacpordoj.
Kun ventumil' en mano, medite mi promenias:*

*Kial vizaĝo mia pli palas ol la korvoj?
sur kiuj ja sun-ombroj kun reĝfavoroj plenas!*

Wang Changling do denove levis manon signi sur muro, deklarante: "Jen la dua mia verskvaro!"

Ĉar Wang Zhihuang opiniis ke li mem ĝuis famon jam de pli ol sufiĉe longe, sekve li diris al siaj amikoj:

"Sciu, ke tiuj kantintoj ĉiuj estas kantistinoj en ŝimado, nature ili scipovas kanti banalajn ariojn kia *Vilaĝa Vulgarulo* k.s., pensu, kiu malnobelo ja kompetentas kanti la superban kanton kia *Printempa Neĝo* k.c.?"

Kaj, li montris al la plej ĉarma el inter la kantistinoj, dirante:

"Ni atendu ŝian vicon! Se tio, kion ŝi kantas, ne estas miaj versoj, mi neniam plu kuraĝos konkuri kun vi pri poezio dum tuta vivo! Tamen, se jes, vi ĉiuj devas humile riverenci al mi, prenante min por via majstro!"

Kaj ili ĝoje ridis atendente.

Post nelonge, venis la vico. Kiam la plej aminda ĉarmulino kun paro da haringoj ekkantis, la teksto aŭdiĝis ĝuste jene:

*Flavrivero foren al blanknub' torentas,
inter montoj la soleca urb' silentas.
Jen, ekkantas fluto pri Salika Tristo,
Ho, printemp' ne trans Pasejon Yumen ventas.**

Wang Zhihuan do ekstaze mokis mimike al siaj du amikoj kun ŝerca diro: "Kampuloj! Ĉu mia antaŭdiro trafas?"

Kaj ili eksplodis per gajaj humuraj ridegoj.

Ne povante kompreni la kaŭzon, la geaktoroj kaj kantistinoj ĉiuj stariĝis demandante: "Sinjoroj! Pro kio vi tiel ĝoje ridegas?"

Wang Changling kaj la amikoj malkaŝe rakontis ĉion, rezulte de tio, la geaktoroj ĉiuj konkure salutis ilin, dirante:

"Ho, pardonu ke ni kun karnulaj okuloj ne povas pli frue rekoni vin feojn! Nun ni humile petas vian favoron, ke vi digne honorigu nin per via ĉeesto al nia festeno!"

La triopo bonhumore akceptis la inviton kaj havis ĝojan drinkon ĝis ebrio dum tuta tago.

-- el *Ji Yi Ji (Kolekto de Anekdotoj)*



elĉinigis **Guozhu** (Ĉinio)

Gerrit Berveling (Nederlando)

dekunuoj

sentitole

strand',
sablo trudĝena
inter miaj piedfingroj:
prefere rekte eniri ŝlimejojn:
Vadpromenado

heroldu
vian saĝon
al la mondo
sed vidante iun saĝan,
respektu!

retiriĝo:
ĉiuj gekolegoj
aviadile al Irlando
plifirmigi la grupan koheron:
predikebleco!

memor':
provi forgesi
estas ne eble,
forgesu do la forgeson,
eternsinscia

batalo
ĉion patras;
nur konkurenco stimulas;
la mondo ekzistas intermurdiĝe:
fatalo

popolamaso,
ĉion verdiktu
laŭ niaj postuloj
je nia preferata tempo:
demokratio!

unu teologo:

ĉi-mondo
ne taŭgas
neniam ajn taŭgis
tial Dio savcele enkarniĝis:
senutile?

alia teologo:

diablo
avertis mondokree:
perforton homaro estigos;
Dio kredis sin plisaĝa
Rezulto?

tria teologo:

Ĉu
fido je
la sola Dio
egalas nuligi tuthomarajn trezorojn?
Arĥeologio

Kazantzakis

Sur citadela bastionangulo
en sia Herakliono
trovis fine pacon li.

Kruda kruc' el ligno
kron' el dornoj krucomeze
apud modesta ŝtona
kaj stelea kuŝejo
atestas, kio restas:

nul atendo
nul da timo
nur libero

Tomb' heroa
senglora
nur homa

eĉ sennoma:
unu el ni

8 sept 2015, sur Kreto

matene-ĉi, ĉe matenmanĝ',
ekaŭdis sonojn mi
mezorientajn fremdajn: tranc'
invadis strange min.
rigardu, hom', ke ĉirkaŭ vi
pereas nia mond'
invadas nin de ĉie ajn
povruloj en desper'
por kovron serĉi kun apog'
en ŝirm' de homa est'.
matene-ĉi, ĉe l' naskotag',
plej kompatema Panj',
pri via helpo kaj konsol'
ni petas por la mond'

En Knoso

tra Knoso hodiaŭ
Tezeon serĉante
mi trafis sole turistojn;

sed nokt' Minotaŭron
eksteren logante
danĝera lin faras por idoj:

turistoj do tage
bebĉarojn puŝante
protektion serĉas Tezean

Viv'

Nek kopirajton mi arogas al mi,
nek solposedon de ĉi kruda korp':
 min kiu ajn volas, min povas dividi
 kun tuta la mond', ja kun ĉiu vivestaj'.

Naskis min tero, fajro, akvo kaj spir':
konas min mem eĉ ne mia person':
 min kiu ajn povas kompreni, ĝin faru;
 labori mi volas, por riĉon transdoni.

Al Wouter

kontraŭ vi tutan vesperon mi sidis
vortojn aŭskultis, aŭskultis la paŭzojn
ĝuis konfidojn pri tuta la viv'
pri libroj kiujn ege mi amis
rave mi aŭdis vin voĉi

poste sceneje vi dancis
kuris anhele ĝis voĉperdiĝ'
impone movis muskolojn

do tial oni inventis
baledon

« La celo nin konsumas »

(William Auld)

Serĉante vi vortigi la sencon

de l' vivo milkolore nigrada,
– ĉar nigran ni foje grizega
titolas, refoje eksblanka –
ho kie la senco do?

jen putri kancere en lit' hospitala
jen ami – sed indiferentas reagoj
jen senlaborulu ŝtelgapi ŝvitantojn
jen umi
jen adi
jen kion plu fari?

Ho kara! Ho vi!
ofendi evitu,
nek povrajn incitu,
saĝistojn ne citu!

Ja scias sian doloron
nur mem la koro

Al Madzy

Jen eta kant' pri l' dekjariĝ',
karina, de ĉi nia kun':
gajĝoja Rome (ho memor'!) -
sed pasintvintro ŝajnis pun'.

"Ĉu ĉeas mono? ĉu soif'?"
Trinkejon iris kune ni
kaj poste studentina dom'
posedis unu gaston pli ...

Min kio logis? Kio vin?
Ne trovis belaj oni nin
sed tamen senrezona sent'
decidis tuj: Jen kunulin'!

Aspekte junas ofte nun
vi pli ol prae en junece'
senpacienca kaj l' anim',
karin', saĝiĝis por kares'.

Vin logas el la ŝirma hejm'
studad', laboro kaj homar', -
plenkulme spiru en la viv'
sed ne forgesu min najbar' ...



13 - 2 - 1980.

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



poeto, Mikaelo Bronŝtejn

Venas mi re al vino.
 Vi, mia reva ino,
 ie ĉe l' fora mar' de
 l'Sudo ekloĝis marde
 kun la feria splen', do
 sen ia grava plendo
 krom pri l' foresto mia
 en via Sud' feria.

Ne afliktiĝu kaj en
 nokto aliru kajon,
 kie la ondoj nuras,
 kie l'ĉielo puras,
 kaj la stelaro suda
 klimas pri mi apuda,
 ĉea, nur nevidebla,
 kiel venteto febla.

Plonĝu en revojn – vi en
 foro eksentos mian
 tristan rideton kaj ne
 tute ebrian, ŝajne,
 spiron ĉe via sino...
 Venas mi re al vino.

Mi min demandu, kial
 en tempa flug' sen fin',
 ho, prapatrujo mia,
 mi songe vidas vin,

kaj trovi la respondon
sen trompa iluzi':
La tutan vastan mondon
mi amas. Sed pri vi
apartaj revoj venas
kaj iom stranga sent' –
vi min al kuno benas,
sed mi plu vivas sen...
Mi foras do almenaŭ,
sen diri ion pli,
ĥag Ĥanuka sameaĥ
mi diru nun al vi.
Malgraŭ milita fumo
en la ĉiela klar'
eterne brilu lumo
de via kandelar'!

Ho nur por nelonge de mia ekran' televida
kun ties abundo de krimoj, mensogoj kaj murdo,
mi fuĝis en mian amatan arbaron kun pli da
freŝeco aera, odor' konifera, plezur', do

mi glutas feliĉon per lantaj enspiroj profundaj,
mi skuas abiojn por trafi sub neĝan lavangon,
kaj flugas la plej aspirataj, fascinaj sekundoj
en mian animon portante la ĝuon, la vanton

de tiu senzorga, kvieta, mirinda promeno
indulga, incita, inspira - sed ja ne insida,
kaj versoj ruliĝas, bobelas jam en mia eno,
kaj mi ne revenos al naŭza ekran' televida.

En la societ'
paca kaj senbrua

vero ambigua
plu dominas, sed
tiu ĝena pek'
estas ne problemo,
ĉar ja mankas emo
firme diri "Fek!"
al insida trompo.

Ni toleras, krom po
unu eŭro nur
pagi por ripoz' de
ĉuvenonta poste
honta malplezur'.

Daŭros ĝi eterne,
se plej vera ver' ne
draŝos kun obstin'
la situacion,
renversonte ĉion
kaj vekonte nin.

Petis ŝi dum
la debato
kunan sidon
kun kisado
en la lasta
vico hala
pro senhasta
sent' banala.

Diris li ke
eblas tio
ne publike,
dank' al dio,
sed intime,
amindumo
ja sentime –
en mallumo.

Eto (Ĉinio)

Sur la vojo en nokto

sur la vojo
en nokto
sub la luno
malgrasa
homfiguro
malgrasa
zefiro
karezas la figuron
lian maldikan veston,
lian nudan kapon
en senlima vasto
li ne scias
li ne scias
la vojo sinua
kien
lin kondukas
sen celo

jam tempas
reflugi al la nesto
por birdoj
vespere
ĉu homoj
ankaŭ
reiru
al senhoma domo
unu spiro
etendiĝas larĝe
en somera nokto
ĉiu aĵo
similas kordon
ne ĝin tuŝu
je ektuŝo

ĝi fariĝos
muzika noto
ne ĝin tuŝu
je ektuŝo
ĝi fariĝos
suspiro trista
ĝi pikos
la vunditan koron
li ne volas
fariĝi ŝafido
en tia etoso
ne trovas
elirejon

sur la vojo
en la nokto
la paŝoj malantaŭe
same
solecaj
kiel la liaj
du lampiroj
preterflugas
en hasto
kien ili
celas
li ne volas
scii klare
nek bezonas
scii ĝisfunde
post ĉi nokto
ĉe la aŭroro
nova vojo
sterniĝos
antaŭ li

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



poetino, Maria Nazaré Laroca

Forkurvojo

Al Poeto Iacyr Anderson Freitas

Viaj tagoj kovritas
de la cement' el versoj
kaj la silent' de oratori' :
brulanta kandel', mister'
de la nokto sen eskapo.

Tamen cirklas la pado
de via itinero lukta:
alvenontas ĉiu forir'...
Ju pli dista, des pli apudas
la eterneco dresita.

Itinero

Pri manĝo pensas la korpo;
pro enu' l' anim' rifuzas
panon sen filozofio:

tiu, kiu salas glacion
de l' mantel', kiu min protektas
ĝis ĉio plenumita
fine de tiu rekomenco.

Advento

Televidprogram'
fama al ni trudas
la devigan neceson
de l' ĝusta mezuro,

Laŭ rafinita model'
de la vanteca
konsummerkat'.

Kaj ĉe la neeltenebla
tumulto de l' stratoj,
la senĉesa pluv' decembra
anoncas la tempon tute
malplenan el Kristnasko.

Alvoko

Mi bezonas
veki la semon
de l' interna suno
ade dormanta
ene de mi.

La rutino silenta
ties komfortan
dormon nutras.

Sed transcendo
estas la plej granda urĝo
de mia vivsoifo.

Melopeo

Ruza, forrabas Muzo
la liron de Orfeo,
kaj la sorĉon ŝi plukas
de l' ne skribita poem'.

En la regno de l' silent',
la kanton Eŭridic' aŭdas,
kaj baniĝi al si permesas

ene de l' semantik'
de l' neesprimebla am'
kiu ŝin revivigas.

Lumo

Mi preferas trinki
La naivajn matenojn,
Kiu preteratentas
La maljunecan
Puntan haŭton.

Ĉar ili verŝas
Oran lumon
Sur la haŭtsulkojn.

Do mi estas tiel
De mi mem fianĉin',
Kvankam la nokto
Insistadas ronĝi
Ĉiujn songojn miajn.

Senkulpeco

Jen l' infanaĝo
Surprizanta min
Per delikata muslin',
Nigra-blanke.

Kaj dolĉa mar'
Farita el eternec'
Invadas aeron
Mian el flamoj.

Laŭ la dekjara knabin',
La unua komuni'

Atestas sanktecon.

Kaj la fora rigard'
Stelon videtas
Sur verda ĉielo
Kaj facila vento
Ŝiajn harojn kisas.



Lily (Ĉinio)

Pensero en la Aŭtuno

Someraj floroj
forglitis kaŝe jam
kune kun mia am'.

Folioj acerarbaj
en vent' aŭtuna
ruĝiĝas je la par'okula.

Saluton jen mi diras
al la aŭtuna mondo
sonantan ĝis la horizonto.

Je mia halt' momenta
ekbatas sonorilo tempa
kun la muziko bele tembra.

Honteme l' lun' aŭtuna
kun lotusa aromo en brakum'
rigardas min kaj l' mondon nun.

Starante sub la lun' aŭtuna,
mi trovas min en pensa tranco
kun enokula panorama danco.

Jen kiu semas la lunlumon nun
en mia sonĝo pri mia perdita amo
kiu ardegis kiel fajra flamo?

Dankemon

Dankemon
al gepatroj miaj
kiuj liveris al mi

ŝancon lerni en lernejo
eĉ dum malfacila tempo.
Dankemon
al miaj instruistoj,
kiuj donis al mi
sciojn kaj kuraĝigon
ĉe l' turnopunkto de l' vivvojo.
Dankemon
al miaj fratoj,
kiuj ĉiam donas
al mi helpojn kaj zorgemon
dum mia tuta vivo.
Dankemon
al lernantoj miaj,
kiuj alportas al mi
sincerecon kaj ĝojon.
Dankemon
al tiuj, kiuj min helpis
en konkero super malfaciloj.
Dankemon
al tiuj, kiuj min vundis
kaj lernigis al mi,
kion mi devas plej alte taksi.

Ekskurso

Printempa etoso invitas
al vicleco-plena kamparo.
junverdo kaj floroj meritas
aprezon de vort-malŝparo.

Urbanoj kelkope jen svarmas
kun entuziasmo al ruro.
Ĉi tie kaj tie ja ĉarmas
pejzaĝoj de bela naturo.

Sur berboj infanoj ĉasludas,

aliaj babilas libere.
Eĉ homoj manĝaĵon englutas,
kun ĝuo orgii fabele.

Ripozo kaj ĝojo ja kune
por homoj furoras nur nune.

Homo sen libereco

Pro kancero li ligitas al la
malsanlito dum la tuta tago.
Sub ofta atak' de morb' letala
li apenaŭ spiras sen ajn ago.

Akompanas lin nur kuraciloj:
la kemi- kaj radi- terapioj,
glutpiloj kaj dolor-suspiroj,
kaj ĉiamaj pogutig-serioj.

Lin ĉirkaŭas nure blank-koloro:
kuracistoj, flegistinoj multaj,
litkovriloj kun acid-odoro
kaj konsolaj vortoj tre tumultaj.

Jam putriĝas lia viva penso
mallibera en mortinta menso.

Ploranta ĉielo

la tutan tagon
sub premo de vetero malserena
mi apenaŭ povas spiri
mi etendas manon
ekster la fenestron
por senti
la falantan pluveton

kvazaŭ larmon de la ĉielo
subite la pluveto foriĝas
anstataŭe venas pluvŝtormo
kvazaŭ la ĉielo volus
elsputi sian koleron
post longa plorado
mia koro
nereteneble
peziĝas kiel la ĉielo

kien vi iris
varma suno?
kiam vi revenos
revenos
por dispeli
la grizajn nubojn
el la koro de la ĉielo
tiel ke ĝi povu
revidi la lumon?

Se revenus tempo...

Se revenus tempo...
mi tiame kaptus la okazon
kaj ne farus, kiel nun, ion ajn.

Se revenus tempo...
mi ĝin ŝparus tre zorgeme
kaj utiligus ĝin por lernado.

Se revenus tempo...
mi atentus ĉion ĉirkaŭ mi
kaj rakontojn belajn verkus.

Ve, malfeliĉe
ne ekzistas "se" en mia vivo
por mi penti kaj lamenti.

Baraktado en neĝo

Vadante en la neĝo ĝisgenua,
mi lacas ja pro paŝad' sintrena.
Mi volas iri jen per paŝo plua,
sed mi ne povas kvazaŭ enkatena.

Baraktas mi svingante manon pene,
kaj movas la piedon malsukcese.
Ĉu rampi? mia mano sinkas svene
kaj falas eĉ la tuta korp' senĉese.

Mi sentas min pli kaj pli malespera,
mi volas voki helpon, sed ne homo
troviĝas ie sub la sun' vespera,
kaj fore staras nur kaduka domo.

Tuj mi vekigās el la songĥ' subite
baraktas torde mi en lito ŝvite.



desegnita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



poeto, Yi Qiao

Bonstato

Pensmaniero
altgrade efikas sur
mensa prospero.

Ŝanĝebla vivo
dependas de vidkampo
de perspektivo.

Vera bonstato
dependas precipe de
spirita glato.

Ne l' mona sumo
la bonstaton alportas,
sed inspir-lumo.

Korharmonio
la bonfarton alportas
kun sankonscio.

Granda trezoro
heredebla ja estas
l' amo en koro.

Amon dividas
ni kun samideanoj,
kaj ŝancojn vidas.

En malfermita
menso troviĝas vera
bonstat' spirita.

Estas senlima

en bonfartanta korpo
saĝec' anima.

Saniĝo tra meditado

Estas grava la spirita glato,
ĉar ĝi al saniĝo profitdonas.
Meditadu ni en tranca stato,
kaj rezulte nia korpo bonas.


Kun vizi' de bel' ni enpensigas,
energi' ĉerpeblas por vitalo.
Forto san-spirita jen plenriĉas,
ni bonfartas nun laŭ idealo.

Flagras vervo dum la meditado,
sekve la animo jen puriĝas.
Pensmigrante tra serena pado,
kvazaŭ jus baptitaj ni feliĉas.

Meditad' profitas al bon-vivo
kun saĝeco de nov-perspektivo.



Stanislao M Esposito (Italia)



Steloj kaj larmoj

La urbo estas vestita per flamoj,
kun koloroj plenaj de malamo kaj teruro.
La korrompitaj voĉoj memorigas la ĉielon
ke ni ne estas faritaj por tiaj noktoj
Steloj kaj larmoj konfuziĝas

aŭtoro, Stanislao M Esposito

kaj ili rigardas mondon de cindro,
malplenaj stratoj, kiuj flustras rakontojn pri dezerteco.
La forlasitaj domoj ankoraŭ rakontas pri rompitaĵoj vivoj
kaj la vento portas kun si la eĥon de malproksimaj krioj.
Tiu, kiuj antaŭe ludis en la strato, nun kuras timigitaj, inter ruboj kaj ruinoj,
serĉante lumon, signifon, respondon al demando pli granda ol ili.
Okuloj plenaj de larmoj rigardas la stelojn supre kaj ne konante la
estontecon,
ili kuraĝe diras jes al morgaŭo, kiun la sonĝo, hodiaŭ, ankoraŭ ne povas krei.

La Donaco de Vivo

Birdo manĝis sur muska branĉo,
Sur ŝanceliĝanta vermo, sub la matena brilo,
En la kvietaj danco de la naturo, afabla sceno,
Atesto pri vivo, kaj malnova kaj nova.

Ĉiu estaĵo ĉi tie, en la vasta brakumo de la naturo,
Donaco donita por nutri kaj subteni,
En senfinaj cikloj, vivo kaj morto interplektiĝis,
De la tero ĝis la ĉielo, ĉiuj partoj de unu koruso.

Kaj dum mi meditis pri ĉi tiu simpla vidaĵo,
Mi vidis mian vivon, fadenon en la ŝtofo,
Donaco al aliaj, radianta de lumo,

Per mi, la universo ricevas siajn donacojn.

Por ĉiu spiro, flustro en la vento,
En ĉiu korbato, eĥoj de la pasinteco,
La mondo disvolviĝas, kaj de mi, ĝi estas alpinglita,
Tapiŝo de vivo, tiel riĉa, tiel vasta.

Tiel mi iras, en dankemo kaj graco,
Parto de la granda, eterna raso de la naturo.



desegnita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

John Huang (Kanado)



La monda “Libro de Poezio”

Milojn da jaroj antaŭe l’ Libro de Poezio
rakontis belege pri popolo kaj reĝoj.
Poetoj kantis en kampoj kaj urboj,
versoj ĉarmis sen ajna sento de enuo.

Vejdo tradukis per majstra plumo,
kaj la mondo miris je lia genia talento.
Li kreis teamon plenan de energio,
por fari videojn kun granda pasio.

Trans landoj vastaj, tra tempo kaj spaco,
Mi ekvojaĝis kun ĝojradia vizaĝo,
portante trezoron, antikvan kaj karan,
la "Libron de Poezio" elegantan.

Unu jaron mi dediĉis kun fervoro,
invitante la mondon kun devoteco.
Famaj esperantistoj, el mondpartoj,
faris voĉlegadon, kun ĝojo en voĉo.

En Torino, ĉe Kongreso sub ĉielo,
Mi kunvenigis famulojn ĉe l’ loko:
venas Duncan Charters, saĝa en parolo,

Renato Corsetti kun espero en koro,

Margaret Zamenhof, respektata persono,
ĉiuj kune, en harmonio, por l' entrepreno.
Ili voĉlegis vivece kaj zorgeme tiujn
vortojn mirindajn, kiel stelojn super vojoj.

Ĉe sunleviĝo en Azio, poeto kantis
pri montoj kaj riveroj, lirikoj fluis.
Eŭropo sonis per versoj de saĝo,
reĝoj kaj herooj reviviĝas en realo.

Afriko resonis per poezia metriko,
per deklamo pri spirito laŭ ritma bono.
Amerikoj kantis pri tero kaj gloro,
pri homoj kaj naturo en poema etoso.

Jen la unuafoja evento en la mondo,
cent esperantistoj deklamis la Poezion.
Flugis kantoj, odoj, himnoj ŝvebe
kareseme kaj balzame en tervilaĝa familio.

**Libro de Poezio* estas la unua poemaro de la antikva Ĉinio, tradukita de Veĵdo.



Lilia Nikolova (Bulgario)



Mi estas el Bulgario

"- El kie vi estas?" - demandas min nekonata fremdulo.
 - El Bulgario - mi respondas.
 - Jes, li diras - sovaĝuloj, ŝtelistoj, ciganoj, krimuloj,
 malpezaj putinoj...

aŭtorino, Lilia Nikolova

- Pardonu - mi demandas al li - Ĉu vi estas sovaĝulo, ŝtelisto, krimulo... ĉu vi postkuras ĉiesulinojn?

- Kiu, mi... mi? Ne. - respondas li ofendita - kial vi diras tion?

- Se vi ŝatus la historion, vi identigus min kun ĥano Asparuh - la bulgara popolo estas unu el la plej antikvaj en Eŭropo kaj la mondo. Niaj prapatroj estis parto de la kreado de multaj grandaj imperioj. Kiel heredantoj de ĉi tiu antikva tempo, ni estas la unuaj, kiuj ekuzis la slavan alfabeton, tuj post ĝia kreado. Ĝia aktiva disvastiĝo inter la slavaj popoloj ŝuldiĝas ĝuste al nia lando.

Se vi ŝatus sportojn, vi identigus min kun Dan Kolov, Hristo Stoiĉkov, Petar Stojĉev, Stanka Zlateva, Tanja Bogomilova, la oraj knabinoj de belarta gimnastiko, Stefka Kostadinova, Jordan Jovĉev, Ivet Lalova, Grigor Dimitrov...

Se vi amus arton kaj muzikon, vi rekonus min en Nikolay Gjaurov, Raina Kabaivanska, Stefka Sabotina, Milcho Leviev, Valja Balkanska kies kanto flugas en la kosmo per kompaktdisko...

Se vi interesiĝus pri kuirado, vi sciis, ke la patrujo de jogurto estas Bulgario.

Se vi interesiĝus pri teknologio, vi sciis, ke la unua cifereca brakhorloĝo estis farita de bulgaro, kaj ankaŭ la unua elektronika, neprogramebla komputilo.

Se vi interesiĝus pri esploroj, vi sciis, ke la plej malproksima planedo de la Suno estis malkovrita de bulgaro.

Se vi interesiĝus pri historio, vi sciis, ke la unua ina ĉaspiloto estis bulgara.

Se vi interesiĝus pri teknologio kaj muziko, vi sciis, ke la unua kompakta magnetofono, sur kiu la mondo aŭskultis *The Beatles* kaj *The Rolling Stones* dum dudek jaroj, estis inventita en Bulgario.

Se vi interesiĝus pri medicino, vi sciis ke Nivalin estas preparita el galanto de bulgaro. Ĝi estas vaste uzata en neŭrologio en la traktado de poliomjelito tra la tuta mondo.

Se vi interesiĝus pri pentrado, ni parolus pri la granda Vladimir Dimitrov - Majstro...

Se vi interesiĝus pri aŭtomobiloj, vi sciis, ke la unika aŭtomata kontinue varia dissendo estis inventita de bulgaro.

Se vi interesiĝus pri arkeologio, vi sciis, ke la unua prilaborita oro en la mondo estis malkovrita en Bulgario.

Se vi interesiĝus pri fremdaj lingvoj, vi sciis, ke la programaro por libera komunikado per telefono, mikrofono kaj Interreto inter ĉiuj lingvoj kaj dialektoj de la mondo estis kreita de bulgaro.

Se vi estus turista, ni parolus pri Nigra Maro, Rodopa Montaro, Danuba Delto, Rozovalo, monaĥejoj kaj preĝejoj.

Se vi interesiĝus pri sporto, ni povus paroli pri nia atletiko kaj la neforgesebla salto de Stefka Kostadinova.

Se vi pli interesiĝus pri mia patrujo, vi sciis, ke ni havis reĝojn kaj reĝinojn, kaj homoj de arto, teatro kaj filmoj, verkistoj, poetoj, aktoroj kaj muzikistoj estas fonto de fiero. Vi surpriziĝus ekscii, kiom da bulgara heredaĵo estas en la listo de Unesko kaj kiom da pitoreskaj lokoj en Bulgario senspirigus vin... Sur ĝia teritorio estas ĉio - montaraj gigantoj, fekundaj ebenaĵoj, roz-disŝutitaj valoj kaj lazura maro. Sed vi, kara fremdulo, scias nenion pri tio. Vi estas neniu el ĉi tiuj...

Vi scias nenion pri mia Bulgario. Vi scias nenion pri mia patrujo. Vi scias nenion pri ĝia popolo.

Vi estas nur malklera homo.

Kaj vi verŝajne ŝatas vidi nur tion ĉi, kio vi estas en via animo..

De tie mi venas... jen mia Patrujo... mia tero, kiun generacioj savis kaj konservis... ĉi tiu tero estis pagita tiel kare per la sango de miaj prapatroj kaj meritas esti aprezata. ..

ĈI ESTAS LA LANDO DE KIE MI VENAS KAJ MI ĜIN AMAS! Ĉi tio estas mia Patrujo - Bulgario!"



Bedo de Ĉinesko



aŭtoto, Vejdo

Sorĉa povo kontraŭ pluvo

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangan): ĉina
fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5
silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

rakonto pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo

La reĝo
iris ĝojplene
ĉasi kun korteganoj
dum Afanti ĉagrene
sekvis sintrene,

ĉar ili
rajdis impone
sur kurĉevaloj kaj li
sur poneo dispone
jen laŭordone.

Dumvoje
tondris subite,
fulmadis kaj pluvegis,
ĉiuj ja surprizite
fuĝis evite.

Kaj ili
galopis grege
en urbon por ŝirmi sin
sed en vestar' malseka
pro bat' pluvega.

Afanti
pro fi-ĉevalo
ne povis rapidi sed
nur haltis dum pluvfalo
ĝis la finalo.

Li saltis
de ĝi rapide
kaj demetis la veston
kaj ĝin ŝovis konfide
sub selon glite.

Post pluvo
aperis suno.
Li surmetis la veston
kaj rajdis kun kant-zumo
en plena junco.

Kiam li
palacon iris,
jen la reĝo vidis lin
en seka vest' kaj miris,
"Kiel akiris

sekecon
vi en pluv-kovro,
dum ni tramalsekiĝis?
Ĉu estas sorĉa povo
en via movo?"

Afanti
diris ridete:
"Ne, via reĝa moŝto,
kiam vi fuĝis cede,
pluvo obsede

vin sekvis,
dum al ĝardeno

bela mia ĉevalo
min kondukis sen peno
kaj ajna ĝeno.

Jen tie
brilas la suno,
pompas floroj kaj birdoj
kantas en arb-brakumo,
lirlas roj-rumo.

Ĝi estas
jen en la mondo
la plej bela ĝardeno,
al mi plaĉis la montoj
kaj klaraj ondoj.

Pro tio
iom malfrue
mi revenis al palac',
staras ĉe vi genue
kun tim' senbrue."

La reĝo
gapis kun envi'
tre deziris iri al
loko plena de magi'
kaj, ha, fantazi'.

Jen ili
en la dua tag'
iris ĉasi denove.
Ilin trafis pluv-atak'
dum ilia vag'.

Ĉifoje
Afanti rajdis
sur reĝa ĉevalo sed
tiu poneon ŝatis

kaj vipe batis.

Ĉe ekpluv’
Afanti donis
vipadon al ĉevalo,
ĝin galopi ordonis
kaj plue spronis.

Apenaŭ
pluvguto eta
lin kaptis post reveno
per kurĉeval’ impeta
kaj longpieda.

Sed tamen
la stulta pone’
haltis pro tim’ al tondro,
rifuzis rapidi tre
dum pluva akme’.


En pluvad’
la reĝ’ mizere
tramalsekiĝis ĝis haŭt’,
embarasiĝis vere
veis suferi.

Vidinte
Afanti-n, brule
de kolero la reĝo
muĝis: “Vi senskrupule
trompis min mule!”

Afanti
diris ridete:
“Se sub selon vi metus
la vestojn, vi tutcerte
povus komplete

reveni
seka tuttute
kaj ne viaj vestaĵoj
malsekiĝis pluv-gute
ja absolute!”

Tsangyang Gyatso (1683-1706)



Tsangyang Gyatso, Dalai-lamao la sesa (1683-1706), estis viva budho de la Flava Skolo de la Tibeta Budhismo kaj fama poeto kaj politika figuro en Ĉinujo. Li estis plej populara popolkanta poeto de Tibeto kaj verkis multajn sentnuncanajn poemojn, inter kiuj la plej klasikaj kolektiĝis en Amkantoj de Tsangyang Gyatso eldonita en lignogravura versio de la tibeta lingvo en Lasao. Tiuj poemoj estis tradukitaj el Poezia Biografio pri Tsangyang Gyatso. Iuj el ili jam aperis en Literatura Foiro 328 - februaro 2024, kaj la aliaj nun prezentas sin ĉi-sube.

poeto, Tsangyang Gyatso

Poemoj de Tsangyang Gyatso

Li estis kiel la plej granda reĝo en la neĝa lando,
tiel ankaŭ la plej bela amato sur la tero.

Jen la legendo farita el tempo,
kiu vivos eterne en la neĝe blanka mondo.

1.

Ho, bela hiacinto antaŭ la statuo de Budho,
se vi estus mia amatino en la pasinta vivo,
mi do preferus esti ora abelo,
konstante vin ĉirkaŭflugante en la budhokulta ĉambro.

2.

Por mia karulino dolĉa kaj bela,
mi hezitas ĉu eniri montaron por kulturi min budhisme.
Ĉu sur la homa tero estas bona solvo,
kiu ebligu al mi zorgi samtempe pri darmo kaj amo?

3.

Estus plej bone, se mi neniam vin vidus:

ne tiel obsedas min la pensoj pri vi.
Se vi estus al mi tutsimple fremda,
la ama inklino ne tiom min konfuzus.

4.

Loĝante en la impona palaco Potala,
mi estas la plej majesta en la neĝa lando;
vagante en Lasao movoplana,
mi estas libera viro Dangsang Wangpo*.

**Dangsang Wangpo: la pseŭdonimo de Tsangyang Gyatso.*

5.

Ĝisfunde amanta, mi sondas ŝian amjuron:
ĉu ni ambaŭ povos kunesti dumvive?
Ŝi, mia koro, estas tiel rokfirma:
de vi nur la Morto min apartigos.

8.

Leviĝis aminklino en la koro de la junulo el Kongpo,
kvazaŭ abelo sin ĵetanta en aranejon.
Malpli ol tri tagojn li implikiĝis en amo al la amatino,
kiam la darmo denove ekloĝis en lia animo.

10.

Nigra sigelo
ne povas elverŝi koran amon.
Tamen mi ankoraŭ sigelas la leteron,
por ke mia sopiro estu stampita
sur vian koron.

13.

Sankta bonzo min kondukas
al la Granda Vojo de luminiĝo je darmo.
Sed mia koro iluziita
kontraŭe trenas min al la karulino.



14.

Por darma praktiko mi devas liberiĝi de ĉio alia,
sed tio tamen ne eblas por mi.
Se mi povus forgesi vian vizaĝon,
ne estus malfacile tuj budhiĝi.

15.

Sur la amletero al vi skribita,
se malsekigita de pluvo, la inko nigre difuziĝas
disen.
Mia sopiro al vi,
eĉ se ŝmirita, ankoraŭ povas esti distingebla.

16.

Praktikante budhismon, la darmon mi kontemplas,
sed la trajtoj de Budho neniel aperas antaŭ mi.
Mi ne havas memoron pri vangokavetoj ŝiaj,
sed en mia korfundo ekleviĝas ŝia ridmieno.

17.

Eĉ dum renkontiĝo ne eblas interparolo,
post ĉea preterpaso restas nur suspiro.
Feliĉe, dank' al viaj amoplenaj okuloj komunikemaj,
mi ekscias en vi la deziron veran.

18.

Kiam la sago pafiĝis,
ĝi ne returneblas, nek retroveblas.
Hodiaŭ mi renkontis kiun mi iam amis,
kaj mia animo forprenita de ŝi ne revenos.

19.

Dum ĉi tiu efemera vivo,
se havante vian amon, mi bedaŭras nenion.
Ĉu vi rememoros miajn vizaĝtrajtojn hodiaŭajn
en la venonta vivo malproksima?

20.

De Monyul la kukolo flugas ĉe min,
kvazaŭ la printempa dio venus al la tero.
Tiu saluto el la hejmloko gajigas min senfine,
kvazaŭ mia amatino min invitus
levi vinglason kaj paroli pri agrablaĵo.

21.

Se en tiu ĉi vivo ni ne vidus nin reciproke, inter ni ne estus amo.
Se en tiu ĉi vivo ni ne konus nin reciproke, inter ni ne estus sopiro.
Se en tiu ĉi vivo ni ne akompanus nin reciproke, inter ni ne estus amŝuldo.
Se en tiu ĉi vivo ni ne amus nin reciproke, inter ni ne estus forlaso.
Se en tiu ĉi vivo ni ne rigardus nin reciproke, inter ni ne estus renkontiĝo.
Se en tiu ĉi vivo ni ne miskomprenus nin reciproke, inter ni ne estus perfido.
Se en tiu ĉi vivo ni ne promesus unu al la alia, inter ni ne daŭrus amrilateco.
Se en tiu ĉi vivo ni ne dependus unu de la alia, inter ni ne estus korligiĝo.
Se en tiu ĉi vivo ni ne renkontus nin reciproke, inter ni ne estus rerenkontiĝo.
Sed efektive ni nin vidis kaj konis reciproke, kaj en tio naskiĝis ĉi-viva amligiteco.
Kiel oni povus detranĉi tiun obsedantan amligitecon, ke mi ne suferadu de tia amo,
kia min implikas en embarason?

22.

Egale, ĉu vi vidas min aŭ ne,
mi ja troviĝas tie,
ne malĝoja, nek ĝoja.
Same, ĉu vi pensas pri mi aŭ ne,
mia amsento al vi jen estas tie.
Idente, ĉu vi amas min aŭ ne,
la amo sendube restas tie,
ne kreskanta pli, nek malpli.
Vi sekvas min aŭ ne,
tutsimile, mia mano vere sin trovas en la via,
kaj ĝi neniam retiriĝos.
Lasu min brakumi vin
kaj ami vin tutkorpe kaj tutanime.
Tiel pluos nia amo,
kaj al ni neniam okazos disiĝo.

23.

Kiel solece ĉe la tempo de disiĝo!
Kun subtila tristo
vi rearanĝas al mi la ĉapon;
kun ia nuanco de malgajo
mi reordigas al vi la harojn.
Unu al la alia ni diras “ĝis revido”
kaj “ne estu melankolia”.
La tago de disiĝo fulme forpasas,
dum longe daŭradas la sopiro.
Baldaŭ ni kunvenu ankoraŭfoje.

28.

La amatinon, al kiu mi ĵuris pri eterna amfideleco,
tamen oni edzinigis al aliulo.
Mia amsopiro, centoble tordita, jam fariĝis plago,
kaj miaj zorgoj pri ŝi ŝrumpas preskaŭ en polvon.

30.

La ĉarma feino Lhamo
propre estis predo al mi, ĉasisto.
Sed la kruela despoto forrabis
de mi la knabinon, kiun mi amas.



elĉinigi *Minosun* (Ĉinio)

Qu Yuan (ĉ. 340-278 a.K.)



poeto, Qu Yuan

Qu Yuan (ĉju jüan) estis ĉina antikva patriota poeto. Li devenis de la aristokrata familio kaj oficis en imperiestra palaco kiel altrangulo, kiu respondecis pri internaj kaj eksterlandaj aferoj. Pro klaĉoj kaj forpuŝoj de fi-korteganoj li perdis favoron de la imperiestro. Li estis ekzilita malproksimen disde la palaco. Kaj fine li mortigis sin en la rivero por esprimi sian fidelecon al la patrio. Li estis la unua en Ĉinio, kiu verkis versojn kun romantikisma tono.

Naŭ Kantoj

Elĉinigiŝ Ma Feng

1. Al Ĉiopova Reĝo de l'Oriento

Dum bonaŭgura tago, la favora horo,
omaĝas ni al Reĝo kun respekta koro.
Impone staras li kun glavo en la mano,
tintadas liaj jadpendaĵoj por ornamo.

Sur tablo pezas jadpremiĵoj delikataj,
metitas oferaĵoj, floroj buntparadaj.
viando kuŝas sur folioj la orkidaj,
aromas vino el laŭrfloroj freŝplukitaj.

Ni frapas la tamburon forte kun sonoro,
per lantaj taktoj kaj modera la langvoro,
je akompan' de kantado kaj flutludado.
En bunta vesto sorĉistino dancas bele,
aromo ŝvebas en rit-halo jen leĝere.
Diversaj tonoj ja leviĝas harmonie,
ni benu l' supran ĉiopovan reĝon pie.

2. Al Nuba Diino

Ŝi banas sin per akvo orkide-odora,
post ban' ŝi vestas sin en robo riĉkolora.
En ŝia korpo mediuo restas bone,
haloo el ĝi brilas kiel sun' impone.

Mi volas plene ĝui vivon sur altaro,
kaj ĵetas sun-similan lumon super maro.
Veturas mi per drak-kaleŝo kun fe-flagoj,
kaj vagas en hommond' por priirigardaj agoj.
Majesta nub-diin' jam avataras fale,
subite soras ŝi al la ĉiel' spirale.

Mi birdrigardas tutan teron kristalklare,
kaj ankaŭ lasas spurojn ĉie en-kvar-mare.
Diino Nuba, mi nur veas kun sopiro,
ĉagren' tristigas min lamente kun korŝiro.

3. Al la Lordo de la Rivero Xiang

Vi ja ankoraŭ ne alvenas kun hezito,
por kiu restas sur insul' vi sen irito?
Ŝminkita dece kvankam kun denaska belo
mi en kurflu' boaton remas en ventpelo.
ordonas mi, ke Yuan kaj Xiang riveroj fluu
kviete, ondoj de Jangzi-river' ne skuu.
Atendas vin mi, sed vi ne alvenas al mi,
mi ludas fluton ja kun sopiremo al vi.

Mi min direktas norden jen en drak-boato,
atingas ĝi la Dongting-lagon en ondbato.
antaŭe akvokreso pendas ja kurtene,
kaj poste flosas orkideoj aromplene.
Rigardas mi al fora bordo de l' rivero,
mi penas ja transpasi l' riveron per velo.
Dum longa voj' mi ne vin vidas en apero,

la servknabino ankaŭ veas kun anhelo.
Mi larmas ja nereteneble kun doloro,
pro sopirem' mi tristias kun ŝirita koro.

Kun rudro kaj pagajoj firme en la mano,
mi fendas ondojn de neĝece blanka saŭmo.
Kial deŝiri terajn florojn en akvaro,
kolekti lotuflorojn nepre sur montvalo?
Svatisto por negeamantoj penas vane,
forĵetos la senama ligo min ĉikane.
Sur malprofunda akvofluo l' drak-boato
leĝere glitas ĉien ajn laŭ mia ŝato.
Ĉagrenon naskas inter amparo l' perfido,
l' amrendevu' foriĝas ofte sen konfido.

Matene kuras mi kaleŝe laŭ rivero,
ankriĝas mi sur nordinsulo en vespero.
Ripoze nestas birdoj jen sub la tegmento,
rivero fluas antaŭ l' domo en silento.
Mi ĵetas en riveron ringon de blankjado
kaj jadpendaĵon en la akvon sen kompatato.
Mi plukas florojn sur la sabla insuleto
kaj donas ilin flate al servistinetato.
La temp' forpasas ja rapide senrevene,
atendas mi sciigon bonan senĉagrene.
Feino de l' Xiang-rivero
Ŝi venas al l' insulo norda kun leĝero,
rigardas foren ĉagrenplene mi en koro.
Sin skuas arboj en aŭtuna la ventpelo,
folioj falas, sonas en la lag' ond-ploro.
Starante sur cipresaj herboj mi rigardas
ĉirkaŭen, ĉar okazos nokte rendevuo.
Birdaro stari ĉe akvoherbej' hazardas,
fiŝreto pendas sur arbranĉo ja sen skuo.

Aromas verdaj akvoherboj ĉe l' rivero,
Sopiras mi al ŝi, sed hontas pri esprimo.
En tranco mi rigardas foren kun espero,

videblas riverakv' fluanta en lum-glimento.

Kial manĝaĵon alko serĉas en la korto?
Kial vagadas drako apud la rivero?
Matene mi galopas ĉevale ĉe l' bordo,
mi traveturas fluon transen en vespero.

Alvokon ŝian mi jam aŭdis el la foro,
mi volas iri al ŝi ja per ĉevalĉaro.
Surakve mi konstruos domon en izolo,
ĝin kovras per lotusfolioj por vualo.

Ornamas mi la murojn bele per akoroj,
kaj ŝutas aromherbojn plene en la halo.
Ĉinama lign' uzitas kiel dom-ĉevronoj,
kun laŭra pordo kaj dormĉambro sen rivalo.

Mi plektas la kusenojn per fikus-rubandoj,
kaj sternas la tapiŝon herban sur la muro.
Elfaras mi flatajn termatojn per blankjadoj,
plenplenas orkide-odoro de plezuro.

Sur lotusdom' kovriĝas herboj jen en ordo,
ĝin ĉirkaŭvolvas trae branĉoj de azaro.
Mi plantas diversspecajn florojn en la korto,
kaj bonodor' nazpika ŝvebas el portalo.

El monto ĉiuj dioj venas ŝin renkonti,
kiel nuboj ili jen alsvarmas ar' post aro.
Manikon mian ĵetas rojen por respondi,
kaj veston mian al rivero en la valo.

Insule mi kolektas florojn de azaro
por donaci al la knabino en la foro.
Vanui ne lasante ŝancon jen en falo,
vagadas mi ĉirkaŭen kun facila koro.

4. Al la Granda Lordo de la Sorto

Ovriĝas la ĉiela pordo larĝe vere,
mi rajdas sur densdensaj nuboj, ho, prefere.
Ordonas al turnvento mi, ho, vojon fari.
kaj al tempest' forigi polvon jen sen stari.

Sobiras, ho, vi Lord', spirale el ĉielo,
mi strikte sekvas vin trans montojn kun fidelo.
Sur la naŭ landoj homoj bruas en ekscito,
vivas aŭ mortas ili de mia decido.

Mi flugas kun sereno alte en ĉielo,
mi jugas lumon kaj mallumon en aero.
Rapidu mi post vi kun granda pietato
por vin glorigi per via aŭtoritato.

Leĝere via vesto flirtas en aero,
pendaĵoj jadaj viaj brilas en splendbelo.
La lumo kaj mallum' ŝanĝiĝas en vario,
neniu konas kion faras mi kun scio.

Mi plukas florojn de jad-arbo por donaco,
kaj sendas vin irontan al la blua spaco.
Oldaĝo proksimiĝas al mi plu kaj plue,
esperas mi, ke daŭros longe l' viv' kontinue.

Drakĉaro mia, ho, rapidas kun radknaro
ĝi soras alten cele al la nuba maro.
Mi staras longe kun laŭrbranĉoj en la mano,
des plie mi sopiras al vi kun tristgamo.

Ĉagreno helpas al mi, ho, neniom vere,
bonfarton, sanon volas teni mi prefere.
La homa vivo destinatas en la mondo,
laŭ sorto mia decidiĝas la respondo.

5. Al la Juna Diino de la Sorto

Aŭtunaj orkideoj kaj purblankaj floroj
miksitate kreskas apud halo en prospero.
Aromo de folioj verdaj, blankaj floroj
atakas mian nazon kaŝe en ventpelo.
Virinoj ĉiuj havas siajn proprajn idojn,
kial vi ĝenas vin pri ilia mizero?

Aŭtune orkideoj floras en prospero,
folioj verdaj kaj purpuraĵoj belas.
La halo plenas de belinoj en ĝojego
iliaj okulumoj al mi tre sinceraj.

Vi mute venas kaj foriras sen parolo,
rajdante sur turnvent' kun nuboj kiel flagoj.
Disiĝ' ĉe geamantoj vekas des pli triston,
plej ĝojas koramikoj en kuniĝaj brakoj.

En vest' lotusfolia kaj dolĉherba zono
abrupte vi alvenas, foriras kun hasto.
Vespere loĝas vi ĉe la ĉiela rando,
kiun vi ja atendas en la nuba vasto?

Mi volus bani min kun vi en ĉiel-lago,
kaj vi sekigos viajn harojn en montvalo.
Sed vi ne venas kaj mi vin atendas vane,
mi kantas nur al vento, ho, kun koramaro.

En la kaleŝ' smeralda kun pavplumaj flagoj
vi soras balai kometojn sur ĉielo.
Vi en brakumo tenas geinfanojn bone,
protektas vere vi plebanojn en mizero.

6. Al la Dio de la Suno

En oriento tuj aperos ruĝa suno,
prilumos ĝi, ho, mian arbon de magio.

Mi frapas la ĉevalon por promeni pace,
vanuas nokto lante sub l' aŭrorradioj.
Kaleŝo mia kuras kun la tondra sono,
la flagoj sur ĝi flirtas frape en nubmaro.
Kun longa vesuspir' mi volas flugi alten,
rigardas suben mi hezite kun amaro.

La bru' muzika kaj spektakla ja ravigas,
spektantoj eĉ forgesas, ho, pri hejmemiro.
Streĉitaj kordoj ja resonas kaj tamburaj
sonoroj skuas bretojn, ho, ĝis malstabilo.

Ho, oni ludas fluton kaj la kordojn plektras,
la ĉarma sorĉistino dancas kun gracio,
leĝere kiel verda bird' fluganta bele,
kune kun poem-voĉlegad' en harmonio.

Laŭritme oni dancas, kantas en akordo,
Spiritoj venas are jam ŝirmante l' sunon.
En vest' el nuboj kaj la jup' el ĉielarko
al la Ĉiela Lup' mi pafas la sagpunon.

Kun sago en la man' mi sinkas okcidenten,
mi ĉerpas la laŭrfloran vinon per Ĉerpilo*.
Mi tenas bridon de ĉeval' flugante alte,
direkte al l' eosto en obskur' sen brilo.

**Ĉerpilo aludas la konstelacion Granda Ursino.*

7. Al la Rivera Dio

Rivera Dio, kune vagas ni al naŭ riveroj,
ekblovas vento, akvo ŝaŭmas kun ondrulo.
Ni sidas en kaleŝo kun lotusfolia
tegment' tirata de drakpar' en vent-ululo.

Sur Kunlun-monto mi rigardas, ho,
ĉirkaŭen,
mi sentas min ravita kun serena koro.
Pro bela vid' mi eĉ forgesas hejmeniron,

sopiras mi des pli al akvmonda odoro.

Vi havas domon kun tegmento el fiŝ-skvamoj,
kaj jadvaleto el purpuraj perl-dekoro.
Kial vi longe loĝas sub akvo, Sinjoro?

Ni rajdas sur magi-testudo por ĉasi fiŝojn,
kaj naĝas ĝoje ĝis la sabla insuleto,
preter nin fluas riverakvo en impeto.

Prenante vian manon, ho, mi vin forsendu
ĝis suda riverbordo per mia akompano.
Ondanta akvo saltas por vin bonvenigi,
adiaŭ diras al vi, ho, la fiŝa klano.
Al la Monta Feino

Trapasas transan valon svelta la knabino,
kun fikus-vesto kaj la zono el liano.
Ĉe ŝiaj lipoj ludas rido de fascino,
kaj dronas mi pro ŝia graciaĉo en amo.

Mi rajdas sur panter' sekvate de la ĉaro
el magnolia ligno ornamita per flago.
Mi riĉe vestas min kun zono el azaro
donacas al vi mi pro via rid-koketo.

En bambuaro sen penetro de sunhelo,
la voj' zigzagas kaj ireblas malfacile.
Mi sola staras alte sur montpinta sfero,
nebulos flosas disen sube maltrankvile.

Taglum' malhelas kiel nokto en obskuro,
diino ŝutas pluvon en eosta vento.
Mi ŝin retenas ĝui ludon kun plezuro,
neniel la junecon tenas mi sen pento.

Enmonte mi kolektas herbojn por la sano,
tra rokoj survolvitaj de liana tigoj.

Malamas mi ke vi forgesas pri kompano,
dum vi sopiras min sub amaj la instigoj.

Knabino en la monto spiras je aromo,
el fonto trinkas sub la ombro de cipreso.
Ĉagrenas nin la am' per kora la opreso.
Rulbruas tondr' kaj pluvo falas en lamento,
simioj krias tra la nokta nigr-vualo.
Folioj ŝvebas pluve en hurlanta vento,
ĉagren' naskiĝas en sopira la amaro.

8. Al Martiroj de la Regno

Kun halebardo en la mano, kirasitaj,
ni interbatis sur radĉaroj, ho, intense.
La sunon ŝirmis flagoj, malamikoj multis,
bravuloj vivoriske luktis, ho, klarmense.
La fortaj malamikoj sturmis al ni falĉe,
vicaro nia trarompigis en pelmelo.
Ĉe mia liva flanko la ĉevalo mortis
ĉeval' la dekstra, ho, vundiĝis per glavpelo;
la ĉaro enkotigis, bridoj implikiĝis.
impetis ni sub kuraĝig' de tamburbatoj.
Indignis la Ĉielo kaj spiritoj plene,
kadavroj kuŝis dise ĉie por la ŝtato.
Bravuloj ne revenis, ho, por militiro,
mortinte sur vastejo fora en nebulo.
Kun longa glavo kaj pafarko en la mano,
ne ŝanĝis altan volon ili en tumulto.
Kuraĝis ili kaj kapablis en batalo,
ho, neflekseblis kaj malmolis ĝis la morto.
Spirito ties tamen, ho, neniel mortis,
animoj ties estas la bravuloj de la forto.

9. Kultado al Animoj

Ĉe l' fin' de ritoj tamburoj laŭte sonas,
transdonas oni florojn, dancas kun plezuro.
Kantado de l' belinoj ŝvebe, rave tonas.
Printempajn orkideojn, aŭtun-krizantemojn
en ritoj, ho, por ĉiam donas la naturo.

Wang Zhongbin (1969—)



poeto, Wang Zhongbin

Vibrado

printempo iras tien kaj reen
kaj enfalas en la kotan foson de l' vintro
kio tre similas mian anksion

okaze falas neĝo
kiu scias, ĉu ĝi estas la lasta fojo
ŝajnas, ke printempo ricevis la poŝtkarton de l' vintro
iom ridinde, iom absurde

kiu scias!
ĝi estas la beno de l' vintro ĉe disiĝo
ni tamen prenas ĝin por mensogo
ni legas ĝin foje
kaj refoje
timante, ke l' vintro revenos
fakte, la printempaj paŝoj proksimas al la pordo
la distanco inter ili kaj mi
nur longas kiel miaj grizaj haroj

Por memorfesti la perditan amon

kredu min, ke la plej sunplena tago staras ekster la fenestro
unu foto de vesperkrepusko ĉe sojlo de l' somero
unu paĝo iam foliumita pri la tempa fragmento
en kiu montoj kaj riveroj ĝuas feliĉon
vi lante foriris foren, post via dorso
svaga figuro kaŝe viŝsekigas sian larmon

aro da kovroj flugas en fora ĉielo
vespero efemeris

frida aero forblovis el mia korpo vian restantan radion da varmo
amo kaj malamo batalas kaj implikiĝas
ĉu vidi aŭ ne, mi ĉiam emas vin vidi
ĉu ami aŭ ne, mi ĉiam kovas sopiron al vi

kiam strataj lampoj vice ekbrilas
nova luno dronas en malhelo
mi alte taksas la distecon de la fora monto
vi, kiun mi renkontis en la nokta vento lastsomere, ĉi-momente
jam iris al la transa flanko de la monto
la distanco inter koroj tamen proksimas
se diri adiaŭ, eble ne plu aŭdeblas

la valo solecas, flegmas
persikpetaloj abrupte falas refoje
frapante la teron, kiel tamburbatoj
la koro ankaŭ skutremas pro tio

La somero pafas la lastajn kuglojn

majo deprenas la ŝelon de aprilo
kaj ĵetas blankajn florojn sur siajn branĉojn
kvazaŭ disflugigus grupon da blankaj kolomboj sur verda insuleto
kiuj ĉirkaŭŝvebas super la domego de la hospitalo
la blankaj gantoj de kuracisto
manprenas la varmeton de aprilo
la printempo letargias ĉe stratrando en nokta mallumo
virino vagadas en la strato plena je sunlumo
ŝiaj nudaj ŝultroj
kopias la malhelon post la printempaj branĉoj kaj folioj
la ŝipo jam albordiĝis, trenante la erarvagantan sampanon
dum mansvingado
la printempo postlasis sian ombron
la somero pafas la lastajn kuglojn

Malliberejo

unu homo kun ombro de longa kaj maldika korpo
unu arbo en pompa disflorado kun pufa ombro

la luno ne influatas mezuri la longon de iliaj ombroj

la luno ŝtopas la subirantan sunon en sian buŝon
kaj voras la tuta buntecon, ĉio kvietiĝas
friska malvarmo estas la plej bela bluzo de la luno

ebriiĝo enmetas solecon en la vinbotelon
kies eta aperturo ŝprucigas svagan kaj iluzian dancantan papiliparon
kolere kaj forte
mi fermas la botelon per kovrilo, kvazaŭ premante la buntecon en la koro

ne plu pensu
pri la unika ŝi

vastas tero kaj ĉielo, galaksio malheliĝas
la vizaĝo de la luno paliĝas
mi dancas kun zefiro, akompane de mia ombro
ni triopo
dancas fojrefojeje ĉe la sama loko

La luno kuŝanta sur la tegmento

la luno kuŝanta sur la tegmento
milde rigardas la maljunan jujubarbon kun flora aromo
la tero de la naskiĝloko elspiras bonodoron
lekantetoj skuante la kapon montras la stellumon
trumpetfloroj grim pantaj sur la heĝo ŝajne flosas sur akvo
la arĝenta lunlumo kisas la okcidentan muron
la kamentubo kaŝe rigardas la tegolan tegmentrando
ventsonoriloj tintas brile
mi kuŝas en malluma kaŝejo
brizo frapas sur mian fenestron
lunlumo skuetas mian liton

elĉinigiŝ Yanke (Ĉinio)

Rovere Emanüele (Italio)



poeto, Rovere Emanüele

Amo sub lunlumo

Muziko / vortoj: E. Rovere (Manüel)

Ĉu vi jam dormas sub mola littuko?
Do, ne rimarkis vi ĉi tiun plaĉan nokton.
Eble vi songas aŭ, orelostreĉe,
atendas min samkiel ofte, pasintece.
Dum mia longa malĉeest' mi ĉiam pensis nur pri vi:
bonvolu nun ne lasi min plu sola tie ĉi.

Ho, karulino, venu kun mi sub lunlumon.
Profitu je ĉi tiu romantika hor'.
Retrovu ni la fonton de l'vera vivtrezoro:
senfine por ni brilos Amo sub lunlumo.

Ĉu vi memoras nun pri tiuj tempoj,
kiam ni planis formi belan familion;
kiam korŝire devis mi elmigri,
por perlabori monon, realigi revojn.
Finiĝas mia forestad', plename mi revenas nun.
Ne atendigu min plu, baldaŭ jam vekigōs sun'.

Ho, karulino, venu kun mi sub lunlumon.
Rigardu, fleksgenue nun mi petas vin.

La nura amo estas vi, vi aŭ neniu alia.
Ni ĝoje realigu amon sub lunlumo.

Hieraŭ mi

Muziko / vortoj: Lennon/Mc Cartney

Hieraŭ, mi
la feliĉon havis tie ĉi,
vivo brilis kiel sunradi',
hodiaŭ okazis tragedi'.

Ĉiam mi
trovis helpon de l' ĉiopova Di'.
Ĉu mi perdis gracon nun de Li,
ĉar kun mi plu ne estas ŝi.

Kial ŝi forlasis min sen antaŭprepar'?
Venas al mi timoj pri ebla mia erar'.
Ambaŭ ni
amis reciproke kun pasi'.

Ekas nun de amo l'agoni',
temp' de priplor' kaj nostalgi'.
Kiel povas revoj cindriĝi dum moment'?
Eble amo ne povas daŭri sen turment'.

Ŝajnas mi
disbatita de la vent' foli'.
Akompanos min ĉi emoci':
profunde amis hieraŭ mi.

Se por ni
estis am' facila lud', poezi',
komenciĝas ĝia agoni',
temp' de priplor'
kaj nostalgi'.

Kiel povas revoj cindriĝi dum moment'?

Eble amo ne povas daŭri sen turment'.
Ŝajnas mi disbatita de la vent' foli'.
Akompanos min ĉi emoci'.
Profunde amis hieraŭ mi.
En amo kredis hieraŭ mi.

Saporo de salo

Muziko / vortoj: G. Paoli

Saporon de salo, saporon de maro
vi portas surhaŭte, vi donas perlippe,
kiam vi, el la akvo, eliras kaj venas
sterniĝi ĉitien, flanke de mi.

Saporo de salo, saporo de maro,
maldolĉas la gusto de io perdita,
de io lasita ie en malproksimo,
kie ĉio malsamas ol la vivo ĉitie.

La tagoj forfluas senzorgaj kaj pigraj
kaj restas enbuŝe la gusto de salo.
Vi plonĝas en akvon, por ĉies rigardoj,
kaj vi lasas min sola sursable, subsune.

Revenas vi, poste, iom laca sterniĝas
humida sursablen kaj en brakojn miajn;
kaj, dum mi vin kisas, saporo de salo,
saporo de maro, saporo de vi.

Knabino

Muziko / vortoj: Lennon/Mc Cartney

Ĉu bonvolas vi aŭskulti la rakonton pri l' knabino,
kiu dolorigis min?

Temas pri la ofta tipo de virino,
kiu sorĉas kaj perfidas ĝis la fin'. Knabino.... Knabino.

Ŝi promesis veran amon kaj dediĉon,
tamen sentojn ŝirkolektis nur sur ŝin.
Valoregis por ŝi nur, ke viroj ŝin admiru:
vera estis ŝi koketulin'. Knabino.... Knabino.

Inoj foje ŝatas vin ŝajnigi stulta ul' ĉe l' geamikoj;
viroj ofte ne konscias, ke ekzistas inoj
malvarmaj, sendankaj, egoismaj, kruelaj... Knabino.... Knabino.

Kiomfoje ŝi min eĉ neglektis kaj per larmoj,
poste, pardonpetis ŝi sen hont';
kaj juradis, ke ŝi ne plu tiel agos
sed perfidis min refoje en estont'. Knabino.... Knabino.

La transferkurtena koramikino

Muziko / vortoj: E. Rovere (Manŭel)

Iam havis mi koramikinon
trans la ferkurtena landlimo;
ni korespondadis kelke da jaroj kun ĝojo.
Niaj sentoj iĝis tre intensaj, naskiĝis Amo granda.

Estis bona trejnado por novlernanto
de l'Internacia Lingvo Esperanto.
Fine venis Universala Kongreso en ŝia lando.
Renkontiĝis ni, neglektis kongreson kaj mi memoras

pri la belaĵoj, kiun mi lernadis de ŝi:
pasio kaj amo sur herbejo, sub lunradi'
kaj la nokto, kiam ni dormis sub stelkovrilo.

Vilaĝeto, domo tre modesta,
gento ege ĉarma kaj honesta,
ĉiuj ĝojis regali min per manĝaĵoj, drinkaĵoj:

ŝinko aŭ fromaĝo, biero aŭ brando... sed mi forgesis

la guston kaj parfumon de ilia bonaj',
memoras mi nur la poezion en la verdaj'
kaj la fojon, kiam demetis ŝi la ĉemizon.

Perletere flugis varma sento,
revis ni, ke venos la momento
kiam falos la ferkurteno, revivos libero
kaj, senbare, povos ni renkontiĝi kaj ĉiam resti kune.

Falas la mureg' sed ŝi plu ne amas min,
granda festo por ĉiuj, ne por mi en Berlin',
la tuta mondo ĝojas, celebras la tuta homaro,
sangas mia kor', kolektas riunaĵojn de nia amo.

Samtempe falis ŝia amo kaj la mureg'.
Ĉu povas forblovi ĉion de liber' la venteg'
el virina koro? Kolektas mi ruinaĵojn.

Kie jam nun troviĝas tiu koramikin'?'
La dezir' de ŝiaj varmaj, dolĉaj kisoj, sen fin',
memorigos min pri mia amo perdita.



Anita Hoxha



poetino Anita Hoxha

Malnova foto

Tenis min vekita...malnova foto.
Ni etuloj kaj la gepatroj meze
Nostalgieca, tio turnis min al alia tempo
Rigardis mi ĝin dilate ĝisfrumatene..!

Kvazaŭ medalo, surmure ĝi staris,
Kiom da feliĉo, pensis mi, ni havis...
Elgutis survitron la brilanta larmero
La koron alkroĉis granda noslagio..!

-Kie ja estas la knabinoj, ludintaj en la hejmo,
Kie do restis tiu eta knabo?!
Permane mi tenis la infanecajn memorarĵojn,
Por promeni kun ili, en la florarujo, ien!

- Dio mia, mi preĝis, redonu min denove tiujn jarojn!
La gepatroj, forte manprenu nian manon...
Ni restos por ili, tiuj etuloj, infanoj...
Ni ankoraŭ timiĝas, pro la kruela mondo!

La gepatra domo, kvazaŭ muzeo estas...
La memorarĵoj, kvazaŭ relikvoj, nin alridetas
Dum la magiaj noktoj, ĉirkaŭ la foto ni ariĝas,
Kaj kapon surŝultre, unu al la alia, ni apogas...!

Min vi aŭdas ...

Al via koro delonge mi frapas,
Kvazaŭ vagabondo, ferpordo, rustigita,
Foje, animo kaj foje per nomo mi vin vokas...
Respondas la aŭtuno kaj unu sekigita folio, velkigita!
Kial vi, tiel malvarma, kvazaŭ senviva revenas...

Kvazaŭ manekino en la montrofenestroj silente staras,
Vi ne alrigardas min, nek aŭdas, nek parolas...!
Antaŭ miaj okuloj, bela, gaja, vi nun kadukiĝas!
Pli bone mi foriras, kiel la pluva aŭtuno foriras,
Mi diras, adiaŭ, por atendi mi ne plu tempon havas,
En via koro, dolorece kandelon mi ekbruligos,
Kie kaŝite en la sonĝo iu matenon mi venos!

Iutage!

Iutage, ni denove renkontiĝos
Ĉar la tero, vi sciuj, turniĝos...
La folioj super la tegmento, ekfalos
Eĉ se vi ne venos, mi ja vin atendos!

Tiam, sur la libroj, eble, mi endormiĝos,
Tial alpaŝu malrapide, ne veku min, se vi venos!
Viajn memorajojn jam kovris la pulvoro kovris
La fenestron ne malfermu, via vivo jam daŭris...

Se vi, tro malfrue, iam revenos,
Profundaj sulkoj surfrunte, desegnitaj estos
Teon kun la citrono el nia ĝardeno mi ofertas,
Ambaŭ ni, blankiĝintaj, kvazaŭ neĝomonto estos!

En la parko, manenmane, ni promenos
Per malgrandaj paŝoj, ĉar, ne facile, mi vin postsekvos
Kion vi jam estas dirinta, denove vi ne diru...
Nek, ke mi ekploru, vi atendu!

Iutage, ni denove renkontiĝos,
Ĉar la tero, vi bone sciuj, turniĝos!
Eĉ se pluvos, mi vin atendos,
Eble, pro la sopiro, ni denove interkisiĝos!

La patrio

La aŭtuno, faligis la sekajn foliojn trans la fenestroj,
Tristan kanzonon, kantas en la krepusko la birdoj...

En la malgranda lando, meze de alta monto,
Kie la neĝo kisas la pinarbojn, tie estas mia lando.

Kiam ventegas la frostoj, ĉi tie fore, tempeste...
Kiam la nuboj interpuŝiĝas furiozece
Tie, tra la nebulo, alflugas mia koro...
Kaj la larmoj elfluas nostalgie, kvazaŭ malvarma pluvo!

Frapas en la sonĝoj, mia kara patrino,
Memoras mi pri la pipo de mia patro kaj la fajro en la kamento,
Perdiĝas mi kvazaŭ infano, en ties ĉirkaŭbrako...
Trovis min la blanka aŭroro for de mia hejmo!

Patro, la muzo de miaj versoj!

Tiom multe da poeziaĵoj al la patrino, teksis mi
Sed, ne ĉar vin mi amis malpli
Kiel bele, mia filino, vi ridis kaj diris
Ĉiun vorton, ĉiun verson vi brodis!

Por skribi pri vi, hodiaŭ mi eksidis,
La aŭtunan muzon mi jam vokis
Larmoj en la okuloj miaj elfluis
Skribu versojn por la patro- mi petis!

Lacigis vin la jaroj, patro, mi tion animsentas,
Fore en fremda tero, disigita delonge...
Laŭvice, la memorojn, la fotojn mi trafoliumas,
Kaj vidas min, kun vi manenmane!

Vian rideton, dum vi ludis kun ni, mi memoris...
La pezan laboron, kiam laca, ĉiunokte vi venis,
Rare, ŝuojn, novan jakon vi aĉetis,
Por pli bona tago, al Dio supre. vi preĝis!

Ĉion nian, patro, mi jam savis
La tempo, niajn memorojn, varme en si tenis
La aŭtuno plenigas la parkojn tie, mi sentas
Kun la muzo sur la klavaro, hodiaŭ, ankaŭ vi eksidas..!

Forgeso

La hejmo de miaj geavoj, tie fore,
Kun ambaŭ oranĝarboj, rigardantaj al la monteto,
Kaj tiuj lignaj ŝtuparoj malsupre sojle
Kie sonas la vortoj de mia frato kaj mia fratino.

Nur en la jam forlasitaj ties etaj ĉambroj,
La pantofloj de miaj geavoj estas
Dum la varmaj zefiroj en Majo de la ĉerizarboj,
Ĉe la krepusko, mortaj, ili hejmen revenas!

Traserĉas ili en la ĉambroj lasitajn vestojn,
Unu ĉemizon, unu veŝton kaj la avinan kufon,
Ĉerpas ili el la kesto ĉiun donacon donitan,
Supreniris ili al la ĉielo sur la hirundaj flugiloj, kvazaŭ
anĝelojn!

La morgaŭon, kiam la suno frapas al la fenestroj,
Malplena kaj silenta la geava hejmo restas,
La laktokolektisto delonge ilin ne alvokas...
Sed ne ilia voĉo, nek tiu rideto, respondas!

Por vi

Malpeza muziko, soleca fono...
Glason da vino, mi eltrinkas
Kaj amparolojn mi flustras,
Dum la kurtenon skuas la vento!

Kandeletojn sur la kuko mi ekbruligas
Ĉiujn ĉirkaŭe mi kovras per kiso
Kiom maljusta, je diablo, ĉi tiu mondo!
Kaj vian foton mi sopire rigardas!

Ĝojan naskiĝtagon, la kandeletojn mi forblovas!
Ĝojon por la amo, restinta fore...
Sur la vinglaso kvazaŭ mi vin vidas,

Kaj la larmo elfluas, iompostiome!

Kiom da amoj silente forbruliĝis...

Kiom da aŭguroj, kiujn ni neniam aŭdis?!

Kiom da pentparoloj kaj kiom da ridetoj...

Nin oni lezis, nur ĉar ni amis!



elalbanigis

Bardhyl Selimi (Albanio)

Anonimulo

La viro, kiu kredas je l' amo

(*Guo Min* reverkis laŭ la interreta dramo)

unuakta dramo

Personoj:

viro

virino

kelkaj klientoj

kelnero, kasistino, kafej-estrino

(Ne tute vesperiĝas. Malhela lamplumo en kafejo. Okupitaj kelneroj. Unu bufedo kaj kelkaj tabloj por klientoj. Kelkaj klientoj dise sidis. Kasistino kun senemocia vizaĝo. La kafej-estrino varme salutas gastojn.)

(Kiam la kurteno leviĝas, la viro sidas ĉe la fenestro, kaj malkviete levas sian kapon por rigardi ekster fenestron, ŝajne atendente iun. Kelnero demandas lin kaj foriras.)

Viro (*fronte al spektantoj*): Ĉe vesperiĝo mi trairis la finon de tiu ĉi urbo, kaj mi trovas ĝin vere similanta al testudo, testudo kun verda ĉapo. Ĝi surmetas verdan ĉapon sur ĉiujn homojn, virajn kaj virinajn. Ĉio ŝanĝiĝis tute alia, krom deprimita ĉagreniĝo kaj amfidela atendo, ĉio ŝanĝiĝis tute alia. La amo etendas siajn flugilojn kaj flugas de ĉi urbo al alia urbo. Mi vane gapas, ke ĝi, simile al kolombo flugas el mia vido al la foro...al la foro...forflugis. Do mi decidis forlasi ĉi tiun urbon. Ĉe vesperiĝo...

(Tiam la virino, surportante oblikve sur ŝultro mansaketon, eniras el ekstere. Laŭ la vizaĝo ŝi ne estas tiel juna, sed ŝi emas trudi la mienon de eta knabino, dense ŝminkita kaj kun ruĝigitaj lipoj.)

Kafej-estrino: Ĉijare mi estas trideksep-jara, sed oni diras, ke mi aspektas nur deksep-jara. Mi ne havas sekreton por teni min juna. Amo ne estas ŝatata ludo por ĉiuj. Viroj ne estas bonaĵoj. Kiel arde mi amas vin, mono! Vi povas doni al mi ĝojan kaj frenezan spiradon! (*Vidante la virinon eniri, ŝi zorgeme ekzamenas ŝin, kaj ŝia*

rigardo haltas ĉe ŝia koliero. Ŝi trudas oleecan rideton sur la vizaĝo.) Ho, fraŭlino, la koliero tiom taŭgas al via delikata kaj blanka haŭto! (*avide rigardas la kolieron*) Ĝi certe kostas multe da mono!

(La virino ĵetas al ŝi straban ekrigardon kaj ignoras ŝin. Ĉirkaŭrigardinte, ŝi trovas la viron kaj iras rekte al li. Kelnero tuj sekvas ŝin.)

Kafej-estrino (*kun malestimo*): Kia fieraĉo! Hm! (*tuj ŝanĝiĝas per alia mieno*) Ha, ja ja, kiel arde mi amas vin, mono! Vi povas doni al mi ĝojan kaj frenezan spiradon! Kiel arde mi amas vin, mono! Mi volas dediĉi mian junecon al vi. Mi volas doni mi mem al vi! Ha, ja ja, ha, ja ja...

(Kun nenatura rideto la virino sidiĝas kontraŭ la viro.)

Kelnero: Kion vi volas trinki?

Viro (*levas sian kapon kun laca mieno*): Tason da plej amara kafo, tiel amara kiel mia nuna humoro. Eble mi ekhavos ekvilibrigitan koron...

Virino (*ankoraŭ kun nenatura rideto, penante ŝajniĝi sin pli natura*): Laŭ via volo. Tason da kafo kun lakto kaj sukero.

Kelnero: Bone. Vi du atendu momenton.

(Post longa tempo la kelnero alportas kafon kaj ĝentile retiriĝas.)

Viro (*kirlas kafon per kulero kaj levante ĝin, faras gluteton*): Kiel vi vivas bone nun?

Virino: Em...

Viro (*afliktite*): Ĉu vi scias? Vi ŝajnas tiu ventblovo, kiu alblovas kaj poste foriros. Kaj tiu, kiun mi amas, alvenas, sed foriros, kiel tiu ventblovo. Ĉu vi ankaŭ foriros?

Virino (*kirlante kafon, balbutas*): Ĉu vi ne scias, ke mi apartenas al aliulo?

Viro (*ne povas kredi tion, sed ŝajniĝas sin indiferenta*): Ĉu li traktas vin bone? Ĉu vi sentas vin feliĉa pro tio, kion li donas? Jes, li jam donas tion, kion mi ne povis doni, kaj miaflanke, mi baraktas ĉe la rando de malriĉeco. Egalas, ĉu mi perdas aŭ gajnas. Vi jam foriris de mi.

Virino: Kiel la realeco proksimiĝas al la vivo!

Viro: Do, egalas, ĉu mi perdas aŭ gajnas, kaj vi certe foriras de mi. Krom deprimita ĉagreniĝo kaj amfidelata atendo, ĉio jam ŝanĝiĝis tute alia. La amo etendas siajn flugilojn kaj flugas de ĉi urbo al alia urbo...

Virino: Eble oni maltrafas unu de la alia en ĉi tiu hommondo tiamaniere.

Viro: Mi vane gapas, ke vi, simile al kolombo flugas el mia vido al la foro...al la

foro...forflugis...

Virino: Estu iom reala.

Viro: Forflugis al la foro... al la foro...

Virino: Fakte li traktas min tre bone. Mi sentas min ĝoja.

Viro: Tial krom eskapi el la urbo, mi ne scias, kian elekton mi havas. Ĉio jam ŝanĝiĝis tute alia.

Virino (*ŝajne vizaĝe al malfacila elekta demando*): Fakte vi donis al mi feliĉon, dum li donas al mi ĝojon. Eble la feliĉo daŭras pli longe, dum la ĝojo ofte estiĝas...

Viro: Ĉu li traktas vin bone?

Virino (*perplekse*): Em...ĉiutage ni ĉiuj frontas elektojn, pravajn aŭ malpravajn.

Viro: Ĉar vi jam faris elekton, daŭrigu vian vojon. Neniel returnu vian kapon. Eĉ se vi estas malprava, ankaŭ ne returnu vian kapon.

Virino: Do, farinte elekton, daŭrigu iri, malgraŭ ĉu ĝi estas prava aŭ malprava.

Viro (*englutas plenbuŝon da kafo*): Mia senparola larmino estas obeema tristeco. La vojo ne plu irebla kondukas al la fora ekzekutejo. Kara mia, mi ne povas doni al vi tion, kion li povas doni. Krom deprima ĉagreniĝo kaj amfidela atendo, ĉio ŝanĝiĝis tute alia. Multajn jarojn mi rigardas ĉi urbon alterni de vespero al nokto, de malhelo al lamplumo en pompo. Vento alvenas de tie kaj foriras de ĉi tie. Ĝuste kiel vi, vi venas kaj tuj foriros. Neretenebla tristeco elŝoviĝas el la fendeto de muziko kaj okupas mian vidon. Ĝi, kiel la lamplumo, konfuzas miajn okulojn kaj ankaŭ mian koron...

Virino (*kun dubema mieno de knabino*): Ĉu...vi ankoraŭ havigis al vi koramikinon?

Viro (*ignoras ŝian demandon*): Eble mi ne povas foriri, sed mi vere volas foriri, ĝuste kiel vi foriras de mi, kiel tiu vento foriras sen ajn radio da bedaŭro. Ĉu la amo vere tiel doloras? Kial mi ne elektas ĝojon, sed tristo sin turnas al mi?

Virino: Vi ja devas trovi koramikinon por bone zorgi pri vi. Vivo, samkiel mono, ne kompatas, kaj kiel tranĉilo, forgratas tavolon da graso kaj tavolon da karno. Tamen la graso en la vivo kaj parazito facile vin voras. Antaŭ ol la vento vin forblovos, vi mem jam malaperas.

Viro (*levas la tason kaj prenas grandan buŝplenon*): Jes, kial mi amas iun, kiun mi ne devas ami, kaj kiam mi ekpentas, la feliĉo jam foriris de mi je cent kaj okdek mil lioj? Kial, kial, kial la tristeco facile rabas de mi ĝojon kaj mi eĉ ne havas tempon kapti ŝin per miaj manoj por zorgeme priirigardi? Tiu tempesto jam malaperis senspure. Mi ne povas flari la floran aromon, kiun vi restigis, nek vian spiron, kiam vi restis ĉi tie. Amo senigas la vivon je la procezo, dum tristeco la vivon je la rajtoj. Mia restanta korp-ŝelo diras al vi "mi amas vin", sed tio estas dirata senforte kaj pale. La pasintaj tagoj jam restigis vundojn kaj tiu frazo estas erodita de la rusto de la vivo, la frazo, kiu ne povas elteni unu baton.

(Li petas tason da kafo al la preterpasanta kelnero.)

Virino: Ĉu vi ankoraŭ min amas? Kial vi ĉiam ne forlasas min? Ĉar vi jam havas komprenon pri ĉi ĉio, kial vi ankoraŭ ne malstreĉas viajn kaptantajn manojn? Sufero estas neevitebla, kial vi glutas unu tason da kafo post alia? Aldonu iom da sukero, ĉu?

(La telefono de la virino sonas. Ĵetinte ekrigardon al ĝi, ŝi kunŝovas siajn brovojn kaj malŝaltas ĝin senparole.)

Viro (*kun sufermieno, sed penas afekti, ke nenio okazas*): Ĉu li serĉas vin? Reiru. Mi volas resti ĉi tie pliajn momentojn.

Virino (*rigardante lin, ŝajne volas paroli, sed tuj haltas. Brilo de larmoj fulmas en la okuloj*): Zorgu pri vi mem...

Viro (*dronante en pensemo pri pasintaĵoj, ŝajne parolas al si mem aŭ diras al ŝi*): Forpasis, ĉio forpasis. Tiam vi portas tiom feliĉan mienon. (*La virino montras feliĉan mienon.*) Rideto neniam foriras de ni, rideto neniam tenas nin forlasitaj. La floroj ĉiam aromas kaj la luno ĉiam aspektas runde. Mi memoras, ke via rideto radiis allogajn nuancojn sur la luno. (*La virino haltas kaj aŭskultas.*) Eĉ viaj bonodoraj haroj en svaga nebulo ĉirkaŭas miajn pensojn, multajn jarojn tiamaniere ĉirkaŭas min, miajn pensojn kaj tiun maljunan arbon, kiu akompanas nin multajn jarojn, kaj eĉ ŝirmas la ĉielon super la tuta urbo. Hodiaŭ tiuj ĝojoj ŝajne revenas, tiu nebulo ĉirkaŭanta min refoje estas penetrata de la sunlumo kaj leĝere dancas sur la kesto de la memoro sigelitan je multaj jaroj. (*La virino ekdancas sola.*)

Virino (*fosas en la memoro, aŭskultante liajn vortojn*): Ve, dum ĉi tiuj multaj jaroj vi ankoraŭ kalkulas je tiuj ĝojoj. Vi vere suferas. Tamen mi elektas alian viron, alian vojon, sur kiu sterniĝas plene juveloj kaj peltaĵoj, kiujn mi volas. (*En la okuloj radias neordinara brilo.*) Tio estas ĉio, pri kio mi revas multajn jarojn.

Viro (*prenas plenbuŝon da kafo, ignorante kion ŝi diras*): Kiel feliĉe vi dancas! Viaj leĝeraj dancaŝoj malpeze tretas sur mian koron (*premas la manon sur la bruston, kie la koro forte batas. Leviĝas kaj ĉirkaŭbrakumas lin la virino por dancado.*) Mia ĉiu korbato akordis kun via ritmo. La lunlumo, penetrante tra la folioj de la maljuna arbo, verŝiĝis sur viajn harojn, sur la ŝultrojn kaj sur viajn dancaŝojn. Miaj ĝojoj tie kreskis freneze, disvastiĝis freneze kaj dronigis min, tiun maljunan arbon kaj la tutan ĉielon. Tiam mi tute forgesis min mem kaj la tempon. Miaj ĉiuj ĝojoj dancie sur viaj dancaŝoj.

Virino (*skuas la kapon*): Sed vi tre malriĉas. Vi eĉ ne povas donaci al mi tiun ŝminkan

skatolon. Pro tio mi volis foriri de vi tiam. (*Ŝiaj vizaĝtrajtoj fariĝas feroce torditaj.*) Envio igas min demono. Mi envias tiujn, kiuj, malpli bela ol mi, portas belajn vestojn, kun lipoj dense kaj allogge rufitaj, kaj tiun araneon sidantan sur iliaj piedoj, kiu ĉiam rampas, rampas en mia koro... Ĉu vi scias, kiel mi sentas grandan suferon? (*Enviemo kaj doloro glimas en la okuloj.*)

Viro (*soife*): Ĉu vi amis min tiam?

Virino (*paŭzas momenton en pensemo*): Jes, sed vi estis tro malriĉa. Malgraŭ tio, ke vi donis al mi multe da ĝojo kaj balzamo sub la malriĉa ĉielo, kiel mi sentis tiom feliĉa! Tamen vi estis tro malriĉa. Kaj mi enviis tiujn fraŭlinojn malpli belajn ol mi kaj tiu araneo rampis, rampis en mia koro, kiom da sufero mi sentis! Do, pro tio mi volis foriri de vi kaj serĉi alian viron, sur kies vojo sterniĝas brilantaj juveloj kaj allogaj mustelaj peltaĵoj.

Viro: Sed mi diris, ke mi vin amas. Kial vi ne kredis min? Kaj vi diris, ke vi kredas min, se mi freneziĝus, ĉu ne?

Virino: Jes, mi sciis, ke vi min amas, kaj ankaŭ mi vin amis. Sed mi malpacientiĝis en atendado. Tiu speco de envio igas min freneza. Sciuj, kia dolora turmento ĝi estas! Jes, mi ne volis atendi plu, tiel ke mi volis foriri de vi, ĝuste kiel tiu hundo, kiu forlasis la hejmon. Mi ne ŝatis, ke ĝi ĉiam sekvas min. Mi volis serĉi tiujn aĵojn, kiujn mi volis, sed ne viajn fantaziajn songojn. Tiuj buntaj bobeloj disrompiĝas je ekfrapo de la realaj obusoj. Mi ne ŝatas la alte pendantan ĉielarkon ĉe la horizonto. Mi volas tiujn aĵojn realajn, brilantajn, allogajn tuj antaŭ miaj okuloj.

Viro (*levinte la tason, eltrinkas la enhavon en la taso, ne plu afektante senzorgemon*): Ah! Virino! Vi estas katino en seksardo ne timas krian riproĉon de la mastro. Kial en viaj okuloj radias naiveco, sed kredas tiujn neforporteblajn aĵojn?

Virino: Do mi tiam diris, ke mi kredus vin, se vi freneziĝus. Mi tion diris nur pro kolero. Mi sciis, ke vi min amas. Sed mi ne bezonas tiun buntan bobelon, mi volas la realecon tegita per sukero. Li estas tre potenca, li estas tre granda, tiel ke mi nereteneble enamiĝas kun li. Sed vi, vi donis al mi nur tiun malpuran bobelon.

(*Sonas refoje la telefonilo. Ŝi respondas la telefonvokon kaj pretas foriri.*)

Viro (*forte skuas la kapon, montrante nekredeman kaj doloran mienon*): Kial vi kredus miajn vortojn je mia freneziĝo? Kiel arde mi vin amas! Mi jam forĵetis ĉion, kion mi povas, kaj nur dumvive amas vin kaj igas, ke vi ĉiam vivas en la feliĉo. Kial vi volas foriri de mi? Mi petas, ke vi ne foriru de mi, ĉu bone? (*preskaŭ esploras pro doloro.*)

Virino (*fulmas radio da kompatemo, kiu tuj malaperas kaŝe. Montras la mienon de firmeco kaj senkompatemo*): Estu iom reala. Nun mi jam apertenas al alia viro. (*tuj*

pelas siajn piedojn)

Viro (*tute kolapsas en spirito. Liaj senbrilaj okuloj sekvas ŝiajn moviĝantajn paŝojn*): Vi scias, ke mi atendadas ĉi tiujn jarojn ĝuste por protekti nian amon. Sed vi decideme foriras de mi, foriras. Mi ne plu vidos vin, vian dancadon, viajn leĝerajn paŝojn, kiuj tretas malpeze sur mian koron. (*Subite eksplodas per rido*) Mia amo perdiĝis, ŝi forflugis, forflugis, ha, ha, forflugis kiel birdeto, forflugis, ha, ha...

(La virino eliras.)

Viro (skuante la kapon, volas esplori, sed trude rideti, murmurante): ...Kial vi kredus min, ke mi vin amas, nur se mi freneziĝus? (*ripetas ĉi tiun frazon, miksantan kun nenaturaj ridsonoj kaj feblaj plorsingultaj sonoj.*)

Kafej-estrino (*kompateme*): Ve, li freneziĝas, freneziĝas, la freneziĝinta viro estas tre kompatinda. (*ŝanĝiĝas per alia mieno*) Aj ja ja, aj ja ja! Mi admonas al la homoj ne kredi je la amo. Nur mono estas reala. Nur la reala mono donas al mi realan senton. Ne kredu je la amo. Nur la sento de geamantoj estas ĝojiga. Mi volas serĉi la veran senton. Mi volas serĉi la senton de ĝojo. Ne kredu je la amo, ne kredu je la amo...

(Lamplumo iom post iom malheliĝas. Alŝvebas viraj ridoj kaj ploroj. Aŭdiĝas malklare "Kial vi kredus min nur post kiam mi freneziĝus". Jen ridsonoj jen plorsonoj iom post iom malaperas. La lamplumo tute mallumiĝas.)



(La kurteno falas.)

Ge Baoquan (1913-2000)



Hujucz, la veterana aŭtoro, kiun mi konas

Kamarado Hujucz estas ĵurnalisto, redaktisto, eldonisto, fakulo pri internaciaj aferoj kaj tradukisto de la maljuna generacio de Ĉinio. Ankaŭ li estas veterana Esperantisto kaj aktivulo de la Esperanto-Movado. Ĉi-jare li atingis la altan aĝon de okdek ok jaroj. Ni ĉiuj nomas lin la estimata veterano Hujucz.

aŭtoro, Ge Baoquan

La 9-an de septembro de 1896 li naskiĝis en la gubernio Shangyu, Zhejiang-provinco, kaj nun li parolas ankoraŭ kun forta loka akĉento de Zhejiang. Kiam li estis juna, li vizitis mezlernejon en Shaoxing kaj lernis de sinjoro Luxun (t.e. Zhou Shuren). En 1931 li eklernis Esperanton per koresponda kurso. En 1941, kiam li estis 18-jara, li estis pasinta ekzamenon kaj servis kiel lernanto-praktikanto en Ŝanhaja Komerca Eldonejo, kaj poste estis sendita kiel redaktoro en la redakcion “Orienta Revuo”, kio komencis lian redaktadan kaj ĵurnalistan laboron. Mi memoras, ke en la multaj eldonaĵoj eldonitaj de Komerca Eldonejo plej populariĝis inter la legantoj la “Orienta Revuo”, “Monatgazeto de Noveloj”, “Virina Revuo” kaj “Studenta Revuo”. Precipe, en 1916, kiam Shen Yanbing (ankaŭ konata kiel Mao Dun) aliĝis al la traduk-redakta sekcio de la Komerca Eldonejo kiel redaktoro, en 1921 li novigis la “Monatgazeton de Noveloj”. Kaj Zheng Zhenduo iĝis la ĉefredaktisto en 1922, kiam ambaŭ la “Monatgazeto de Noveloj” kaj la “Orienta Revuo” fariĝis la plej gravaj eldonaĵoj, el kiuj mi akiris multe da nutraĵo kaj lernis multon, kiam mi estis juna.

Mi komencis ofte legi artikolojn verkitajn de Hujucz kaj eksterlandajn romanojn tradukitajn de li en la “Orienta Revuo”. Fine de 1921, kiam alvenis al Ŝanhajo Vasilij Eroŝenko, la blinda rusa verkisto kiu verkis en Esperanto, Hujucz konatiĝis kun li kaj tradukis lian faman romanon “Rakontoj de Velkanta Folio” dediĉitan al la ĉina popolo kaj publikigis ĝin en la “Orienta Revuo”. Kaj pere de sia rilato kun Luxun, li prezentis Eroŝenkon al sinjoro Luxun en Pekino. Ĝis tiam Hujucz jam faris multajn utilajn laborojn en la redakcio de la “Orienta Revuo”, ekzemple, por memori la 20-an datrevenon de la fondiĝo de la “Orienta Revuo”, li redaktis libroserion “Orienta Biblioteko” inkluzive de 82 libroj, en kiu troviĝis lia traduko de “Rakontoj de Velkanta Folio” verkitan de Eroŝenko.

En 1925 eksplodis en Ŝanhajo la Movado de la 30-a de Majo, kiu skue mirigis Ĉinion kaj la mondon. Hujucz publikigis artikolon “Raporto pri la Movado de la 30-a de Majo” en la “Orienta Revuo”, kiu altiris atenton de diversaj rondoj de la socio. Tio estis la unua fojo, ke li partoprenis en la revolucia lukto de la popolamaso. Tiam li estis nur dudeknaŭ-jara. En 1927 Ĉiang Kajšek lanĉis la kontraŭrevolucion puĉon de “12-a de Aprilo” en Ŝanhajo, buĉante la komunistojn kaj la vastan revolucion amason. Tiun nokton Hujucz, Li Shicen, Zheng Zhenduo kaj aliaj kune skribis leteron al Cai Yuanpei, Wu Zihui kaj Li Shizeng, la membroj de la Centra Komitato de Kuomingtango en Ŝanhajo, forte protestante kontraŭ la reakciaj perfortaĵoj de Ĉiang Kajšek.

En 1928, sub la blanka teroro de Kuomingtangaj reakciuloj Hujucz kaj Zheng Zhenduo vole nevole vagis eksterlanden. Zheng Zhenduo veturis al Anglio, dum Hujucz al Francio, kie li vivis tri jarojn. Tiutempe la franca valuto malplivaloriĝis kaj la vivkosto ne estis alta. Li do ofte verkis artikolojn por la “Orienta Revuo” kaj pagis lernokotizon kaj vivkoston per la honorario. Poste pro pliigo de la franca valuto malfacilis vivi plu tie, kaj li do forlasis Francion fine de 1930 kaj revenis al Ĉinio tra Germanio, Pollando kaj Sovetunio. Trapasante Moskvon li ricevis la helpo de sovetiaj esperantistoj kaj restigis sin en Moskvo por vizitado dum unu semajno kaj reveninte al Ĉinio li komencis verki la libron “Impresoj pri Moskvo”. Tiu ĉi libro unue publikigis en aŭgusto de 1931 kaj atingis sian kvinan eldonon en oktobro de 1932, varme akceptata de legantoj. Estis ja bonŝance, ke ĉi tiu libro eldoniĝis eĉ sub la malpermesado de Kuomingtangaj reakciuloj al ĉiaj progresemaj libroj kaj periodaĵoj.

Reveninte al la hejmlando, li, kiel ĉefredaktoro, okupiĝis pri redaktado de la “Orienta Revuo” en la Komerca Eldonejo ĝis li forlasis la eldonejon en 1923 kaj aliĝis al la redakcia laboro de franca Havas-Novajaĝentejo. Komence de la 1930-aj jaroj li aktive partoprenis en la nacisava movado kontraŭ Japanio kaj la laboro de semajngazeto “Vivo”. Dum la milito de “28-a de Januaro” li laboris kun Zou Taofen, mia onklo Ge Gongzhen kaj aliaj por fari preparojn por la fondo de la “Tagĵurnalo de Vivo”, kiu parolis por la popolo. En 1933 li kaj Zou Taofen aliĝis al la Ĉina Alianco por Protekto de Demokrataj Rajtoj, kaj batalis por defendi la popolajn rajtojn.

Ĉar Hujucz kaj mia onklo Ge Gongzhen estis malnovaj amikoj, ili renkontiĝis multfoje kiam ili estis en Francio. Mi memoras, ke kiam mia onklo vizitis Sovetunion en 1933, Hujucz skribis al li la 21-an de aprilo, dirante, “Frato, mi vere envas vin, ke vi havas bonan ŝancon travojaĝi la Novan Rusion kaj pririgardi ties konstruadon de socialismo. Mi opinias, ke pro teritoria vasteco de Sovetunio estas pli bone por vi fari longatempajn esplorojn kaj precipe iri al Ukrainio, Sud-Rusio,

Kaukazo kaj Siberio por enketi pri kooperativaj kaj ŝtataj agrokulturejoj, kaj ne preterlasi la popolan viv-staton, kulturon kaj edukadon. Post kiam vi revenos al la lando, tio, kion vi rikoltis, estos centoble multe pli ol tio, kion mi tie observis malprofunde kaj malzorgeme nur dum unu semajno. Antaŭ ol reveni hejmlanden, notu viajn impresojn kaj sendu ilin ĝustatempe al enlandaj gazetoj por plezurigi la legantojn.” Tiutempe la Librejo Vivo planis eldoni libroserion “Aktualaj Aferoj”, kaj Hujucz kaj Zou Taofen skribis al mia onklo, petante, ke li verku libreton kun unu aŭ du dekmil ideogramoj pri “impresoj pri sia vojaĝo” kiel unu el la libroserio. Kaj la anticipa anonco publikigita en la ĵurnalo jam listigis la libron kun titolo “Sovetunio, Kiun Mi Vidis kaj Sentis” verkitan de Ge Gongzhen.

Laŭ mia memoro, kiam mi estis en Moskvo en 1936, Hujucz tradukis el la franca en Parizo “La Rakonton de Libro” verkitan de M. Ilin, la sovetia verkisto por infanoj. Li petis al Ai Hansong, kiu tiam estis vizitanta Moskvon, helpi klarigi dubojn, kion mi faris, skribinte leteron rekte al Ilin. Mi unuafoje renkontis Hujucz en Hankou, kiam mi revenis al Wuhan el eksterlando komence de 1938 kaj laboris en Xinhua-Ĵurnalo sub la gvido de la respektata ĉefministro Zhou Enlai. Tiam Hujucz laboris en la tria sekcio de la Milita Komisiono de la Nacia Registaro gvidata de Guo Moruo. En 1941, post kiam “Evento en Suda Anhui” okazis, mi iris labori en Hongkongo kaj Hujucz restis en Singapuro tiutempe. Post eksplodo de la Pacifika Milito, li rifuĝis al Indonezio. Ni vere tenis lin en sopiro, kaj ni ne revidiĝis ĝis 1949.

Dum multaj jaroj nia estimata veterano Hujuzi okupiĝas pri ĵurnalismo, eldonado kaj Esperanto-Movado. Li ankaŭ aktive partoprenis en la demokrata movado. Li estas unu el la gvidantoj de la Ĉina Demokrata Alianco. Nuntempe li estas vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, vicprezidanto de la Centra Komitato de la Ĉina Demokrata Ligo, kaj honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Vojaĝo per Esperanto



sinjoro Hujucz

Hujucz scipovas la anglan, francan kaj Esperanton, sed li ne konas la rusan. Pro tio, kiam li vizitis Moskvon, pere de la helpo de sovetiaj esperantistoj, li sukcesis vojaĝi per Esperanto.

Antaŭ ol foriri de Parizo, li vidis la adresojn de pluraj moskvaj esperantistoj en la jarlibro de Internacia Laborista

Esperanto-Grupo, kaj li skribis leteron, informante ilin pri la dato de sia alveno al Moskvo. Ĝuste kiel li atendis, kiam la vagonaro eniris en la fervojan stacion “Belusio” de Moskvo, li vidis du esperantajn samideaninojn svingantajn verdstelajn flagetojn por saluti lin sur la kajo. Krome estis du samideanoj N kaj L en la stacidomo. Kiel li diris, la gesamideanoj fremdlandaj sin montras tiom intimaj ĉe la unuafoja renkontiĝo, kiom ili renkontas familianojn. Malofte vizitas Sovetunion ĉinoj, kiuj parolas Esperanton, tial kiam ili renkontiĝis kun mi tiel ĝoje kiel mi kun ili.

Dum sia vizito al Moskvo, li ricevis la plej multan helpon de la samideanino R laboranta ĉe la Centra Poŝtejo, kiu estis esperantistino en Hungario antaŭ la unua mondmilito. Ŝi inaŭguris la tiaman faman Esperanto-eldonaĵon en Budapeŝto, la ĉefurbo de Hungario. “Ŝia majstrado de Esperanto viciĝas en unua aŭ dua loko en tiama Hungario.” Ŝi partoprenis en la starigo de la Hungara Soveta Respubliko. Post ĝia fiasko ŝi vole nevole fuĝis al Sovetunio. Ĝuste pro tio ŝi bone konis Kun Bela, la hungaran revoluciulon kaj Varga, la eknomikisto-profesoron. Samideanino R estis varmkora. Kiam Hujucz restis en Moskvo, estis la plej malvarma sezono. Timante, ke li suferas de frosto, ŝi envolvis lin eĉ per sia pelt-palto. Kiam li glite falis, ŝi tuj levis lin kaj iradis kun li, tenante ties brakon. Farinte diversajn formalajojn kaj poste akompanante lin en vizitado, ŝi ne nur ne montris lacan mienon, sed ankaŭ lin trankviligis kiel patrino. En la libro Hujucz diris, “Se sen kompanio de samideanino R, mi fariĝus surda, muta kaj blinda. Mi ne komprenis aliulajn parolojn nek konas vojojn. Mi vere ne scias, kien mi povas iris en tiel granda Moskvo.” Kompreneble tiuj du samideanoj N kaj L, kiuj renkontis lin ĉe stacidomo, donis al li multan helpon.

Dum lia vizitado en Moskvo, akompanate de samideano N, Hujucz unue renkontiĝis kun samideano D, la ĝenerala sekretario de Sovetia Esperanto-Unuiĝo. Sciiginte, ke Hujucz venis el Francio, li demandis al li multajn aferojn pri la Internacia Laborista Esperanto-Organizo. En la tago, kiam Hujucz atingis Moskvon, Li finfine trovis liton ĉe la Proleta Vojaĝa Agentejo, danke al la klopodado de samideano D. Kiam esperantistoj en Moskvo okazigis akcepton honore al Hujucz, samideano D faris bonvenigan paroladon nome de la Moskva filio de la Soveta Esperanto-Unuiĝo, dirante interalie, “Kvankam Sovetunio kaj Ĉinio ankoraŭ ne starigis diplomatajn rilatojn, la destino de tiuj du landoj estas interligita kaj baldaŭ ili prenos la manojn unu kun la alia. Ĉi tiuj du grandaj nacioj havas 600 milionoj da loĝantoj kaj la kuna teritorio kovras la kvaronon de la tero de la mondo. Se ili unuiĝos, la monda paco povos esti garantiata. Por unuiĝi ĉi tiujn du landojn, Esperanto, la internacia komuna lingvo, povos servi kiel la ununura necesa ponto.” Laŭ mia scio ĉi tiu samideano D estas la fama sovetia seperantisto Ernest K. Drezen

(1892-1937), kiu verkis “Biografio de Zamenhof” (1929), “Historio de Esperanto” (1931) kaj aliajn librojn.

Krome, Hujucz ankaŭ ricevis helpon de multaj Esperantaj gesamideanoj en Moskvo. Ekzemple, kiam li faris viziton al la Sovetia Eksterlandan Kulturalan Asocion, ĉe la pordo li hazarde konatiĝis kun kamarado U, proleta verkisto el Tatar Respubliko. Tiu antaŭe estis teksisto en Kazano kaj aliĝis al la bolŝevika partio antaŭ 1917. Dum la interna milito li estis nonumita komandanto, kaj post finiĝo de la interna milito li malmobiliziĝis kaj komencis verki romanojn en la tataro. Li invitis Hujucz al sia hejmo por renkonti lian edzinon, operistinon. Kamarado U akompanis lin viziti la Centran Telegrafan Buroon, Junan Pioniran Konferencon kaj Teksilfabrikon “Tri Montoj”, kaj akiris bileton por spekti dancan dramon “Ruĝa Floro”. Alia samideano J, kiu laŭdire instruis al Eroŝenko Esperanton, laboris en la sidejo de la sovetia profesia sindikato kaj akompanis li viziti Amo-Aŭtofabrikon.

Unuvorte, dum sia septaga restado en Moskvo, troviĝante inter gesamideanoj, Hujucz persone sentis “kamaradecan amon” de la vere sincera internaciismo. Li diris, “Kvankam mi estis fremdulo tie, loĝante tie du aŭ tri tagoj, mi sentis, ke ĉiuj fariĝas amikemaj, sinceraj kaj entuziasmaj.” Ĝuste pro tio, “por danki la amikojn en Moskvo pro ties ĝentileco kaj bonvoleco, mi verkis ĉi tiun libreton, t.e. ‘Impresoj pri Moskvo’”.

Mi povas ĉi tie mencii, ke jam pasis preskaŭ cent jaroj de kiam la pola klerulo d-ro Zamenhof publikigis “La Unuan Libron de Esperanto” en 1887 sub la nomo “D-ro Esperanto”. Dum ĉi tiuj preskaŭ cent jaroj, Esperanto estis vaste disvastigitaj en diversaj landoj de la mondo, kaj la Esperanto-movado ankaŭ aperis en diversaj landoj. Ĉinio estas la lando, kiu tre frue diskonigis Esperanton. Sinjoro Lu Xun estis la unua persono, kiu tre frue montris subtenon al Esperanto. Hujucz komencis lerni kaj uzi Esperanton jam en 1913 kaj multe labori por antaŭenigi Esperanton. Li, pere de Esperanto, faris viziton, kiam li preterpasis Moskvon. El tio ni povas vidi nemalfacile, ke Esperanto, la komuna lingvo de esperantoj kun la verda stelo kiel simbolo, promesas senliman vivforton!

Kun disvolviĝo de Esperanto la japana esperantisto, Alkita Amebari viciĝas en tiuj, kiuj utiligas Esperanton por viziti Sovetunion. Mi ankoraŭ memoras, ke en 1956 kiam Hujucz gvidis delegacion de Ĉin-Sovetia Amikeca Asocio viziti Sovetunion, mi servis kiel vicestro kaj ĝenerala sekretario. En Moskvo ni loĝis en la nove konstruita hotelo “Leningrado”. Tiam li diris al mi, ke kun verdstala insigno de Esperanto sur la brusto, li okaze renkontis sovetian esperantiston Bokarev ĉe la gazetbudo malsupre de la hotelo kaj babilis kun li pri kelkaj problemoj pri Esperanto.

Okaze de la deka datreveno de la Oktobra Revolucio la japana esperantisto Akita Amebari vizitis Moskvon, kaj post reveno al sia lando, li verkis la libron “Juna

Sovetia Rusio” (ĉi tiu libro estis tradukita en la ĉinan), en kiu li interalie diris, “Tiuj, kiuj konas la estontecon de la sovetia Rusio, ankaŭ konas la estontecon de la mondo.” En la antaŭparolo de la libro “Impresoj pri Moskvo” Hujucz diris, “La Sovetia Federacio troviĝas en la procezo de transformiĝo oni ankoraŭ ne scias pri ĝia estonteco, sed nur nun la Oktobra Revolucio jam produktis multajn miraklojn.” Kiam li vizitis la infanvartejon de Amo-aŭtofabriko, li skribis ĉi tiujn vortojn sur la gastlibro, “Mi gratulas la infanojn de la sovetiaj laboristoj, kiuj kreskas en la libera kaj paca aero, sed ne konas la ĉagrenon nek suferon de la homa mondo. Intervidiĝinte kun tiuj naivaj kaj amindaj amiketoj, mi ekhavas la plenan certecon pri la feliĉo de la posteuloj de la homaro.” Kiel bone skribitaj tiuj vortoj estas! Post relego de “Impresoj pri Moskvo” verkita de Hujucz, tiuj vortoj ŝvebas longe ĉe miaj oreloj. Kvankam ĉi tiu libro priskribas tion, kion li vidis dum sia septaga mallonga restado en Moskvo antaŭ kvindek tri jaroj, ĝi tamen sciigas al ni, kiel tiama sovetia popolo laboris kaj batalis por konstrui la novan socion sub la plej malfacilaj kondiĉoj. Hodiaŭ relego de ĉi tiu libro ankoraŭ donas al ni kuraĝigon kaj inspiron!

marto de 1984

Pekino

el la “*Impresoj pri Moskvo*”



elĉinigis *Yi Shaomin* (Ĉinio)

